



# Georgo Balkanski








# La bazoj de la anarkiismo









Biblioteca Mateo Morral
Cta St Climent, 14 - 08840 Viladecans http://www.bmmorral.org bmm@enxarxa.com

BALKANSKI, Georgo (GRIGOROV, Georgi): *Bazoj de la anarkiismo*, 1958
Laŭ la eldono de *La juna penso*, 1979

2014
Biblioteko Mateo Morral
Carretera de Sant Climent, 14 bis
ES – 08840 Viladekans'

# Antaŭparolo

La aŭtoro, kiu, por simple prirespondeci tiun ĉi verkon, subskribis per G. BALKANSKI, estas bone konata bulgara aktivulo, en ekzilo depost 1948 kaj nun loĝanta en Francio.

Kiel li asertas en piednoto, por li gravas nek lia nomo nek liaj aŭtorrajtoj. Li klopodis esprimi la ĉefajn konceptojn de la socia, organizema kaj revolucia anarkiismo, konsultinte ĉiujn samtemajn verkojn, kiujn citi li opinias senutile. Tial estos vana ĉiu provo malkovri »plagiaton«.

Sed, partopreninte multajn kolektivajn diskutadojn pri la samaj temoj, spertinte kaj funde studinte la du grandajn revoluciojn de nia jarcento –la rusan revolucion kaj la hispanan– li ne povis eviti esprimi siajn proprajn opiniojn, kiuj havas ian originalecon, kaj origine aperis artikolforme en 1958.

La ellaborado kaj publikigado de tiu ĉi libro, ĉefe ĝia konstrua parto, respondas urĝan bezonon en Bulgario, kie la liberecana movado estas tre vigla kaj kie la socia rekonstruado en liberecana direkto montriĝas konkreta necesaĵo.

Fratece dankas ĉiujn, kiuj kontribuis al la ellaborado, tradukado kaj publikigado de tiu ĉi libro,

La eldonanto
(Baudé – *La juna penso*)

# Origino de la senestrecaj ideoj kaj movado.

Same kiel la ideoj pri aŭtoritato, ankaŭ la ideoj pri senestreco havas naturkaŭzan originon. Ili ne estas falintaj de la ĉielo, sed venas de la vivo. Ili ekradikas el la homo, el lia naturo. Ili naskiĝas el materialaj kaŭzoj en la piej vasta senco de tiu ĉi nocio. Ili estas frukto de la komplekso de kondiĉoj, meze de kiuj la homo naskiĝas, vivas, disvolviĝas, agas aŭ eltenas efikojn, kreas kaj konsumas havaĵojn, lernas, luktas, revas, ĝuas aŭ suferas. Sed la homa naturo estas kontraŭdira kaj kompleksa. Tial, ne nur la senestrecaj ideoj sed ankaŭ la aŭtoritataj ideoj same fontas el la homo.

La instinkto de memkonservado kaj la seksa instinkto neprigas reciprokan lukton, kiu aperas en diversaj kaj multaspektaj formoj; ili estas fonto de aŭtoritato. La historio de la homaro estas plena de tiaj pereigaj manifestiĝoj. Ĝuste tiuj manifestiĝoj de instinkta aŭtoritato estas fontoj de la aŭtoritataj ideoj, hodiaŭ esprimitaj en kompleta filozofio, kiu metas la instituciojn super la homo, la formulojn super la vivo, kreas kulton al la ŝtato, kaj transformas la homon en objekton, aŭtomaton, regaton.

La sento de libereco, unuflanke, kiu ne kontraŭas al la instinkto de memkonservado kaj ne nur ne kontraŭsta-

ras la lukton sed eĉ ofte ĝin kondiĉas; la socia instinkto, aliflanke, kiu ankaŭ ne kontraŭstaras la memkonservadan instinkton, sed ĝin plivastigas kaj donas al la lukto aliajn formojn kaj aliajn sencojn, estas esencaj fontoj de la ideoj pri senestreco.

De tiu vidpunkto la tuta homara historio lumiĝas dife–rence de la historio instruita en la ŝtataj lernejoj. La disvolviĝo de la homo kaj de la homsocio en daŭro de mil jaroj okazis sub la signo de tiuj du principoj: unuflanke, la lukto por regpovo, por konkero, konservo kaj plivastigo de la privilegioj kaj materialaj havaĵoj hereditaj aŭ konkeritaj, kiuj ĉiam firmigas la potencon de la homo super la homo; aliflanke, la lukto por libereco mensa aŭ materiala, religia aŭ politika, ekonomia aŭ sociala, persona aŭ kolektiva; lukto por defendo de la sociaj institu–cioj certigantaj ĉi tiun liberon, aŭ kontraŭ tiuj, kiuj ĝin subpremas; lukto de individuoj aŭ de pli–malpli gravaj grupoj, organizoj, klasoj, socioj kaj de tutaj civilizacioj, kiuj ofte pereis, aŭ saviĝis, sed eltenante la pereigajn konsekvencojn de tiu lukto.

Du fundamentaj tendencoj karakterizas ĉiujn homsociojn de antikva orienta epoko ĝis hodiaŭa tempo. La unua estas la popola, tiu de vastaj homamasoj, kiuj kreas riĉaĵojn, tiu de saĝuloj, poetoj, pentristoj, skulptistoj, arkitektoj ktp. Ĝiaj fruktoj estas popolkutimoj, sur kiuj masoniĝas ĉiuj sociaj institucioj: la klanoj, kampara komunumo, civitoj, folkloro, la saĝeco de la jarcentoj kaj la tuta spirita kaj materiala kulturo, kiu modlas la fizionomion de l' tero. En tiu tendenco trovas sian originon la senestrecaj ideoj. La alia tendenco estas la kontraŭpopola –tiu de la magiistoj, orakoloj kaj pastroj, de la nobe-

loj, kiuj konservas kaj transdonas la leĝojn kaj malnovepokajn tradiciojn, de la militestroj posedantoj de la armil– kaj venksekretoj. El tiu tendenco nutriĝas ĉiu aŭtoritata ideo.

Tiel, la senestreca penso estas daŭriganto de la popolaj tradicioj; senestreca filozofio estas filozofio de la popo–la kutimjuro kaj natura rajto; dum aŭtoritata penso estas heredanto de la perfortrajto, de la ruzulo, de la leĝadmiranto, afero de la privilegiaj malplimultoj.

Sed ankaŭ la kutimjuro, la popolaj tradicioj suferas mal–noviĝon, rigidiĝon, kaj ili transformiĝas ne malofte en neadon de la progreso, en obstaklon al la evoluo, al la kreskanta spirita kulturo, al la kreskanta liberneceso. Tiam venas la *protesto*, la *ribelo* kontraŭ malnoveco, konservatismo, mumiigo. Tiu ribelo estas persona aŭ kolektiva. Tamen ne ĉiam la ribeluloj estas portantoj de io esence nova. Iuj el ili deziras purigadon de la kutimoj kaj institucioj por certigi pli grandan efikon en la konservado de la individuaj kaj sociaj interesoj. Ili strebas forigi ĉiujn malhelpojn for de la vojo al evoluo kaj libero; ili strebas neniigi naskiĝantajn formojn de regpovo, kaj tial ili estas *revoluciaj*. Meze inter ili naskiĝas anarkiaj ideoj. Aliaj volas reformi la malnovajn kutimojn kaj instituciojn por de ĉi–lastaj plene »liberiĝi« kaj trudi personan aŭtoritaton. Inter ili troviĝas la antaŭuloj de ĉiuj HITLERoj kaj STALINoj –de ĉiuj diktatoroj.

La liberecana idealo ĉerpas sian spiritnutraĵon –sukon de la eterna kaj neestingebla impeto de la popoloj al *li–bereco* kaj *sendependeco*– el la persona aŭ kolektiva *ribelo*, kontraŭ ĉia subpremado, superrego, kontraŭ ĉia privilegio, kiu ĉiam transformiĝas en superregon. La se-

nestreca penso enradikiĝas en la ribelo, en la protesto, en la *kritiko*, en la neado de ĉio malnova kaj eksvalida, kiuj enkarniĝas en Satano laŭ la bibliaj legendoj, en Prometeo laŭ la greka mitologio. Ties portantoj estas la ĉiuepokaj sektoj, kiuj aperas, kiel tipa esprimo de la spirita ribelo. Ĝiaj martiroj estas la ĉiuepokaj herezuloj, bruligataj sur brulŝtiparoj aŭ vivante palisumataj. La anarkiisma penso manifestiĝas en definitiva formo en la mondkoncepto kaj agado de la bogomilanoj, albigensoj, husanoj, anabaptistoj.

Reprezentantoj de senestreco estas *plebanoj*, kiuj en antikva Romo *unuafoje en la historio* efektivigas la *ĝeneralan* strikon kaj ĉesigas ĉian vivon, forlasinte la urbon, disiĝinte de la patricioj, tiel devigante ĉi–lastajn cedi.

Senestreco en la historio estas reprezentita per agado de la *kamparanaj insurekcioj* kontraŭ servut–reĝimo, per la sekcioj de la *granda franca revolucio*, en la julia revolucio de 1830, en la februara de 1848, malgraŭ tio, ke ĝi havas ankoraŭ la formon de la nekonscia senestreca agado. Elementojn de ĝi ni ankaŭ havas en la *Pariza Komuno*, jam esprimo de taktiko lumigita de la ideoj de PRUDONO kaj BAKUNINO.

Alia fonto de la senestrecaj ideoj estas la *filozofio* de saĝuloj el diversaj epokoj spegulintaj la popolajn aspiradojn: LAO TSE el antikva Ĉinio, la egipta gnostikulo KARPOKRATO el Aleksandrio, ANTIFONO kaj ZENONO el antikva Grekujo; verkistoj kaj pensuloj el pli nova tempo: RABELEZO, FENELONO, LA BOESI, enciklopediistoj el la 18a jarcento kaj speciale DIDEROTO kaj ceteraj.

Tria fonto de la senestrecaj ideoj estas la Scienco per ties atingaĵoj kaj malkovroj.

Kaj malgraŭ ĉio, ĉiuj ĉi fontoj ne sufiĉas por vivigi bonkonstruitan doktrinon pri socia reorganizado. La teknika, ekonomia, materiala kaj spirita progreso en la fino de la 18a jarcento kaj dum la 19a venigis sur la mondscenejon novan kaj ĉie pli kaj pli klare formiĝantan kaj ekkonsciantan klason. *La proletaro kaj la luktoj*, kiujn ĝi gvidis dum la tuta unua duono de la 19a j. finludis decidigan rolon de akuŝisto de la senestreca mondkoncepto.

Unua esprimanto de la senestreca doktrino (1791) estas William GODWIN (1756–1836) en la libro: *Esploroj pri la justeco en politiko kaj ĝia influo sur la virto kaj universala feliĉo* (XIII – 895 p.); dua estas PRUDONO (1809–1865) en la libro: *Kio estas proprieto?* aperinta en 1840.

Sed la formado de donita ideo en iun doktrinon ankoraŭ ne estas sufiĉa, por ke oni kalkulu kun ties realizo. Necesas *organizado*, necesas *movado*. La rektan originon de la senestreca movado oni devas serĉi en la Unua Internacio kaj pli speciale en la Pariza Komuno. Kreinto, organizinto kaj plej bona esprimanto de tiu movado aperas Mikaelo BAKUNIN (1814–1876). Ĝis li, anarkiismo estas nur iu filozofia tendenco, pli literatura manifestiĝo ol senpera sociala agado. Per Bakunin anarkiismo aliformiĝas en revolucian socialismon, en social–revolucian movadon.

Kaj ĉi tie, lastloke laŭ vico en la traktaĵo, sed ne laŭ graveco, venas la rolo de la *teoriistoj*. Ni ofte jam diris, kaj nun subtenas, ke senestreco ne estas laboratoria produkto; sed tio ne signifas, ke ĝi estas frukto de memek–

ĝermo, ke la rolo de la teoriistoj estas sensignifa. De longtempe la ideoj svebas en la atmosfero, ili manifest–iĝas, ili montras sian ĉeeston, sed de tiam, ĝis kiam ili trovos iun belaranĝitan formon, ĝis kiam ili trovos siajn profundajn esprimantojn, ilia influo ne povas stabiliĝi.

Aliaj teoriistoj de senestreco, kiuj plenevoluigis kaj riĉigis la anarkiisman penson estas: Petro KROPOTKIN (1842–1921), Enriko MALATESTA (1853–1932), Elizeo RECLUS (1830–1905), Karlo KAFIERO (1846–1892), Saverio MERLINO, Johano GRAV, Rikardo MELJA, Pietro GORI, Karlo MALATO, Anselmo LORENZO (1841–1914), Luiĝi FABRI, Rudolfo ROKER (1873–1958), Petro RAMIS, Kristian KORNELISEN, Maks NETTLAU (1865–1944), James GUILLAUME, Sebastiano FAURE (1858–1942), k. a.

* * *

En la posta ĉapitrovico ni traktos la bazajn elementojn, kiuj konsistigas la ideologion, taktikon kaj konstruan programon de senestreco.

Estos trarigardataj jenaj problemoj: libereco, solidareco, egaleco, justeco, libera iniciato, libera kontrakto, federismo, aŭtoritato, ordonpovo, perforto, ekspluatado, milito, centralizismo, ŝtato, proprieto, eklezio, parlamento, leĝo, tribunalo, mallibero, polico, armeo, imposto, mono, lernejo kaj scienco, arto, gazetaro kaj radio, organizado, striko, bojkoto, sabotado, ribelo, insurekcio kaj revolucio, (libera komumo kaj federacio, produkorganizado, distribuo, diversaj unuiĝoj).

# Senestrecaj principoj

## Libereco

La libereco estas biologia neceso, leĝo de la vivo; la vivo mem. Ĉiu viva estaĵo, eĉ la plej malsupera, celas, kvankam plej ofte nekonscie, al libero. Eĉ en la vegetaĵaro la vivimpeto estas ekvivalento de la liberimpeto. La ĝermo, kiu elvenas el la grajno, puŝas, sublevas, flankenmetas malhelpojn, aŭ traiĝas kaj kurbiĝas antaŭ nesupereblaj baroj kaj serĉas liberan vojon. La malgranda insekto limigita en siaj movoj, kaptita, surpaŝita, enfermita, tiras, puŝas, senĉese serĉas liberiĝon, krias, mordas, pikas, baraktas por almiliti sian liberecon. Estas sovaĝbestoj, kiuj, ĉe plej bonaj materialaj kondiĉoj kaj plej diligentaj zorgoj flanke de la homo, neeviteble mortas, kiam ili estas senigitaj je libero.

En la historio de la homa socio la libereco, la strebo al libero kaj la porlibera batalo determinas kaj karakterizas la tutan disvolviĝon de la homaro. Libereco estas ĉefa faktoro de la progreso. Neniam la homo por ĉiam resignaciis, kiam la libero estis de li forprenita. La sklaveco, kiom ajn daŭra, kiom ajn firmigita kaj sekurigita ĝi estis de la piedpremintoj de la libero, ĉiam finiĝis per liber–iĝo. Kiom da fortostreĉo, kiom da sangoversoj, kiom da viktimoj kostis rekonkerado de la libereco! Sed neniu, anticipe mezurinte la kvanton da elversota sango, iam haltis pro la viktimoj, ĉar la libero mem estas la plej alta

prezo de la vivo, kaj la vivo mem fariĝas por ĝi rimedo.

Kiel kondiĉo en la sociaj rilatoj libereco ĉiam signifis progreson, floradon de la kulturo kaj prosperon en ĉiuj sferoj de la sciado kaj homagado. La epokoj de libereco estas la plej lumaj en la homhistorio. Ĝis hodiaŭ mem ĉio kreita en la sfero de la sciencoj kaj artoj dum la antikve grekaj respublikoj, kiam la libero de la civitanoj estis alte aprecata, daŭre restas la bazo de ĉiuj sciencaj disciplinoj. La plej grandaj eltrovoj en scienco kaj tekniko ekaperas en la mezepokaj civitoj.

En la homa socio, same en la pasinteco kiel hodiaŭ, la plej karakteriza strebo, de ĉiuj homoj el ĉiuj klasoj kaj sociaj tavoloj, estas la aspiro al libero. Eĉ la plej abo–menindaj tiranoj estas kapablaj kompreni la prezon de la libero, kiam ili estas je ĝi senigitaj. Eĉ la plej grandaj tiranoj, tiam ili batalis por la libero, kompreneble por libero sia, ŝajnis veraj batalantoj kaj revoluciuloj, kaj sukcesis trompi la popolojn. Ĉu ne estis la fiera kaj kuraĝa Napoleono simbolo de la revolucio kaj de la batalo por libereco, antaŭ ol li superregis Eŭropon? Ĉu li ne plor–ĝemis, la sama tiu ĉi Napoleono, por la libero, por libero sia, kiam li troviĝis sur Sankta Heleno? Ĉu ne tiuj estis antaŭe la plej kuraĝaj antaŭvenantoj, kaj defendantoj de la libero, kiuj pli malfrue starigis la gilotinon, kiel purgatorion kaj sanktan lokon? Se ni povus scii la intimajn sentojn de MUSOLINI en la minuto, kiam li devis ekpen–di kun la kapo suben, certe ni trovus la saman plorĝemon por la libero, por la libero de tiu ĉi, kiu plej malnoble kaj plej senskrupule ĝin piedpremis daŭre, multe da jarojn post kiam li vendis ĉion, kion li posedis el socialismo?

Jes, la homo –tirano aŭ sklavo– scipovas apreci la liberon, sed liberon *sian*. Li estas pri tio tute konscia, nur kiam li ĝin perdas. Atingi ĉi tiun superegan saĝecon, identigante sian liberecon kun alies libereco, signifus ĉesi esti sklavo aŭ tirano kaj fariĝi homo libera, t.e. liberecana.

La strebo al libero karakterizas ne nur la individuon, sed ankaŭ la homgrupojn unuigitajn laŭ materialaj aŭ spiri–taj interesoj, ligitajn profesie, religie, sente, ekonomie, teritorie, vivmaniere, etne, nacie, k.c. La grupoj kaj asocioj luktas por sia libero en la kunloĝejo; la kunloĝejo batalas por sendependeco, kio signifas liberon rilate al pli supera administra unuo; la komunumoj batalas por sia aŭtonomio, kio signifas por sia libero rilate al la ŝtato; la popoloj luktas por sia nacia libero; klasoj batalas kontraŭ aliaj klasoj kaj sociaj tavoloj por sia libero; individuoj kaj civitanoj, organizoj kaj partioj batalas por politika libero; la homoj de scienco kaj arto serĉas sian liberon por krei kaj esplori; lernantoj kaj studentoj depostulas liberon; modernaj pedagogioj levas la infanliberon al la plej grava principo de instruado kaj edukado –libero, libero, ĉiuj celas al libero, almenaŭ por si; oni parolas por libero, levas la liberon al celo de sia agado, al tasko de sia vivo! Ĉu estas io pli universala ol strebo al libero en la tuta kosmo?

Sekve, estas klare, ke la *libero* estas iu *principo*, kiu staras, skribita sur mŭltaj standardoj, kiu leviĝas kiel programcelo de multaj sociaj movadoj. Ĝi estas tiom universala principo, ke sen ĝia aplikado certaj homagoj fariĝas neeblaj, kaj identiĝas kun la libero mem. Tiel estas la kazo de la moderna edukado; tiel estas la kazo de l’

arto. Laŭ la koncepto de la nuntempaj modernaj pedagogoj kaj artistoj, ne estas edukado nek arto sen libero, ekster la libero. Tamen, ĉiuj sociaj movadoj, kiuj enskribis en sian programon kaj sur sian standardon la liberprincipon, ne fakte estas veraj adeptoj de la libereco en la praktikado de la vivo. Tiuj ne povas esti veraj partianoj de la liberprincipo, kiuj samtempe akceptas ankaŭ la aŭtoritato–principon, eĉ sub modera formo. Aŭtoritato kaj libero estas principoj neakordigeblaj, nerepacigeblaj. Ĉia aŭtoritato laŭdifine, esence kaj en sia manifestiĝo, estas neado, limigo de la libero. Sekve, la konflikto ĉe la plej bona kaj sincera deziro estas neevitebla.

Tiurilate la diferenco inter aŭtoritatuloj kaj anarkiistoj estas kvalita, fundamenta, profunda. Sole nur *anarkiismo* estas la plena esprimo de la libero–principo; nur ĝin oni povas konsideri, kiel *filozofion de libereco*. Sole nur la anarkiistoj estas veraj, logikaj kaj plenaj adeptoj de la libero; nur ili estas la veraj portantoj de la libero.

Tial, ne estas hazarde, se en la latinaj lingvoj, la nomo »Anarkiisto« identiĝis kun la termino *liberecano* defendanto aŭ partiano de la libero. La vorton »libertaire« en la franca, kaj »libertario« en la hispana kaj itala –kiujn bulgare oni tradukas ordinare »senestrecano«– en ĉiuj latinlingvaj enciklopedioj kaj vortaroj oni donas kiel sinonimon de »anarkiisto«.

For de ni la intencon aserti, ke inter la adeptoj de aŭtoritata principo ne ekzistas sinceraj partianoj de la libero. La diferenco inter aŭtoritatuloj kaj anarkiistoj pri tiu punkto ne kuŝas en la sincereco de la intencoj kaj deziroj. Ĝi estas multe pli profunda, ligita al la esenco mem de la faktoj, dum, por la adeptoj de la aŭtoritata princi-

po, la libero en la plej bona okazo –kiam ili estas sinceraj defendantoj– estas nur *celo*, plej ofte fora celo, por la anarkiistoj, fundamenta principo de ilia doktrino la libero estas en la sama grado kaj *celo* kaj *rimedo*, *tasko* kaj *vojo*, *regulo same en internaj reciprokaj organizaj rilatoj, kiel ĝenerale en la ĉiutaga vivo, en la rilatoj al la aliaj, al socio*.

La historia sperto kaj la ĉiutaga praktiko pruvis, ke iluzie estas kredi, ke per limigo aŭ piedpremo de la libero oni povas realigi la liberon. Nur ties *plena uzado* en la vivo kaj en la ĉiutagaj rilatoj estas garantio, ke oni venos ĝis plena realiĝo de la socia libereco. Ĉiu, eĉ provizora, transira limigo, prokrasto de la praktikado de la libero, ĉiu uzado de aŭtoritato kiu substituiĝas al la libero pro kia ajn motivo, neflekseble kondukas al pluigado de la liberlimigo, al la firmigo de la aŭtoritato, kio tradukiĝas per la subpremado kaj finatingas la tiranecon.

La libero ne agnoskas, ne toleras limigon. Nur la neprecizeco kaj malriĉeco de la homlingvo trudas al ni paroli pri la liberlimo en certa senco. La libero ne estas la nura principo en la reciprokaj rilatoj. Ĝi ne povas esti rigardata *izole*, kaj el inter la aliaj principoj, kiuj kondiĉas tiujn rilatojn. Konsekvence, se oni parolas pri la limoj de la libereco, tio estas por esprimi tiun harmonion en la aplikado de ĉiuj principoj kondiĉantaj la ensocian vivon.

## Solidareco

Simile al la libero, la solidareco estas ankaŭ biologia neceso, instinkto kaj leĝo de la vivo. La manifestiĝoj de sociemo, interhelpo, solidareco kaj oferemo de la individuoj por la aliaj, en la grupoj, familio, komunumo, en la

specio en besta mondo, estas konstatitaj en ĉiuj tempoj. Ĉiam ilin montris la naturesploristoj kaj vojaĝantoj; filozofoj jam de antikva Grekujo faris sintezojn bazitajn sur interhelpaj kaj solidarecaj faktoj; poetoj el ĉiuj tempoj ilin prikantis. Sed kiel unua, DARVINO en sia libro *Origino de l'homo* prezentis tiujn manifestiĝojn, kiel esence havantajn karakteron de biologia leĝo. Pli malfrue KROPOTKIN, en defendo de la darvinismo kontraŭ ties misformantoj, dediĉis sin elĉerpe studi tiun specon de manifestiĝoj, kaj en sia libro  argumentis novan doktrinon biologian, kiu fariĝis fundamento de 1a tuta anarkiisma doktrino*.

Efektive, la fundamenta kono de la vivo de ĉiuj specioj de la zoologia ŝtuparo –speciale de la insektoj (abeloj, formikoj, termitoj, kaj tiel plu) ĝis la plej supera besto: la homo– ebligas konstati la gigantan gravecon de interhelpo, de socia instinkto, de solidareco. Ofte ĉe iuj specioj interhelpo aperas eĉ kiel supera faktoro paralele kun la batalo pro ekzistado inter diversaj specioj. Tiu socia instinkto –kiu kelkfoje alprenas vastajn dimensiojn kaj aperas ankaŭ kiel la plej potenca rimedo de tiu lukto– garantias ne nur efikecon kaj sukceson, sed ankaŭ sekurigas la progresan disvolviĝon de tiuj samaj specioj.

En la homara historio, la praktiko de interhelpo, solidareco kaj asocio same liveris brilan postsignon, manifestiĝinte plej ofte paralele kun la libero. La epokoj de plej granda persona kaj socia libero estas ĝuste tiuj de plej granda socia solidareco.

Pro tiom da paralelismo inter libereco kaj solidareco en

* Vd. *Interhelpo kiel faktoro de progresiva disvolviĝo* de P, Kropotkin.

la homa socio, estas substrekinde, ke ili kunmiksiĝas en komuna manifestiĝo kaj prezentiĝas kiel du flankoj de unu sama fenomeno. Libero sen solidareco estas neebla; solidareco sen libero montriĝas nepensebla en socio, kiu disvolviĝas kaj prosperas en sia ekonomia kaj kultura progreso. La respublikoj de antikva Grekujo, la epoko de kampara komunumo, kaj pli malfrue la mezepokaj liberaj civitoj kun sia kompleksa kaj interplektita reto de plej diversaj asocioj por plej variaj celoj, sin ofte sternintaj sur la intemacia tereno, estas la plej elstaraj ekzemploj de alte manifestita socia solidareco, akompanata de universala progreso.

Novtempe la kooperativo, kiu unuigas centojn da milionoj da homoj en la mondo kun sur loka, nacia kaj eĉ internacia formoj, kaj ampleksas la plej diversformajn aktivecojn; la laboristaj asocioj, kiuj same kunigas milionojn da homoj sur la tuta terglobo; ĉiaj aliaj asocioj de loka, nacia kaj internacia karaktero, por la kontentigo de la plej diversaj bezonoj, aŭ kreitaj por la plej diversaj taskoj, kiuj ofte unuigas la homojn laŭ korporacioj aŭ klasoj, por ke ili konduku batalon unuj kontraŭ aliaj, estas ankaŭ nerefutebla pruvo pri ekzisto de la solidareco, kiu, instinkta ĉe la bestoj, transformiĝas ĉe la homo en volitan kaj konscian agadon.

La socio kiel tuto neniam ĝis hodiaŭ sukcesis realigi la solidarecon inter ĉiuj siaj membroj; tion oni ne povas kontesti. La socio, de kiam ekzistas premado kaj ekspluatado, ĉiam estis dividita en kastojn kaj kontraŭecajn grupojn, kategoriojn, klasojn interbatalantajn: regantoj, subpremantoj, ekspluatantoj kaj regatoj, subprematoj, ekspluatatoj, kaj ĝuste tiu divido malhelpas la socian so-

lidarecon, kaj ankaŭ la socialan, kulturan kaj materialan progreson de la socio.

La socio –hodiaŭ antagoniste pli ol iam– estas dividita en klasoj; divido malutilas al la homaro, ĉar ĝi ne permesas la realigon de la universala homa feliĉo.

Sed nek en la historia pasinteco, nek hodiaŭ, la domaĝa divido sukcesis plene neniigi la instinkton de interhelpo, la senton de solidareco, la spiriton de asocio. Eĉ ankaŭ kiel batalrimedo de sociaj kategorioj, la solidareco potence manifestiĝas en ĉiuj socioj, inkluzive de tiuj, en kiuj iu partia aŭ persona diktaturo strebas al neniigo de ĉia solidareco, anstataŭante ĝin per kazerna reĝimo. Plie, la socia instinkto estas tiom profunde enradikiĝinta en la homo, ke iafoje ĝi nevole transsaltas la limojn de la divido kaj manifestiĝas inter homoj el diversaj klasoj, kiuj tamen konservis iun komunan karakterizaĵon –la bildon de homo. Sen idealigi tiujn izolajn kazojn, nek doni al ili la aspekton de principo, ni ne povas –eĉ ankaŭ la plej partia kaj fanatika adepto de la klasbatalo– refuti, ke la ĉiutaga vivo liveris multe da tiaj faktoj de socia interhelpo inter homoj el diversaj sociaj grupoj, eĉ militantaj inter si, faktoj gloritaj kaj prikantitaj de la artistoj. Tiuj manifestiĝoj estas signifoplenaj precipe dum periodoj de komunaj plagoj kaj katastrofoj: tertremoj, inundoj, hajloj, incendioj, militoj, k.t.p.

Sekve, neniu povas nei, ke, kiel libereco, *solidareco estas same principo* en la sociaj rilatoj, agnoskita de multaj, ankoraŭ proklamita de la franca revolucio en fama formulo : »libereco, frateco, egaleco«, kaj hodiaŭ surskribita sur multaj standardoj de partipolitikaj organizoj.

Solidareco estas ankaŭ unu el la bazaj principoj de anarkiismo. Konvenas agnoski, ke, kvankam la solidareco estas vaste praktikata en la reciprokaj rilatoj de la anarkiistoj, eĉ multe pli vaste ol inter ĉiuj aliaj homoj, fakto agnostata eĉ de iliaj malamikoj, en la propagando de la anarkiismaj ideoj tiu principo estas ĝis certa grado ombrita de la preferoj al libero. Kaj tio estas facile klarigebla. En la socia vivo ofte okazas, ke la reago kontraŭ larĝe disvastigita fenomeno (t.e. la subpremado) iras ĝis troa emfazo de ties kontraŭo (la libero). La libero estas tiom tretata, ke la anarkiistoj, ĝiaj solaj fidelaj kaj konsekvencaj defendantoj, skizas sin en sia propagando ĉefe per sia batalo por libero. Kaj pro certaj negativaj montriĝoj, tio donis motivon al iuj anarkiistoj, eĉ konsideri la liberon preskaŭ kiel unikan principon de la senestreca filozofio.

La vero, se ni povas permesi al ni gradigon, estas, ke solidareco en la anarkiisma koncepto okupas unuan lokon, kaj ke ĝi karakterizas multe pli tiun filozofion, ol la libero, sen ke eblas, kompreneble, kontraŭmeti ambaŭ principojn. Se oni devas senestrecon karakterizi per du vortoj, ili sendube estas: filozofio de la solidareco kaj de la libereco. Tiel estas laŭ la opinio de la teoriistoj. Kaj GODVIN, kaj PRUDON, kaj BAKUNIN, kaj KROPOTKIN kaj ĉiuj aliaj teoriistoj de la anarkiisma socialismo, difinante sian vidpunkton fronte al la nun superregantaj konceptoj kaj sistemo, prenis kiel deirpunkton la neceson starigi solidarecon por certigi la individuan liberon.

BAKUNIN, kategorie esprimante tiun penson, multfoje emfazis en siaj libroj, prelegoj kaj leteroj: »Solidareco estas la unua leĝo, libero la dua.« Kaj KROPOTKIN ne

nur multfoje esprimis la saman penson, sed li ankaŭ nutris ĝin per la plej larĝa argumentado en ĉiuj siaj verkoj, precipe en *Etiko* kaj *Interhelpo*. Laŭ li, kaj tio estas la koncepto de hodiaŭaj anarkiistoj, la garantio por realigi la estontan socion, en kiu la libero trovos sian plej plenan aspekton, kuŝas en la homa sociemo, kiu transformiĝas en konscion, bazon de nova moralo, sen kiu la socia vivo estas neebla.

## Egaleco

Egaleco proklamita, kune kun libero kaj frateco, fare de la granda franca revolucio, estas nekontesteble principo de sociaj rilatoj, kaj ne nur por la anarkiistoj, kiuj ĝin konsideras kiel la fundamentan principon de sia socia doktrino. El la buŝoj de multaj ni hodiaŭ aŭdas prononci senĝene tiujn tri tiel enhavoriĉajn kaj esprimplenajn vortojn: »liberecon, fratecon kaj egalecon«, kiel kanton, kiel mondkanzonon. Ankoraŭ pli, tiuj tri vortoj ornamas eĉ la enirejon de iuj publikaj konstruaĵoj kiel iu kruela ironio de la historio. Tiuj grandaj principoj de la homprogreso perdis per trouzado sian veran sencon. Sed se la libero kaj la frateco, aŭ pli precize la solidareco, ne estas tute senigitaj je sia vera enhavo, kaj havas certan kvankam limigitan sencon por tiuj, kiuj arbitre ornamas sin per ili, ne tiel estas pri egaleco. Cetere, al la nocio egaleco neniam estis donita ĝia vera senco, eĉ dum la tempo de la granda franca revolucio. El la famaj grandaj nomoj, nur tiun de MARAT oni povas ligi kun iu pli preciza kompreno de egaleco. Por ĉiuj aliaj la proklamado kaj serĉado de egaleco neniam iris pli fore ol egaleco antaŭ la leĝoj. Ĉiuj, kiuj parolis kaj parolas pri egaleco, ne enmetas en tiun principon alian enhavon, krom laŭleĝa,

jura kaj abstrakta. Nur en la koncepto de la anarkiistoj, en ilia sociala programo, la principo de egaleco trovas plenan, verecan kaj realan esprimon. En tiu trilogio »libereco, solidareco kaj egaleco«, egaleco por anarkiistoj havas unuarangan kaj determinitan karakteron. La libero neniam povas esti tute reala, se mankas reala egaleco, egaleco en la materialaj kondiĉoj de la vivo. Se ni akceptas, ke la ideala, politika demokratio realiĝu, ke efektiviĝu plena egaleco de la civitanoj antaŭ la leĝoj, ke ideala konstitucio aplikata de same *idealaj* »organoj de la *ideala«* demokratia ŝtato absolute garantiu la plenan juran egalecon, la efektiva egaleco eĉ en tiu kazo fariĝos iluzio, se tiam daŭre ekzistos la materiala neegaleco. La privata proprieto, la kapitalismo privata kaj ŝtata ĉiam akompanata de monopolo, privilegioj kaj hierarkio kreas materialan neegalecon. Kian realan valoron povas havi por proleto, por malriĉa kamparano, por eta oficisto kaj metiisto, ilia egaleco–rajto, fronte al la kapitalisto, al la granda proprietulo, al la industriisto, al la supera burokrato, se ili ne havas egalan kaj realan eblecon plene kontentigi siajn materialajn kaj intelektajn bezonojn? Tiu egaleco povus esti enskribita en la libroj per oraj literoj, povus esti garantiita de anĝeloj kaj ĉefanĝeloj, prikantita sur ĉiuj vojoj kaj krucvojoj, en ĉiuj parlamentoj kaj tribunaloj, ĝi restus iluzia tiom longe dum ne ekzistos ekonomia egaleco.

Solidareco neniam povas esti natura, senĝena kaj plena, sen egaleco. Kvankam profunde biologia bezono, la solidareco en la socia vivo estas influata de la socia strukturo, determinita de la rilatoj, kiuj karakterizas la socion, kaj alprenas formojn determinitajn de tiuj rilatoj.

Tiom longe dum la socio daŭre estos dividita en klasoj de regantoj kaj regatoj, de privilegiuloj kaj senrajtigitoj, de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj; tiom longe dum la homoj restos dividitaj per kompleksa sistemo hierarkia, kreanta tutan piramidon de sociaj tavoloj kun kontraŭecaj interesoj, la socia solidareco neniam povos realiĝi kiel universala principo.

Neniu pli bone tion esprimis ol BAKUNIN, difinante la gravecon de egaleco, kiel neanstataŭebla principo de socialismo: »Libereco sen socialismo (t.e. sen egaleco) signifas privilegion kaj maljustecon«.

Kaj tiel, por anarkiismo kaj la anarkiistoj, egaleco aperas ne nur kiel natura rajto, kiun neniu homa leĝo garantias, sed kiu plej ofte estas de la leĝo piedpremita, nekonsiderata, kaj kiu kontraŭas al la proprietrajto kaj principe de socia hierarkio sanktigitaj de ĉiuj konstitucioj de la mondo. Ĉi estas la rajto de libera aliro de ĉiuj homoj al ĉiuj naturaj bonaĵoj kaj al libera utiligo de ĉiuj materialaj kaj intelektaj akiraĵoj de la socio, fruktoj de la nemezureblaj penadoj de milionoj da homoj kaj de nenombreblaj generacioj; sed egaleco estas ĉefa kondiĉo por certigi la socian kaj individuan liberecon kaj la rilatojn de plena socia solidareco, kiel de naskiĝo kaj tenado de la sento de justeco, fundamento de la socia moralo kaj de ĉia homa etiko ĝenerale.

Jarcentoj da sklaveco kaj ekspluatado, da subpremado kaj maljusteco lasis la plej profundajn postsignojn en la homkonscio koncerne la egalecon, kaj reduktis ĝis minimumo ties manifestiĝojn en la homrilatoj. Dum la konscio pri libero kaj sento de solidareco plumanifestiĝas gravmaniere sub unu aŭ alia formo, la sento pri egaleco

inter la homoj senteble difektiĝis. Sed tamen ni trovas ĝin respegulitan en diversaj religioj –primitivan filozofion de homoj el nememoreblaj tempoj– en multaj sektoj per kiuj reagis la spirito de la primara kaj pura vero de la religia filozofio kaj precipe en la kristanismo kaj en la kristanaj sektoj el diversaj epokoj. Ni retrovas ĝian manifestiĝon en la kamparana komunumo, en la slava famili–komunumo (»zadrouga« slave), en la diversaj frataroj, unuiĝoj kaj asocioj de la mezepokaj liberaj civitoj. Ni trovas restaĵojn de tiu sento de egaleco en iuj popolaj tradicioj kaj popoldiroj. Ne mankas fine manifestiĝoj de konceptoj kaj de sento pri egaleco ankaŭ en la homrilatoj eĉ en la hodiaŭa socio tiel profunde dividita kaj disŝirita pro konstantaj kontraŭecoj. Sen atribui troan gravecon al tiuj lastaj faktoj, kiuj, oni devas ĝin konfesi, havas izolan karakteron, ni ne povas ne konstati, ke la plugo de la komercaĉa spirito kun la disvolviĝo de l' kapitalismo ne atingis tian gradon, ke ekzemple la homoj estas pesitaj per pesilo antaŭ ol envagoniĝi, envaporŝipiĝi, enaviadiliĝi, enaŭtobusiĝi, kaj pagi transportajn taksojn konforme al sia pezo. Io pli, ĉiuj vojaĝantoj estas egale traktataj rilate al pakaĵo senpage transportebla; ankaŭ tio valoras iagrade por la peraviadilaj vojaĝoj. Egala traktado aplikiĝas same en la lernejoj, kie la klerigo ĝis fiksita aĝo estas absolute senpaga, kaj per diversaj socialaj kriterioj fariĝas materiale ebla por ĉiuj infanoj, eĉ ankaŭ por tiuj de la plej malriĉaj gepatroj. La publikaj bibliotekoj estas alia brila manifestiĝo de egaleco en la kadroj de la hodiaŭa rabema socio. Ĉiu povas hodiaŭ libere kaj senpage utiligi la sociajn bibliotekojn je egalaj kondiĉoj. Ĉe iuj grandaj okcidenteŭropaj bibliotekoj estas eĉ specialaj oficistoj, kiuj donas eblecon utiligi bi-

bliotekojn el aliaj urboj kaj landoj, kies deziritaj libroj estas transsenditaj al donita loka biblioteko, kie ili restas dum fiksita tempo, postulante neniun pagon por tiu servo. Tiu rajto estas egala same por princo kaj kapitalisto, kiel por la lasta proleto. Fakte, la materialaj vivkondiĉoj estas ja diversaj, do diversaj estas la ebloj pri la libera tempo, kiun oni dediĉas al vizito al tiuj bibliotekoj. Sed rilate tion, troviĝas ankaŭ novaj formoj de utiligo de bibliotekoj per enkonduko de la koresponda utiligo per tiel nomataj transporteblaj bibliotekoj. Egala kaj nelimigita estas en iuj urboj utiligo de la akvo en la hejmoj. La saman principon oni aplikas ankaŭ en restoracioj rilate al pano, kiun oni ne pagas aparte, kaj kies kvanto estas nelimigita por la konsumanto. Multe da tiaj faktoj oni povas nombri. En multaj okazoj ili respondas pli al neceseco teknika aŭ komercaĉa, ol al sento de egaleco; sed malgraŭ ĉi tio ili estas pruvoj, kvankam vere sensignifaj, pri ekzisto de la sento de egaleco.

Sed kio estas egaleco? Ankaŭ pri tiu demando la diferencoj inter la anarkiistoj–socialistoj kaj la aliaj socialistoj estas profundaj. Por la anarkiistoj egaleco ne estas kvanta, sed morala nocio: ĝi koincidas kun la rajto de vivo. La marksisma socialismo kaj komunismo estas antaŭ ĉio produkta sistemo, dum la anarkiisma komunismo estas ĉefe distribua, konsuma. Post kiam anarkiismo neas la parazitismon, alidirite la rajton vivi je fremda kosto, certigas per la monopolo super la rimedoj de produktado, interŝanĝado kaj dispartigado, t.e. post kiam ĝi proklamas la neceson de socialigo de tiuj rimedoj, ĝi lokas sur la unuan rangon ĉies rajton ĝui ĉiujn materialajn kaj intelektajn havaĵojn konforme al siaj bezonoj,

kun la sama natura devigo partopreni en la produktado de tiuj havaĵoj laŭ siaj fortoj kaj kapabloj. La kontentigo de la bezonoj estos tiom pli plena, kiom pli alta estos la produkta kaj teknika nivelo. La utiligo estos plena kaj nelimigita por la produktoj, kiuj estos en sufiĉa kvanto. Koncerne ĉiujn aliajn bezonojn, la socio zorgos pri la havebla kvanto, kaj ilia dispartigo estos farita laŭ la grado de la bezonoj.

Por anarkiistoj egaleco ne estas aritmetiko, apotekaj pesiloj; kvankam ili sin apogas sur la socia ekonomio, por ili egaleco ankaŭ ne estas ekonomio, sed etik–morala principo. La anarkiisma  socialismo estas etika principo; tiu tendenco manifestiĝas eĉ en la hodiaŭa socio kaj ĉe homoj, kiuj ofte havas neniun nocion pri socialismo. En la okazoj de manko, de nesufiĉeco, de plagoj, kaj en la socio, kaj en la familio, ĉe distribuo de nesufiĉaj havaĵoj preferon oni donas ne al tiuj, kiuj havas la plej grandajn meritojn pro sia produktado, sed al infanoj, malsanuloj, maljunuloj, virinoj, malbonfartantoj. Ankaŭ tie ĉi anarkiismo aperas pli proksima al la homoj, pli natura ol kalkulanta socialismo, kiu gvidis al monstra staĥanovismo, al vetlaborado miksita kun partia falsado kaj la neado de ĉia humaneco levita ĝis alteco de superega principo.

La vera egaleco ne praviĝas per meritoj, kvalifiko, kapabloj, hereditaj aŭ akiritaj rajtoj kaj hierarkio, sed per absoluta agnoskado de la neŝanĝebla valoro de ĉia homa estaĵo. La vera egaleco tuŝas ne nur la materialan sed ankaŭ la moralan sferon de la homaj manifestiĝoj; ĉia subpremo, ĉia servutemo, ĉia subtaksado aŭ supertaksado de la individuoj, signifas neadon de la egaleco. Ĝi estas konscio pri digno, kiu, sen rifuzi la respekton al

homa individuo, malestimas ĉian aŭtoritaton. Jen pro kio, la vera egaleco estas antiaŭtoritata, senestreca; kie estas aŭtoritato, regpovo –tie ne estas kaj ne povas esti egaleco.

## Justeco

»La justeco –diras PRUDON, fondinto de la anarkiisma doktrino– estas mezuro de ĉiuj homaj agoj«. Kaj fakte por ĉiuj anarkiistaj teoriistoj, la justeco estas la deirpunkto, la baza ŝtono de la socia konstruaĵo. La titolo mem de la libro, en kiu GODWIN unuafoje elmetas senestrecajn konceptojn, pri tio atestas: *Esploroj pri la justeco en politiko kaj ĝia influo sur la virto kaj universala feliĉo*. »La justeco, skribas li, enkalkulas en si ĉiujn moralajn devigojn... La universala justeco kaj reciproka utilo pli forte unuigas la homojn ol kia ajn subskribita kaj sigelita pergameno.« Ĉe PRUDON ne estas verko, en kiu justeco ne prezentas ĉeftemon de lia penso, kaj speci–ale tri grandvolumoj estas dediĉitaj al *Justeco en la revolucio kaj en la eklezio*. BAKUNIN siavice konsideras la homan justecon »ununure agnoskita de ni«. KROPOTKIN, kiu kronis sian vivon per gravega esploro pri la moralaj instruoj de ĉiuj tempoj –*Etiko*– donis senmortan formulon de la moralo tiel: »Sen egaleco ne estas justeco; sen justeco ne ekzistas moralo«.

La sento de justeco estas profunde enradikita ne nur en la konceptoj, sed ankaŭ estas parto de la ĉiutaga vivo de la anarkiisto. La belga sociologo kaj filozofo, profesoro AMON tion konstatas en sia libro Psikologio de la anarkiisto–socialisto, kiu prezentas fundan kaj dokumento–plenan esploron de la senestreca psikologio.

Sed kio estas justeco? Justeco estas identigo de l' homo kun la aliaj. Justeco signifas meti sin sur alies lokon, »enigi en alies haŭton«, meti signon de egaleco inter mi kaj la aliaj, kaj fari al si devigan regulon, ke tion oni faru al aliaj, kion oni deziras por si mem. Tiu regulo kuŝas sur la fundamento de ĉiuj religioj kaj estas konata de ni pere de kristanismo –regulo tiel simpla, tiel kompren–ebla de ĉiuj homoj, sed tiel malfacile aplikebla. »Ne faru al aliaj tion, kion ci ne deziras, ke ili faru al ci« aŭ kiel KROPOTKIN ĝin ankoraŭ pli bone klarigis, donante al ĝi, anstataŭ negativa, pozitivan karakteron: »Faru al aliaj tion, kion ci deziras, ke ili faru al ci *ĉe 1a samaj cirkonstancoj«*. Ĉu estas pli perfekta regulo de konduto, pli perfekta kaj pli justa, se ni povas tiel diri, ol tia justeco?

Se la homoj sin gvidus en ĉiuj siaj agoj per tiu regulo, ĉiuj malbonoj, ĉiuj malfeliĉoj, ĉiuj suferoj malaperus el la tero. La aŭtoritato, la leĝoj, la juĝejo, la malliberejo, fine la ŝtato ruiniĝus; la maljustaĵoj ĉesus, la ekspluatado, subpremado, milito, mortigo, venĝo, malamo transformiĝus en nur malagrablan rememoron. Bono kaj malbono, belo kaj malbelo, krueleco kaj humaneco, malamo kaj amo kaj multnombraj aliaj komune uzataj nocioj akirus realan valoron. Homo iĝus efektive saĝa. Mezuri per la sama mezuro kiel por si mem, tiel ankaŭ por la aliaj – tio signifus ne nur neniam fari, sed kaj eĉ neniam pensi kaj deziri al iu malbonon. Identigi la aliajn kun si mem, signifas starigi unuecon en la mondo, harmonion sur la tero; la limojn inter »mi« kaj »ci« malaperigi, estigi eternan komunikadon de homo al homo esprimatan per bonaj pensoj, bondeziroj, bonfarado.

Ĉu estas ebla, ĉu estas realigebla tio, aŭ ĉu nur sonĝo

de pro revemo malsanaj cerboj, ĉu fantazioj, vizioj de senekvilibraj ermitoj kaj asketoj? Ĉu ekzistas, almenaŭ enĝerme, simila sento ĉe la homo, kaj se »jes«, el kio ĝi originas, de kie ĝi venis kaj kiel enradikiĝis en la homa animo?

Justeco estas morala nocio, morala principo. Kaj moraleco, kiel konate, akompanas la homon dum lia tuta evoluo, de la simio ĝis DARVINO, de ADAMO ĝis KROPOTKIN. Ne estis, ne estas kaj ne povas esti socio sen moralo. Ja ekzistis socioj kun TAMERLANoj, MAKIAVELoj, CEZARoj, HITLERoj, MUSOLINIoj, STALINoj, ankaŭ hodiaŭ estas iliaj heredantoj, kiuj volas piedpremi kaj neniigi ĉian moralon, sufoki ĉian senton de justeco, sed ili ĉiam finiĝis kaj finiĝos per fiasko. En la homarhistorio, ju pli ni estis malproksimaj de la »*jarcento de racio*«, des pli la morala sento, la moraleco kunfandiĝis kun la religio, ĉar la religio en sia ekĝermo estis nenio krom primitiva filozofio, provo interpreti la kosmon kun ties kompleksaj fenomenoj kaj starigi kondutregulojn por defendo kaj memkonservo de la homa speco vivanta en socio. Ĉu tamen sekvas el tio, ke la fonto de moralaj ideoj kaj sentoj, pli speciale la fonto de la justeco, estas la kredo je Dio? Ĉu tio signifas, ke la moralo havas supernaturan, diecan originon? La legendo pri kreinto kaj kreitaro estas tute senbaza, ĉar se oni akceptas la ekziston de kreinto kaj kreitaro, la vera kreinto estas la homo kaj Dio ties kreitaĵo.

La scienco pri moralo, starigita jam laŭ la plej sendisputa maniero, asertas ke tio, kion oni akceptas nomi moraleco, moralo havas tri gradojn de manifestiĝo: la unua, la plej simpla, la plej natura, la plej universala, propra al

la bestoj vivantaj en socio, estas interhelpo –la socia instinkto; la dua grado propra al la homo, estas frukto de la intelekta sintezo, kondiĉita de la socia instinkto, kaj rezulto de observado kaj eksperimento –tio estas la justeco ĝuste dirita; la tria kaj plej alta grado estas memofero, en kiu ekfloras la riĉeco de la spirito, la riĉeco de viveca energio.

Justeco, kiu ĉi tie estas nia studobjekto, havas kiel senperan fonton la senton de simpatio, aperantan eĉ ĉe la bestoj. Simpatio estas la unua paŝo al interproksimiĝo, la unua flamo, kiu degeliĝas la barilon inter »Mi« kaj »Ci«, la instigo al identigo de la alia kun »mi«. Tio estas facile konstatebla de ĉiu el ni en la fluanta vivo. Sendube, ni pli inklinas esti justaj al tiuj, kiuj inspiras al ni certan simpation ol al tiuj, kiuj estas al ni fremdaj, indiferentaj kaj malajmikaj. En la ĉiutageco, per la multfoja ripetado kaj ekzercado de la sentoj de simpatio, nature kaj senĝene oni venas al transformo en regulon de tio, kio parte manifestiĝas nur kiel sento, alidirite al transformo de sento en principon. Tiel naskiĝis kaj stariĝis la justeco, sed tute ne laŭ sugesto »*de l' ĉielo*«.

Natura laŭ sia origino, justeco –bazo de ĉia moralo– neniam ĉesis montriĝi en la daŭro de la tuta homhistorio, neniam malaperis, nek malaperos. Ĝi elmontriĝas hodiaŭ mem, eĉ en rabema socio, kie la dominantaj institucioj ĉion faras por disbati la ligilojn de reciprokeco inter la homoj, kaj por aliformigi ĉi–lastajn en »lupojn unu por alia«. Sendispute, la komprenpovo pri justeco dum jarmiloj fervore, insiste, sisteme sufokita, estas grave malakrigita, multe pli ol libero, solidareco kaj eĉ ol la sento de egalecoj; malgraŭ ĉio ĝi ne estas neniigita. Ĝi

neniam ĉesis esti principo en la interhomaj rilatoj, kaj sur ĝi konstruiĝas kutimoj, popolkutimoj, moroj, kiuj reprezentas eĉ hodiaŭ la neskribitajn leĝojn regantajn multe pli grave la homsocion ol la miloj da skribitaj leĝoj nekonataj ofte eĉ de la specialistoj–juristoj.

Anarkiismo, kiel filozofio kaj doktrino pri la socia rekonstruo, kiel programo kaj agado, kiel batala kaj socia movado, levas alte la principon de justeco, ĉerpinte ĝin el la jarmila historio kaj praktiko de la sociaj rilatoj, kaj ĝin metas en la fundamenton de la socia rekonstruo, kiun ĝi celas efektivigi per organizita kaj decidiga agado de la sklavigitaj kaj senrajtigitaj homamasoj.

## Libera iniciativo

La plej por la popolamasoj pereiga konsekvenco de la potencuzado konsistas en tio, ke ĝi faras ilin pasivaj, indiferentaj, kaj mortigas ĉe ili la iniciatemon. La aŭtoritato kreas unuflanke ŝafgvidantojn, aliflanke gregan amason. Siavice, la gregeca, pasiveca, apatieca psikologio kreas favoran medion –necesan kondiĉon– por la disvolviĝo, diskresko kaj multobligado de la aŭtoritat–bacilo.

Sen grego ne estiĝas potenco. LA BOESI antaŭ kelkaj jarcentoj trovis la fonton de la aŭtoritato en »libervola servuto«.

Konsekvence, la manifestiĝo de aktiveco, iniciativo, aktiva sinteno fronte al la homoj kaj la institucioj estas ekneado de la ordonpovo. Iniciativo estas la plej efika kontraŭveneno en la batalo kontraŭ tiu terura epidemio nomita aŭtoritato. La Sankta Skribo komenciĝas per fama penso: »En la komenco estis la Vorto«. En la dekadenca biblio de PŜIBIŜEVSKI al la Vorto substituiĝas la sekso.

La biblio de ĉiu aŭtoritatulo komenciĝas per alies submetiĝo, obeemo, senagemo, indiferenteco. Se la anarkiistoj havus sian biblion, ĝi devus komenciĝi tiele: »En la komenco estis iniciativo, kaj la iniciativo estis faro, kaj la faro estis en la iniciativo, ĉar la iniciativo estas neado de la subiĝo, kaj sen subiĝo, sen blinda kaj pasiva sekvado al la gvidantoj ne estas aŭtoritato. Kaj tiel iniciato signifas kontraŭpasivecon, kontraŭsenagemon, kontraŭaŭtoritaton, t.e. senestrecon«. Jen kiun grandegan, nemezureblan, neanstataŭeblan gravecon havas iniciativo; la libera, spontanea kaj aktiva iniciato estas por la anarkiistoj nepre necesa kondiĉo por realigo de la anarkiistaj rilatoj, socia principo sen kiu, en la homa socio samkiel en la ĉiutagaj homaj rilatoj ne povas malaperi la aŭtoritato. »Anarkiistoj estu iniciatemaj kaj aktivaj, por esti efektive anarkiistoj!« —jen la unua postulo, kiun anarkiismo metas antaŭ siaj adeptoj. »Homoj de la laboro, homoj, estu aktivaj, prenu ĉiam en viaj manoj viajn proprajn farojn por esti liberaj!« —Tion instruas anarkiismo al tiuj, kiujn ĝi vokas al nova mondo de bonstato, paco kaj libereco.

Nekontesteble iniciativo, rigardate kiel ununura principo, estas ankoraŭ ne sufiĉa por determini la senestrecan karakteron, la senestrecan enhavon de la agoj; kiel ankaŭ la strebo al libero, rigardate aparte kaj izole, malkonkorde kun la aliaj principoj, kiuj konsistigas la fortikan bazon de vera homa etiko, ne estas sufiĉa por eviti la sklavecon inter la homoj. Ofte okazas, ke la homoj kun granda iniciatemo estas ĝuste tiuj ĉi, kiuj fariĝas gvidantoj, ordonantoj, aŭtoritatuloj, tiranoj kaj diktatoroj. Bremso kontraŭ tiu pasio de gvidanteco, regpovo

kaj aŭtoritato povas esti nur iniciato de aliaj homoj, de ĉiuj homoj. Sed se la manifestiĝo de iniciativo ne estas sufiĉa por ke ekzistu senestreco, senestreco ne estas ebla sen manifestiĝo de iniciativo. Homoj sen iniciativo ne estas, ne povas esti kaj neniam fariĝos anarkiistoj, ĉar ili ĉiam bezonas, bezonos la fremdan iniciativon — iniciativon de la homoj, kiuj kondukas ilin je la nazo. La loko de la homoj sen iniciativo estas inter la sklavoj, kaj la sklavoj ne povas esti akuŝistoj de la libereco.

Ĉu ekzistas libera iniciativo kiel principo, kaj el kio eligis ĝin la anarkiistoj ?

Senestreco ne estas dogmo, ne estas skolastiko. Nek el–pensita principo aplikota aŭ trudota. Kiel ĉiuj aliaj principoj, tiel ankaŭ la principo de libera iniciativo estas de la anarkiismo konstatebla en la vivo, kaj el ĉi–lasta eligebla por inkludiĝi en sistemo de organizado de la homaj rilatoj. La elmontriĝo de iniciativo, kvankam sub formo de instinkto, estas propra al la tuta animala mondo. Ekzemplo de tia manifestiĝo estas arigo de la bestoj en socioj, aŭ ilia unuopiĝo, aŭ disigo en parojn, grupojn laŭsezone, laŭ ordono de la bezonoj de nutraĵo, de sekureco por plenumi naturajn funkciojn, aŭ simple por havigi ĝojon kaj amuzon. Tiel estas la manifestiĝoj de la cervoj, kiuj kolektiĝas je gregoj por transpasi kune grandajn riverojn, post kio ili denove diskuras. Tiel estas la konduto de l’ birdoj, kiuj ĉe proksimiĝo de la aŭtuno, antaŭ eĉ reala malvarmetiĝo, ekgrupiĝas kaj kune flugas ĉiam pli ofte por fine formi flugantarojn pretajn al migrado.

Ĉe la homo, nature, la manifestiĝo de iniciativo estas ankoraŭ pli ofta fenomeno, kaj ĝi alprenas konscian for-

mon, tiom pli konscian, ke li en sia historia kaj kultura disvolviĝo kiel kolektivo, kaj en sia intelekta perfektiĝo kiel individuo malproksimiĝas de sia besteca origino. Sen manifestiĝo de iniciativo la homa socio estus tute neebla. Kaj elmontriĝo de iniciativo estas nepre necesa kondiĉo por ĉiu progreso en la scienco, en la tekniko, en la socia vivo. Se ne estus iniciativo, ne estus povintaj ekzisti KRIST0, BRUNO, GALILEO, PESTALOCIJ, FERER, NEŬTONO, PASTEŬRO, EINŜTEJN, GARIBALDI, BAKUNIN, MAĤNO, DURUTI, bogomilismo, reformacio, franca revolucio, kristanismo, socialismo kaj senestreco. Se ne estus iniciativo, la Historio ne estas vidinta la Unuan Internacion, la kooperativan movadon, la milionojn da sindikataj organizoj, kiuj unuigas la laborulojn, produktantojn, konsumantojn; nek la vaporŝipon, la trajnon, la aviadilon, la radion, la televidon kaj ... la atombombon, bedaŭrinde.

Nekontesteble, iniciativo, libera iniciativo spontanee manifestita estas fakto, principo, kiel en la naturo, tiel ankaŭ en la homa socio —en la pasinteco kaj en la nuntempo. La tasko de la anarkiistoj estas certigi al ĝi ankoraŭ pli larĝan kaj pli plenan manifestiĝon en la estonteco, metante ĝin en la fundamenton de la socia dinamiko. Kaj malgraŭ ĉio la manifestiĝo de iniciativo neniam estis universala, nek sufiĉe intensa, ĉar alie nek ALEKSANDRO la Makedona, nek ĜINGIS–ĤANO, nek KALIGULO, TAMERLANO, nek la CEZARoj, nek PETRO la Granda, nek KAPOLEONO, nek HITLER, nek MUSOLINI, nek STALIN estus eblaj; ĉar alie la ŝtato, kapitalismo, kolonia kaj socia sklaveco antaŭlonge estus malaperintaj.

La libera iniciativo, fonto de kreado, kondiĉo por ĉiu–

flanka disvolviĝo, estas baza principo en la organizaj ri–latoj de la anarkiistoj. Ĝia plena manifestiĝo estas ebla nur en foresto de regpovo. Konsekvence, la vera libera iniciativo, kiel nelimigita kaj spontanea manifestiĝo de la homa volo, en individua kaj kolektiva senco, havas nenion komunan kun la tiel nomata, tro laŭdata de la kapitalistoj, »*privata iniciativo«*, post kiu kamufliĝas nur la ekspluatantaj apetitoj, kiuj volas eternigi la monopolon super la produktrimedoj por plenmano da privilegiuloj. Por la granda plimulto da homoj plene senigitaj aŭ limigitaj en la rajto disponi la produktrimedojn, senigitaj je la plena posedo de siaj laborfruktoj —senigo kaj limigo kiuj certigas ĉian ekspluatadon de la homo fare de l' homo, kaj ĉian aŭtoritaton, ĉian dominadon super la homo— por la laboruloj, por la popolamasoj, tiu ĉi »*privata iniciativo«* signifas nenion alian, krom la necesa kondiĉo destinita limigi, malakrigi kaj mortigi la liberan hominiciativon.

## Libera kontrakto

Ĝis hodiaŭ la homsocio konas nur tri principojn por la organizado de reciprokaj rilatoj. La unua —*la aŭtoritata* — apogas sin sur la leĝo kaj sur ĉiuj institucioj de trudo kaj perforto, kiuj devenas de ĝi. La homo–civitano, membro de kia ajn socio, akceptante la principon de aŭtoritato, estas devigata procedi tiel, kiel la leĝoj ordonas al li; kontraŭokaze, minacas lin la puno: la skurgo de la polico, la verdikto de la juĝisto, la karcero de la mallibereja gardisto. La nocioj pri bono kaj malbono, pri honesteco kaj malhonesteco, pri homeco kaj kontraŭhomeco, akiras sian enhavon laŭ senco kaj *ordonoj* de la leĝoj. Tiel, la homo vidas sin »liberigita« de la bezono mani-

festi konscion pri devo, pri moralo, pri justeco, pri socia solidareco; al la konscio substituiĝas ĉe li la puntimo. Kiel stimulo, kiel faktoro de la homagoj sufiĉas timo. Ju pli forta estas la aŭtoritato, des pli granda la timo de la puno, kiun ĝi estas kapabla trudi; ju pli certigita estas *»la socia ordo«* despli garantiita estas la *»socia harmonio«*.

La dua *—individuisma principo—* estas la homkonscio de la libera persono. Ekzistas neniaj devigoj, neniaj normoj, neniaj sinligoj de la individuo al la socio. Sufiĉas la plena konscio de la individuo, por ke ĉi–lasta agu tiel, ke nenio povas domaĝi alies interesojn kaj rajtojn. Kiam ĉiuj agas sammaniere, la socia ordo, la plej supera socia harmonio de la libereco, estas sufiĉe certigita. Ni fidas al la homo kaj estas konvinkitaj, ke lia konscio progrese disvolviĝos proporcie al lia liberiĝo el la danĝera influo de la privata proprieto, de la ŝtato, religio, milito kaj de ĉiuj institucioj de la hodiaŭa aŭtoritata kaj kapitalista socio, kiel ankaŭ de la restaĵoj de la sklaveca pasinto, kiuj ne malaperos enmomente en socialisma socio. Sed ni ankaŭ estas konvinkitaj —studinte la malsimplan, daŭre pli komplikiĝantan organizadon de la sociaj rilatoj—, ke eĉ ce la plej progresinta kaj la plej perfekta individua konscio, ĉi–lasta neniam sufiĉos por garantii regulan, plenan kaj por ĉiam integralan socian harmonion.

Restas la tria principo, la *principo* de la anarkiistoj–socialistoj —tiu de la libera kontrakto. Konforme al tiu ĉi principo la bazo de la sociaj rilatoj estas reciproka kaj konscie akceptita promesligo. Nur tia libera kaj konscie akceptita promesligo estas kapabla garantii la liberecon, la solidarecon, la egalecon, la justecon kaj la libe-

ran iniciativon; nur ĝi estas kapabla same certigi la elmontriĝon de la konscio, disvolvi tiun konscion kaj kontroli, ĉu ĝi ŝanceliĝas kaj montras antaŭsignojn de dekadenco.

Tio ĉi estas la fundamento de anarkiismo, kaj ĝi devas esti komprenata ne nur de ĉiuj homoj fremdaj al la senestreco, sed kaj precipe de la anarkiistoj mem. *Anarkiisto, kiu ne sindevigas kaj ne plenumas sindevigojn, bezonas aŭtoritaton*. Kaj se la konscio havas por anarkiistoj ian realan valoron —kaj ĝi efektive havas tian, kaj ili tion multfoje pruvis en la praktiko— ĝi manifestiĝas ĝuste en tio, ke ili donas esceptan rolon al la reciprokaj sindevigoj —je la kontrakto— kaj tiamaniere faras el la aŭtoritato superfluan principon, same en siaj personaj kaj organizaj manifestiĝoj, kiel ankaŭ en la socio, kiun ili propravole kaj konscie antaŭe akceptis.

PRUDON kiel unua starigis la principon de la kontrakto kaj faris ĝin bazangula ŝtono de la tuta sia doktrino. Kaj en tio kuŝas lia plej granda merito, kiel fondinto de la senestreco.

Post li BAKUNIN ankoraŭ pli bone atentigis speciale pri la specife senestreca senco de la *kontrakto kiel manifestiĝo de libera homa volo konscianta la neceson de socio*. Kiel por PRUDON, tiel ankaŭ por BAKUNIN la kontrakto devas havi *devigan karakteron* —devigo en la kadro de la libereco, konsekvence devigo kun *provizora* karaktero. »La forto de la kontrakta devigo —asertis BAKUNIN— estas limigita. La devigo eterna ne povas esti agnoskita de la homa justeco, ĉiuj rajtoj kaj devoj baziĝas sur la libero.«

KROPOTKIN, akceptante la saman principon kun ĝia kondiĉa devigo kaj ĝia libera karaktero, siavice findisvolvis la ideon pri libera kontrakto, donis al ĝi sciencan pravigon kaj, kvazaŭ por sin distingi de PRUDON kaj BAKUNIN, nomis la kontrakton »*libera interkonsento*«.

En kio konsistas kaj kiel devas esti komprenita la principo de libera kontrakto aŭ de libera interkonsento; kiel devas esti komprenita ĝia *libera* kaj samtempe *deviga* karaktero?

La libera kontrakto, aplikata egale en la ekonomiaj rilatoj, en la politikaj, sociaj kaj kulturaj manifestiĝoj homaj, en limigita aŭ en larĝa dimensio, prezentas juran bazon de libera senestreca socio. Homoj havante intereson komune fari decidojn starigas formojn de interrilatoj pri difinitaj, provizoraj aŭ longdaŭraj taskoj, determinas laŭ libervola konsento siajn rajtojn kaj reciprokajn devojn. Ĉiuj tiuj decidoj devontigas nur tiujn, kiuj ilin akceptos. Sed post akcepto ili fariĝas devigaj tiom longe dum tiuj, kiuj libervole sin devigis, *ne deklaras, ke ili rezignas* same la rajtojn, kiel la devojn priskribitajn en la libera kontrakto. Do la devigo ne nur ne estas eterna, ĝi eĉ ne etendiĝas sur la tuta anticipe interkonsentita limtempo por tiuj, kiuj rezignus antaŭ la finiĝo de la kontrakto; sed ĝis kiam ili ne ĝin plenlibere rezignas kaj ĉe egalaj kondiĉoj, tiu ĉi kontrakto restas por ili deviga.

Ĉu ekzistas tiu ĉi principo en la nuntempa socio, ĉu ĝi manifestiĝis en la historio de la homaro, aŭ ĉu ĝi estas frukto de teoria sintezo?

Doni kompletan kaj definitivan respondon al tiu ĉi demando signifus rakonti la historion de la mezepokaj libe-

raj civitoj, de ties multnombraj kaj plej diversaj asocioj pli–malpli longdaŭraj por plej diversaj bezonoj; signifus same trarigardi paŝon post paŝo la ekĝermon kaj evoluon de la kooperativa movado, de la laboristaj profesiaj organizoj, de la Ruĝa Kruco, de la diversaj humanecaj organizoj kaj aliaj plej diversaj asocioj; trastudi la ekaperon kaj evoluon de multaj internaciaj ekonomiaj kaj aliaj organizoj, de la fervojaj kaj aliaj internaciaj interkomunikigoj ktp, ktp —laboro, kiun multego da progresemaj historiistoj kaj sociologoj jam efektivigis; speciale KROPOTKIN majstre tion prezentis en siaj libroj kaj ĉefe en *Pano kaj Libero*, *La moderna scienco kaj anarkio*, kaj *Interhelpo*, al kiuj ni direktas niajn legantojn.

Senkonteste ĉiuj tiuj ekzemploj, kiujn oni povas montri same en la historio kiel ankaŭ en la nuntempo, havas nur karakteron de ekzemploj, nenion pli. Ili ne estas kaj povas neniaokaze servi kiel modeloj, ĉar ili portas la difektojn de la socia medio, en kiu ili naskiĝis. La estonteco kaj nur la estonteco kreos la perfektajn formojn de la libera kontrakto.

## Federismo

La pridiskutitaj unuaj kvin principoj de la senestreco: libero, solidareco, egaleco, justeco kaj libera iniciativo trovas sian kunordiĝon, harmoniiĝon en la libera kontrakto, principo, kiu prezentas juran bazon de la senestreco kaj la formon, en kiun enfluas la homaj rilatoj alprenante karakteron de sistemo, de organismo.

Federismo ja prezentas tiun gravan principon, kiu donas vivon al tiu ĉi organismo. Ĝi prezentas la dinamikon, la manieron funkciigi la socion, certigantaj la liberon, soli-

darecon, egalecon, justecon, la iniciaton personan kaj kolektivan kaj la liberajn interkonsentojn inter la homoj vivantaj en socio. La enhavo determinas la formon. La formo sufokas la enhavon, se ĝi ne kongruas kun ĝi. La enhavo disbatas la formon, se ĉi–lasta kontraŭas al ĝi, kaj ĝi serĉas sian formon. Se ĉi tiuj bazaj principoj de senestreco (kies manifestiĝojn ni trovas en ĉiuj socioj kaj tempoj kaj eĉ ankaŭ en la animala regno) ne povis realiĝi ĝis hodiaŭ en sia pleneco, estas pro tio ke la formo kaj funkciado de la sociaj rilatoj kontraŭis al ili kaj ilin sufokadis. De tio, oni klare komprenas, kiom granda kaj ekskluziva estas la graveco de la federismo kiel principo de konstruo kaj funkcimaniero de la socio.

La principo de federismo pliampleksiĝas kaj trovas apli–kon eĉ en la neorganika mondo, alprenante karakteron de universala principo en la naturo. Kiel KROPOTKIN majstre tion montris kaj pruvis, federismo en pli nova tempo iĝis baza principo de la homa scio, principo de la modernaj scienco kaj filozofio. Viktimoj kaj sklavoj de sia propra elpensaĵo —Dio— el nememoreblaj tempoj la homoj vivis kun erara ideo pri la kosmo, vidante en ĉio kaj ĉie simpligitan skemon de »*centro kaj periferio*«. La centro, la sumo, la granda dimensio estas la fonto de l' forto, energio kaj vivo. La periferio estas respeguliĝo. Ĉio komenciĝas ekde la centro kaj iras al la periferio. Ĉio ĉirkaŭiras la centron, subiĝas al, determinas sian pozicion laŭ, kaj dependas de la centro. En la imago pri kosmostrukturo la tero estis ĝis la 16–a jarcento konsiderata kiel la centro. Ĉio videbla en la Universo ĉirkaŭiris la teron, submetiĝis al ĝi kaj ekzistis nur por ĝi —la suno, luno, steloj, planedoj. Poste oni komprenis, kaj es-

tis konstatite de la astronomoj, ke la tero prezentiĝas kiel nur sablero en la kosmo, kompare ekzemple kun la suno, ĉirkaŭ kiu ĝi fakte rondiras. Oni konstatis same, ke la suno ne estas unuanura, ke multego da aliaj sunaj sistemoj ekzistas; kompare kun ili, ĝi prezentiĝas kiel nur sensignifa stelo. Sekvante ĉi tiun vojon de la disvastiĝo de siaj scioj kaj vizioj pri strukturo de la Universo, la astronomoj konstatis, ke ties senlimeco, samkiel nova principo de interrilatoj inter ties konsistpartoj, atingas al neado de la ideo pri centroj. La scienca serĉado forlasis siajn preferojn al la *grandaj ensembloj* kaj turnis sian rigardon al la konsistpartoj, vidante ĉiam pli kaj pli fore al la nemezureblaj eretoj. Tiel oni konstatis, ke la universala gravito ne prezentas skemon de »centro kaj periferio«, sed ke ĝi estas *rezultanto* de senlima nombro da fortoj interagantaj kaj kontraŭagantaj, kie ĉiu parteto —eĉ la plej mikroskopa inter la miliardoj da nemezureblaj eretoj, kiuj plenigas la universon— havas sian lokon, gravecon kaj influon.

Tiu ĉi nova vizio pri la mondo, tiu ĉi rigardo super la aĵoj, tiu ĉi nova sinteno antaŭ la fenomenoj perceptitaj pere de niaj sensorganoj, larĝiĝis super ĉiuj sciencaj esploroj kaj etendiĝis super la tuta neorganika kaj organika materio, ampleksante ankaŭ la homsocion kaj nian internan mondon.

Ne plu estas hodiaŭ scienca disciplino, kiu ne sekvas tiun vojon de serĉado pri la konsistaj partoj, pri la unuo, nemezurebla ereto, kaj kiuj ne deziras trovi la konsistigantojn eĉ de tiuj nemezureblaj eretoj. Iu spiritostato ema al individuiĝo, malcentralizo kaj esploro pri »*rezultantoj«*, pri dinamikaj, moveblaj rilatoj , karakterizas la

tutan nuntempan sciencon, kaj naskas novan filozofion, en kiu la iama ideo pri »Centro« jam ŝanĝiĝis al nocio pri *senlime nemezureblaj eretoj*. En tio ĝuste konsistas la principo de federismo, principo kiu trovis la lastan sian konfirmon en la scienca sukceso diserigi la atomon, kaj tiel detrui la ideon pri »Centro«.

Tiumaniere la principo de federismo —unu el la funda–mentaj principoj de la senestreco— iĝas universale agnoskita principo de la Universo kaj de la vivo. Sed la homaj ideoj estas ankoraŭ sklavaj de la centralizisma skemo, la homlingvaĵo, elforgita en la daŭro de la jarcentoj sub la subpremado de tiu skemo devenanta de la ideo pri Dio —la plej granda, la ununura centro, ĉefcentro, la komenco kaj la fino de la universala vivo— estas ankoraŭ tro malriĉa por esprimi en konvenaj terminoj la esencon mem de la federisma principo. Ni plu vidas nin devigataj uzi analogiojn kaj terminojn, kiuj, komprenitaj en sia laŭlitera senco, ne permesas al ni realigi plenan rompon kun la ideo pri centro, kaj de tie ankaŭ pri *hierarkio*. Tiel, ekzemple, dezirante prezenti federismon en pli simpla kaj pli komprenebla formo, ni ofte diras: »*de sube al supre, de la periferio al la centro, ekde la privata afero al la ĝeneralaj ktp*«.

Kiel pli precize difini la principon de federismo? *Ĝi estas la principo, kiu certigas la plenan manifestiĝon kaj la plenan disvolviĝon de la homa persono, manifestiĝo kaj disvolviĝo harmoniigitaj kun la plej alta evoluo de la memvola asocio en ĉiuj manifestiĝoj por ĉiuj celoj kaj por kontentigo de ĉiuj bezonoj*. Tio signifas, ke ĉia iniciato devas starti de la aparta unuo–individuo en la grupo, kaj primara grupo aŭ unuiĝo en la ĝenerala kolektivo —

provante kunordiĝi, unuiĝi kaj grupiĝi kun la sama iniciato de ĉia alia unuo, cele al pliiĝo de sia forto, larĝigante kaj pliigante siajn rimedojn.

Atinginte la plej plenan esprimon de la kolektiva harmo–niigo laŭ la linio de la praktikata funkcio aŭ en la terito–riaj limoj, kie la senpera partopreno de la unuo estas ebla, tiu iniciativo sen senpersoneciĝi aŭ forviŝiĝi en la kolektiva tuto, rezultanto de ĉiuj iniciativoj, transiras en pli larĝan teritorian stupon por harmoniiĝi kun la similaj iniciatoj en tiu larĝigita kadro kaj atingi la plenan kunordiĝon sur granda teritorio anticipe determinita aŭ akceptita (regiono, lando, kontinento aŭ la tuta terglobo). Atinginte la celitan plenan harmoniiĝon, la iniciato de la unuo –individuo aŭ grupo– ne nuliĝas, ne solviĝas en simpla aritmetika sumo, ne transformiĝas en komandantan kaj determinantan centron, sed en »*rezultan–ton*«, por malkomponiĝi denove trairante la malan vojon, kaj veni ĝis la viveca, reala kaj dinamika unuo, kie la iniciato alprenas formon de memvola, konscia, libera *devontigo*, aŭ de devigo. Ne estas periferio, ne estas centro, estas nur sennombraj koordinatoj, eterna movado, manifestiĝo de milionoj da voloj, kies tuto, kolektivo ne estas adicio sed sistemo de permanentaj rilatoj, de konstanta movado de unuo al unuo —senlima konstelacio, ĉirkaŭiranta la senlimecon en kiu ĉiu stela polvero sekvas sian propran orbiton— *rezultanto* de agantaj kaj kontraŭagantaj fortoj kaj la universala orbito de la konstelacio, rezultanto mem de tiaj nenombreblaj fortoj.

Federismo aplikata en la homa socio estas tiu principo kiu, agnoskinte la liberon de la unuo–individuo unue, kolektivo poste —kiel fundamentan, precipan kaj absolute

ne anstataŭeblan principon de l' homa disvolviĝo— certigas la firmiĝon, diskreskon kaj plivastiĝon de la libero per la solidareco ebla dank' al egaleco, justeco kaj aktiva, atentema iniciativo, ĉiuj —libero, solidareco, egaleco, justeco kaj krea iniciativo— jam proklamitaj, konscie akceptitaj kaj konfirmitaj en la libera kontrakto.

El kie estas eltirita la principo de federismo? Ĉu gi ekzistas en la vivo, en la homa socio, en la estinteco kaj nuntempo, aŭ ĉu ĝi estas nur principo pruvita kaj akceptita de la scienco kaj filozofio en ties serĉado de la eterna vero? Federismo havas siajn profundajn radikojn en la biologia bezono de la kunvivado, de la kuniĝo, de la kunordiĝo de la individuaj fortoj por certigi la memkonservon de la individuo kaj de la specio. Federismo en la historio de la homaro manifestiĝas paralele kun la sociemo. Ju pli forte kaj ju pli larĝe kaj potence manifestiĝas ĉi–lasta, des pli ebla estas la manifestiĝo de la unua, kaj inverse ju pli la federismo —nepre necesa kondiĉo por manifestiĝo de la homlibero— estas reala, des pli ebla estas la sociemo kaj kun ĝi la spirita kaj materiala progreso. Ankaŭ ĉi tie la liberaj mezepokaj civitoj, ofte prenitaj de ni por ekzemplo, montriĝas kiel kunvivantaro kaj kiel periodo el la homhistorio, dum kiu federismo trovis la plej larĝan aplikon, ĉiuj tiuj multnombraj kaj plej diversaj unuiĝoj interne de la sama civito, kiel ankaŭ inter la apartaj civitoj–respublikoj, kovrantaj la tutan mediteranean kaj okcidentan Eŭropon kaj parton el Ruslando, per diversaj unuiĝoj funkciantaj sur la bazo de la libera kontrakto kaj federisma principo estas la plej konvinka ekzemplo pri socia ekflorado materia kaj kultura, kiu estas ebla dank' al la federismo.

Federisme trovis ian aplikon malgraŭ granda misprezenta formo en Usono, Svisujo k.a. Hodiaŭ ĝi estas moto en la programo de multaj politikaj partioj. La ideo pri unuiĝinta Eŭropo pretendas pri federisma principo. Konsekvence »federistoj« ne mankas hodiaŭ meze de tiu mondo dividita en eterne malpacantaj naciaj ŝtatoj kaj ŝtatetoj.

Tamen, kiel la aliaj fundamentaj principoj —natura manifestiĝo de la vivo— tiel la federismo starigas kontraŭ si malamikajn fortojn en la nuntempa socia sistemo, kiuj malhelpas al ĝia plena realiĝo. Kiuj kaj kiaj estas tiuj malamikaj fortoj, ni tion vidos en la sekvantaj ĉapitroj.

## Senestreco

La ĝis tie ĉi pritraktitaj sep principoj estas tiom naturaj, karakterizaj kaj distingaj de la senestreca koncepto en komparo kun ĉiuj aliaj sociaj kaj filozofiaj konceptoj, ke ili kun plena rajto povas esti konsiderataj kiel *fundamentaj principoj* de anarkiismo. Iliaj historia konstato, eltiro el la vivo kaj scienca argumentado prezentas la fundamentojn de la senestreco. Kaj ĉar la nomo de ĉiu doktrino determiniĝas laŭ ties principoj, t.e. laŭ ties plej alta idealo, ĉiu el tiuj sep principoj povus doni al la doktrino sian nomon. Tiel, kun plena rajto senestreco povus sin nomi »libertalismo« (el la latina nomo de libereco), »solidarismo«, »egalrajtismo«, »justecismo« (ĉiam laŭ la latina radiko de la vortoj), »interkonsentismo« aŭ »kontraktismo«, »iniciativismo« aŭ »aktivismo« kaj precipe »federismo«, tiu lasta estus la plej adekvata nomo.

Propre filozofia doktrino povas kontentiĝi nur per konstruo de koncepto sur la bazo de kelkaj principoj. Tio, ta-

men, ne estas sufiĉa por socia doktrino. Ĉiu socia doktrino, starigante certajn principojn, neeviteble venas en konflikto kun aliaj en la socio jam starigitaj principoj, kaj strebas ilin anstataŭi aŭ modifi, ilin neante entute aŭ parte. Tiel ĉiu socia doktrino strebas aliformiĝi en movadon. Iĝante movado, ĝi neeviteble ekkonfliktas kontraŭ la establitaj sociaj formoj. Same okazis ankaŭ kun anarkiismo.

Anarkiismo ne estas nihilismo, ne estas simpla neado de ĉio ekzistanta, kontraŭe ni pruvis ĝis nun, ke ĉiuj ĝiaj bazaj principoj estas eltiritaj el la nuntempa socio. Sed ilin arigante en strukturita sistemo kaj ilin proklamante sia plej alta celo kaj socia idealo, anarkiismo devis neeviteble refuti serion da aliaj principoj, kiuj same trovas aplikon en la nuntempa socio, kaj tiamaniere ĝi starigis novajn principojn, kiujn oni povas nomi *produktaj principoj de la anarkiismo*. Unu el tiuj principoj estas senestreco –tiu ĉi, kiu donis nomon al la doktrino kaj al la movado.

La anglo William GODWIN kiel unua starigis la bazajn principojn de la anarkiismo en 1793, sed li donis neniun nomon al tiu nova doktrino, eltirita aŭ pli precize kaŭzita senpere de la granda franca revolucio. La franco PRUDON kiel dua, siavice, tute memstare kaj sendepende de GODWIN, elmetis kaj motivis la anarkiismajn principojn en sia unua impona verko *Kio estas proprieto?* aperinta en 1840, kaj uzis la vorton »*anarkio*«. Li ankaŭ pli malfrue multfoje uzis la saman terminon kiel nomon de la doktrino, kiun li elmetis kaj defendis, sed neniam rekte kaj en determinita formo nomis sin »anarkiisto«. Kontraŭe li ĉiam nomis sin kaj parolis kiel *socialisto*.

La ruso Mikaelo BAKUNIN, elmigrinte en Eŭropon, tria laŭvice elmetas kaj motivas buŝe kaj skribe la principojn de la anarkiismo kaj, kio estas plej grava, *transformas* kiel unua la doktrinon en movadon. Li same kiel PRUD0N uzas la terminojn »anarkio, anarkiismo, anarkiisto« kaj multe pli ofte ol tiu lasta; sed la doktrinon, kies adepto kaj ĝis alta grado teoriisto li estas, kaj la movadon, kiujn li kreas kun siaj amikoj el la Unua Internacio, li preferas nomi »*revolucia socialismo*«, »*kontraŭaŭtoritata socialismo*« kaj de tempo al tempo nur »kolektivismo«, metante ĝin kontraŭe al la komunismo, kiun ĝis tiam oni konsideris nur kiel regpovan kaj ŝtatan formon de la socia ekonomio.

La nomoj »anarkio, anarkiismo, anarkiisto« estas donitaj pli verdire de la malamikoj ol de la adeptoj de tiu doktrino kaj movado. Longtempe la disciploj kontraŭstariĝis al tiu nomo, ĉiam skribante »an–arkio«, kio laŭ greka origino signifas *senestreco*, foresto de aŭtoritato, kaj ankaŭ senordo. Poste la anarkiistoj malatentis ĉi tiun vorton kaj plu sin nomis mem *anarkiistoj*, senestrecanoj. La nomo ne estas grava, esenca estas la enhavo.

Ĉiuokaze la termino senestreco kreiĝis el la neado de la aŭtoritato, de la regpovo. Tiel refutante la aŭtoritaton kaj la regpovon, la adeptoj de la sep jam pritraktitaj principoj de la anarkiismo starigas novan principon, eltirita el la neado de la aŭtoritato, ĝuste: *senestrecon*. Ĉu vere necesa tiu ĉi nova principo por kompletigi la doktrinon al kiu ĝi donis sian nomon? Jes! Ĉar la sep pritraktitaj principoj bazaj, kiuj konsistigas la enhavon de la doktrino mem, estas samtempe la absolutaj kondiĉoj nepre necesaj por la starigo de socio, en kiu la aŭtoritato mon-

triĝas malutila kaj superflua; sed la plena realiĝo eĉ de unu el tiuj bazaj principoj ne estas ebla, sen likvidado, sen neniigo kaj sen forigo de la aŭtoritato de l' homo super homo, t.e. sen starigo de socio *sen aŭtoritato*.

Historie la aŭtoritato naskiĝis kaj ideologie motiviĝis kiel rezulto de la ideo pri Dio. La konata frazo enigita en la kristanismon fare de apostolo PAULO, laŭ kiu »ĉia ordonpovo estas de Dio«, estas nek hazarda nek tute nova kiel pravigo de la aŭtoritato de l' homo super la homo. Laŭ ĉiuj religioj, Dio estas absoluta principo. Li estas ĝenerale la plena absoluto: absoluta forto kreanta kaj ĉiokreanta; absoluta vero, plena lumo kaj fonto de ĉia lumo; absoluta saĝeco, senmorteco kaj fonto de ĉia vivo, ktp, ktp... Pro ĉiuj tiuj »*absolutoj*« Dio–kreinto kaj patro de ĉio kaj de ĉiuj estas ankaŭ absoluta »*aŭtoritato*«. Dubo pri lia vereco kaj senerareco, pri lia justeco kaj racio estas neebla, neakceptebla. Kaj ĉiuj tiuj kvalitoj al la elpensaĵo »Dio« atribuitaj de la homo mem, primitiva kaj nescia (efektiva kreinto de Dio) donas al li nedetrueblan kaj nevenkeblan forton. Ĉiu tia forto estigas timon miksitan kun respekto. »Timo al Dio estas la komenco de ĉia saĝeco« (Ĥristo BOTEV).

Kiel konate el la historio de la religioj, ĉe la originaj formoj de adorado la diaĵo estas prezentita per objektoj kaj fenomenoj videblaj kaj senteblaj. Pli malfrue, kun starigo de diunueco, kiam komenciĝas la vera religio en nuntempa senco de la vorto (kun ĝia socia karaktero), alidirite kiam Dio transformiĝas en nevideblan, ĉieestantan kaj abstraktan estaĵon, aperas ankaŭ la bezono de perantoj, reprezentantoj de Dio. Per tio ideologie formiĝas la ekzistado de la religia kasto. Kiel reprezentanto

de Dio ĝi reprezentas parton de ties aŭtoritato. De tie la bezono pri konsekrado de surtera aŭtoritato, kiu trovis esprimon en la konstitucioj de la monarkia ŝtato (»reĝo laŭ Di–favoro«). De tio la fama interpreto fare de BOTEV pri la Salomona saĝeco: »Timu Dion, respektu reĝon«.

La suprenirado de la burĝaro kiel klaso trudis la neceson de novaj formoj de aŭtoritato –naskis la parlamentismon, kaj kun ĝi la novan religion: universala balotrajto. Sed la ideo pri Dio ne foriĝis, ĝi nur aliformiĝis. La lokon de Dio okupis la nacio, el kiu fariĝis la novnaskita moderna ŝtato. Unu el la fondintoj de la nova religio estis J. J. RUSO per sia elpensita »Socia kontrakto«, konforme al kiu la homoj bonvole kaj konscie unuiĝas en ŝtato por defendi sin. Tio ne forigis la bezonon de dieca aŭtoritato. Estiĝis neceso de nur iu kompletigo, kion ni trovas en la formulo: *»Reĝo laŭ Di–favoro kaj popola Volo«*. Sed la fonto ĉiam restis sama: Universala principo, universala saĝeco, aŭtoritato de Dio dividita en malgrandajn parceletojn, el kiuj unu(n) posedas ĉiu voĉdonanto.

Tiel estas la teologia historio de la aŭtoritato. Estas ankaŭ alia historio ne malpli grava, la historio de la perforto, konkerado, milito ktp, pri kiuj ni alifoje okupiĝos. La esenco tamen ĉiam radikiĝas en la dia aŭtoritato. Ĉi–lastan, kvazaŭ de Kreinto postlasitan parteton, ni trovas en la familio reprezentata de la patro. La patra aŭtoritato, laŭ la forto de la sama teologia filozofio, estas sanktaĵo. Kiel konate, ĉe multe da popoloj la patro ĝuis absolutan autoritaton super la infanoj, super ties vivo inkluzive. Li povis ilin mortigi, vendi, kaj senlimige ĉion fari per ili, sen respondeci antaŭ iu ajn. Tiel estas ankaŭ lia morala aŭtoritato absoluta, kiu por multaj restas sendifekta

ĝis hodiaŭ.

Aŭtoritato, neniam modifante sian originon el Dio, manifestiĝas per egala forto ankaŭ en la scienco, edukado, arto . La tuta spirita kaj kultura vivo de la nuntempa socio estas venenita de la aŭtoritato, se ne paroli pri la eklezio, tribunalo, armeo, kiujn ni studos aparte.

Tiel, *aŭtoritato kun ĝia dieca origino aperas kiel la bazo de ĉiuj formoj de aŭtoritato*. Ĉar, kiel la aŭtoritato, tiel ankaŭ la povo en ĉiuj siaj formoj aperas kiel nesupereblaj baroj kontraŭ la plena kaj libera manifestiĝo de la bazaj anarkiismaj principoj, kondiĉoj de ĉia kultura kaj morala progreso, de bonstato kaj feliĉo de l' homo, la doktrino kaj movado, kiujn proklamas tiuj principoj, kategorie refutas la principon de aŭtoritato kaj ties aplikon en ĉiuj ties formoj, kaj sin proklamas por senaŭtoritata socio –por senestreco,

Anarkio, kiel socia ordo en perfekta kaj plena formo, neniam ekzistis, kaj kiam senestreco manifestiĝis en periodoj de popolaj insurekcioj kaj revolucioj, ĝi ne povis sin teni longdaŭre. Aperinte kiel neado de ĉia aŭtoritato, ĝi plene realigos kaj alprenos daŭran karakteron nur kiam la principo de aŭtoritato kaj aŭtoritataj formoj de sociaj rilatoj estos tute detruitaj de la voloj de la popoloj, kiuj estos dezirintaj realigi la liberecon, solidarecon, egalecon kaj justecon.

## Ateismo

Paralele kun la senestreco, t.e. kun neado de la aŭtoritato kaj regpovo, iras la neado de Dio, de la kredo je Dio – la ateismo, kiu ankaŭ presentas unu el la principoj de senestreco starigitaj laŭ la neadvojo. La ideo mem pri

Dio estas plena kaj senkondiĉa neado de la fundamentaj principoj de anarkiismo, de libera homa socio: libero, solidareco, egaleco, justeco, libera iniciativo, ktp... Sekve, eltirante el la vivo kaj el la historio de la homa socio tiujn bazajn principojn, la anarkiismo neeviteble, logike refutas Dion kaj la tutan tiun sistemon de kredoj, superstiĉoj kaj historiaj surtavoliĝoj el stultaĵoj kaj malklero, kiun oni nomas religio.

Neniu alia socifilozofia doktrino atribuis tiun grandegan gravecon al la religio en la sklavigo de la homo, kaj estas tiel fundamente studinta ĉiujn flankojn de la kredo je Dio, kiom la anarkiismo. Riĉa estas la anarkiisma literaturo, traktanta tiun demandon. Ne estas eĉ unu teoristo, kiu estas ne okupiĝinta pri ĝi: GODWIN, PRUDON, KROPOTKIN, FAURE, k.a. Estas precipe BAKUNIN, kiu profunde penetris en tiun problemon eternan por sufiĉe klera inteligento, kaj kiu fulmbrile esprimis la anarkiisman penson sur tiu kampo.

> »La ideo pri Dio, skribas BAKUNIN, kuntrenas la kripligon de la racio kaj falsas la homan justecon. Ĝi estas la plej decida neado de la homlibero kaj neeviteble kondukas al sklavigo de la homoj same teorie kiel praktike... La religioj disbatas la homajn fierecon kaj indecon, ĉar ili favoras la rampantojn kaj humilulojn. Ili sufokas en la koroj de l' popoloj la senton de homfrateco kaj ilin plenigas per dieca krueleco.
>
> »Ĉiuj religioj estas kruelaj, ĉiuj konstruiĝas sur sango; ĉar ĉiuj baziĝas ĉefe sur la ideo pri oferdono.«

Aliloke BAKUNIN skribas:

> »La religio estas kolektiva frenezeco, kiu montriĝas des pli potenca, ju pli ĝi aperas tradicia, kaj ju pli ĝia origino perdiĝas en senlime mal–proksima antikveco. Kiel kolektiva frenezeco ĝi penetris same en la socion, kiel en la privatan

> vivon de la popolo; ĝi enradikiĝis en la socio, iĝis, se tiel diri, kolektiva animo kaj penso. Ĉia homo jam de sia naskiĝo estas ĉirkaŭprenita de ĝi, li ĝin englutas kun sia patrina lakto, ĝin ensorbas kun ĉio, kion li aŭdas kaj vidas. Li estas tiom nutrita per ĝi, tiom venenita, ĝi tiom penetras en lian estaĵon, ke pli malfrue, kiom ajn potenca estos lia spirito, li bezonos grandajn fortostreĉojn por liberiĝi de ĝi, kaj en tio li eĉ neniam plene sukcesos. Malbonaŭgura historia fantomo kreita de la imago de la primitivaj homoj de kvar aŭ kvin miljaroj ĝi pezas sur la sciado, sur la libereco, sur la humaneco, sur la vivo.«

Se antaŭ 85 jaroj, kiam BAKUNIN donis siajn pezajn batojn sur la teologion, estis multaj homoj, kiuj demandis sin, kial estas tiom necese okupiĝi pri Dio kaj la religio (lasu la homojn kredi je kio ajn ili deziras, okupiĝu nur pri la socia problemo) ankoraŭ pli granda devas esti la nombro de tiaj homoj hodiaŭ ĉe la granda progreso de la socia kaj scienca penso... BAKUNIN tamen ne eraris. Lia antaŭvido rilate al la pereiga influo de la religio validas ankaŭ por hodiaŭ:

> »la di–regno en la ĉielo transformiĝas en regnon –agnoskitan aŭ maskitan– de la skurgo kaj de la ekspluatado de la laboro de sklavigitaj amasoj, tie ĉi sur la tero... Unu mastro en la ĉielo sufiĉas por krei milojn da mastroj sur la tero.«

Ĉu ni ne vidas ankaŭ hodiaŭ, paralele kun plifortiĝo de la sklaveco, relativan renaskiĝon de la religio, kiel en Oriento, tiel en Okcidento? Ĉu ni ne vidas ankaŭ hodiaŭ, ke la religio iĝas, speciale sub la tiranaj reĝimoj, rifuĝ–ejo por la senkuraĝigitoj, iluzia konsolo de la humiligitoj kaj senpersonigitoj? Ĉu ni ne vidas aliflanke, ke tiu »opio por la animoj« restas unu el la neanstataŭeblaj kaj nepre necesaj rimedoj por firmiĝo de la ordonpovo? Kiel alie oni povas klarigi la oficialan agnoskon, toleradon kaj

eĉ materialan helpon al la eklezio fare de la reĝimoj, kiuj nomas sin »socialistaj«? Kiel oni povas alimaniere klarigi la faktón, ke homoj kaj partioj, kiuj volas, sin prezenti kiel tre soci–progresemajn, kiuj mem ne estas religiaj kaj kredas je nenio krom je sia amata ordonpovo, »ne ĉesas paroli pri religio kaj eklezio, kaj kun farisea pihumileco serĉas la aliancon de ›paŝtistoj de la animoj‹«? Ĉion ĉi bone penetris BAKUNIN por veni al decidiga konkludo: »Se Dio efektive ekzistus, oni devus neniigi lin.« Kaj fakte, se oni analizas la religian predikon de kiu ajn konfesio, oni vidas ke la ideo pri Dio kaj kredo je Dio estas plena neado de la homo, de lia konscio pri libereco, indeco, solidareco, egaleco, iniciativo... Eĉ la amo, kiun oni konsideras kvazaŭ »registrita marko« por ĉiuj religioj, ne havas homan enhavon. Laŭ la religio Dio estas ĉio, homo nenio, ĉio apartenas al Dio, ĉio devenas de Dio. Ĉion oni ŝuldas al Dio. La unua devo de la kredanto estas agnoski sin neniaĵo, surgenuiĝi antaŭ Dio, – kaj antaŭ liaj surteraj reprezentantoj, kompreneble– ankaŭ deklari: »mi estas nenio, al ci mi apartenas, mia Dio, je ciaj ordonoj mi estas«. Kian liberon oni povas atendi de homo, kiu memvole kaj kun humileco rezignas, kaj fordonas sin en la manoj de Dio kaj ties surteraj reprezentantoj? Ĉu oni povas atendi de li liberan iniciaton? Aŭ ĉu solidareco, justeco, egaleco, eĉ ankaŭ amo, kiam tio por li ne estas principoj, ne estas liaj sentoj propraj, ne estas parto de li mem, de lia ekzistaĵo? Eĉ la amo, kiun eble la kredanto sin konsideras devigata nur manifesti, devenas de Dio; oni agas en ties nomo kaj laŭ ties ordono. Ĉar Dio estas fore kaj alte, tial plej ofte liaj anstataŭantoj decidas al kiu, kiel kaj kiagrade oni devas manifesti solidarecon, justecon, amon. Pri egale-

co eĉ ne povas temi; ĉu ja estas pli granda neegaleco en tio? El tio neeviteble sekvas hierarkiaj gradoj –neado de la nocio mem pri egaleco. Sur tiu psikologia grundo –psikologio de sklavo– bone sterkata per grasa malklero, sisteme tenata, facile estas semi kaj kulturi ĉiuspecajn superstiĉojn, oportunajn sentojn al tiuj, kiuj fakte komandas la agojn, la konduton, la moralon de la kredantoj –»la spiritaj paŝtistoj«, kiuj plej ofte iras man' en mano kun la laikaj paŝtistoj de homgregoj.

Ĉu do estas mirige, ke la kristanismo, ekzemple, kiu historie montriĝas religio de la humiligitoj kaj ofenditoj, de la malriĉuloj, malestimitoj, forĵetitoj kaj servutigitoj, religio de la amo kaj egaleco, estas kreinta la inkvizicion kaj pleniginta la homhistorion per tiom da sango, flamigante kaj kuraĝigante ĉion, kio estas neado de la libero, frateco, egaleco, justeco, amo? Laŭ la enhavo, kiun donis al ĝi KRISTO kaj liaj disĉiploj, la kristanismo estas internacia religio, ĉiuj homoj sur la tero estas por KRISTO fratoj. Eŭropo, Ameriko, Aŭstralio, parto el Afriko estas kristanaj. Kaj ĝuste tiu kristana mondo en la daŭro de jarcentoj intermortigas sin, ĉiam en la nomo de la Dio de la amo. Kaj la religiaj militoj, kaj la sektoj? Ĉu estas pli granda semanto de malamo ol la religio? Ĉu penvaloras, ke ni konstatu aferojn de ĉiuj sciatajn?

Estas klare, ke la religio kontraŭdiras al la plej elemen–taj kaj naturaj sentoj kaj principoj pri la homrilatoj. Ĝi estas en konflikto ankaŭ kun la scienca penso; ĝi estas refutita ankaŭ de la scienco.

Kiel oni povas klarigi la fakton, ke tiu tiel negativa kaj por la homaro malutila ideo pri Dio povis naskiĝi kaj pluiĝi dum miljaroj, teni eĉ hodiaŭ milionojn da homoj

en spirita sklaveco –nepre necesa kondiĉo por ĉia alia sklaveco?

Supernatura laŭ sia esenco, la ideo pri Dio, la kredo je nevidebla kaj supernatura estaĵo estas plene natura, materiala, kiel ĉiu alia ideo, laŭ origino. Ĝi enradikiĝas en la homa, aŭ pli ĝuste besta, naturo de l' homo. Tion ĉi oni povus konsideri kiel ofendon, insulton por la patroj de la eklezio, kiuj atribuas al la religio ĉielan kaj dian originon, sed ĝi estas pura vero.

La religio radikiĝas en la natura sento de timo, propra al ĉiuj bestoj, kaj nedisigebla parto el la instinkto de memkonservado. Tiusence, laŭ esenco, la religia sento enĝerma ankaŭ ne estas fremda al la bestoj. Sed kiel ideo, kiel koncepto, la religio estas frukto de la limigita kaj *malklera homa cerbo*; sekve ĝi estas homa, sed ne besta produkto. Ĝi estas eble la unua, certe ekstreme malperfekta homa manifestiĝo, kiu metas la limon inter la besta kaj homa mondoj, ĉar ĝi estas kreita de la penso –unua distinga kvalito homa– provanta klarigi la fenomenojn.

La tuta universo, la tuta videbla kaj nevidebla mondo, la tuta senviva kaj viva naturo prezentas tutecon, universalan solidarecon, konstante transformiĝantan fortorezultanton, eternan fluadon de la materio –universalan vivon. Tiel estas la koncepto al kiu atingis la hodiaŭa materialisma scienca penso –frukto de multjarcentaj observoj, serĉadoj, pristudoj. Sed ĉu estus povinta la primitiva homo, per siaj ekstreme limigitaj scioj kaj imagoj, formi tian koncepton? Nature, ne. Sed li, sen ia dubo, sentis la ekziston de tiu universala solidareco, kies konsista parteto li mem estas, same kiel sentas ankaŭ la

bestoj. Diference de ĉi-lastaj, al kiuj ligas lin la komuna instinkta timo pro la naturaj elementoj, fortoj kaj fenomenoj, li provis klarigi la ĉirkaŭan mondon, kaj malkapabla fari tion la primitiva homo venis al animigo kaj adorado de la neklarigeblaj fortoj kaj fenomenoj. Tiel ekaperas la religio, kiu ankaŭ montriĝas la primara filozofio de l' homo. La plua tuta historio de la religio, en ĉiuj ĝiaj etapoj kaj formoj ĝis la monoteismo, kiu metas la efektivajn bazojn de la religio en la nuntempa senco kun ĝia socia rolo, estas historio de malrapide retiriĝanta malklereco sub la lumo de ŝajne tiel malrapida progresanta sciado.

La volo kaj la konscio iom post iom anstataŭas la timon, la malklerecon, kaj la religio retiriĝas antaŭ la racio. Kiu kredas, tiu nescias –kaj tiu ne scias, kial li kredas; kiu scias, tiu ne kredas. Tiel la scienco iom post iom okupas la lokon de la religio, kaj la filozofio –sintezo de la scienca penso– entombigas la ideon pri Dio. La homo, venkinta la timon kaj malklerecon, iras al efektivigo de sia libero –la kulmina punkto de la humanigo de la besto–homo. Nek Dio, nek mastro –kio signifas liberan homon.

## Internaciismo

Patriotismo estas alia bildo, sub kiu aperas »*malbonaŭgura historia fantomo*«, la dua relaborita kaj laika eldono de la religio. Ĝi estas la nova konfesio –la religio de la moderna ŝtato. Dio tie ĉi alprenas pli materiigitan formon, kaj nomiĝas »Patrujo«. La bolŝevika varianto de patriotismo estas iomete modifita, sed la esenco estas konservita. La diferenco kun la klasika formo de la burĝara patriotismo estas, ke la »patrolando« prezentiĝas en du gradoj: unua grado, la »*granda patrujo*« -la

*»patrujo de la proletaro«*, t.e. la Moskva Imperio; kaj la dua grado, *»malgranda patrujo«*, monopolo de ĉiu satelito, kiu kredas kaj krucsignas al la kremlaj dioj. Monoteismo transformiĝas, »evoluas« al politeismo.

Anarkiismo refutas unu kaj la alian kaj ĉiujn religiojn laŭ la sama logiko, laŭ la sama neceso; same kiel ĉia kulto, ĉia idolo, ĉia fetiĉo estas neado de l' homo, de lia libero, de lia moralo, de lia indeco, kaj de liaj necedeblaj rajtoj.

Kaj patriotismo samkiel kredo je Dio havas naturan ori–ginon. Ĝi ĉerpas siajn unuajn nutrajn sukojn el sento propra ankaŭ al la bestoj, sento de alligiteco al sia medio. Tio estas la natura, primara patriotismo. »Alligiteco instinkta, aŭtomata, plene senigita je kritikemo kontraŭ la kutimoj tradiciaj, heredaj, kolektivaj, kaj malamo same instinkta, aŭtomata kontraŭ ĉia alia vivmaniero; amo al la samgentanoj kaj al propra apartenaĵo kaj malamo kontraŭ ĉio frenda.« –diras BAKUNIN. Sento, kiu sin manifestas duoble: sento de kolektiva egoismo, unuflanke; kaj de neado, de milito, aliflanke.

Kiom ajn primitive kaj sovaĝe sin manifestis tiu natura patriotismo, ĝi ne estas tiel fatala, kaj en la historio ne ludis tian pereigan rolon kiel la patriotismo, kiu ligita kun kreo de la nacia ŝtato, transformiĝas en religion. En la unua kazo ĝi estas reala fakto, dum en la dua ĝi transformiĝas en principon, en doktrinon, en idealon iniciatitan, konscie, sisteme kaj prointerese instruatan kaj disvastigatan kaj kulturatan. Reala fakto de limigita kaj fermita solidareco, respondanta al iu grado de evoluo, ĉe kio oni ne povas atendi nek postuli pli ol tio, kion la besto–homo kapablas doni; la patriotismo, transformita en principon kaj altigita al rango de nacia religio, fariĝas

neado de la solidareco mem kaj konstanta minaco por la universala paco, por la homlibereco, por la justeco kaj por la justemo mem inter la homoj, eĉ enlime de malgranda kaj limigita kolektivo. Duobla sento: de amo, de korinklino –kaj eĉ ekskluziva; kaj samtempe de malamo; kiam patriotismo iĝas doktrino instruata de la supro de profesora katedro, la malamo al fremdaĵo iĝas superanta elemento laŭ sia enhavo kaj sufokas la manifestiĝon de amo kaj korinklino al si mem kaj al la samgentanoj kaj al ĉia propra apartenaĵo. Oni ne forgesu, ke la homo estas besto, kaj ju pli kulturiĝas lia primara besta naturo, des pli superiĝas la negativaj instinktoj.

*Patriotismo kiel religio* de la malamo al la fremdaĵo estas la plej potenca rimedo por sovaĝbestigo de la homo.

Sed patriotismo ne estas nur primara, natura sento de »kolektiva egoismo«. En sia nuntempa esprimo de nacia religio, tiu natura ĉefeco preskaŭ perdiĝas; nur la esploristo de la patriotisma deveno povas ĝin konstati; ĝi anstataŭiĝas de *interesoj* ekonomiaj kaj politikaj, kaj de fanatikeco. En tiu formo patriotismo estas por la senestreco objekto de kritiko, de atakoj kaj neado. Ĉar la ekonomiaj kaj politikaj interesoj, kiujn la patriotismo reprezentas, kaj la *fanatikeco*, kiu al ĝi donas la forton de amasa tokso, estas la necesaj kondiĉoj sen kiuj la nuntempa moderna ŝtato nacia ne povus ekzisti, sendepende de tio, ĉu ĝi estas aŭ sin nomas demokratia, burĝara aŭ »*socialisma kaj proletara*«.

Kiuj kaj kiaj estas tiuj interesoj, kia estas kaj kiel sin manifestas tiu fanatikeco?

*La ekonomiaj interesoj* konsistas en ekskluziva monopo-

lo super donita teritorio, kiu baziĝas sur *»historiaj rajtoj«*, t.e. sur la ĉefeco de la konkerado, sur la forrabo –la rajto de la plej forta– aŭ sur la neceseco de »*vivesenca spaco«*, alivorte la rajto de la impertinentulo. La ekonomiaj interesoj ankaŭ konsistas en ekskluziva rajto posedi kaj uzi la subterajn kaj surterajn riĉaĵojn de tiu teritorio, kaj en la avida strebo kaj ebleco certigita per akrigita patriotismo, konkeri je unu aŭ alia preteksto ankaŭ fremdajn kaj ofte eĉ forajn landojn kun ties naturaj riĉaĵoj. Fine, tiuj interesoj ankaŭ konsistas en strebo konkeri fremdajn merkatojn kaj eterne konservi la monopolon de la jam en la pasinteco konkeritaj merkatoj de malmultekosta manlaboro kaj de senrajtigitaj konsumantoj.

*La politikaj interesoj* estas reprezentataj de la luparo el parazitoj de la ŝtata aparato, komencante per tiuj, kiuj tenas la direktilon kaj deziras kiel eble plej vaste estri la mondon –la politikistaĉoj, la diplomatoj, la marŝaloj kaj generaloj, la eklezio kun ĝiaj misiistoj –ĝis la lasta burokrato, kiu en la vastigo de »la patrujo« vidas eblecon de pli alta kvoto de la varo, kiu estas liaj »servoj«.

Unuj kaj ceteraj interesoj ne estas tiuj de la popoloj enfermitaj en donita teritorio, kaj prezentas en nenioma grado la primaran, »kolektivan egoismon«, ĉar la nuntempa socio –burĝara, kapitalisma aŭ bolŝevismsocialisma tutegale– estas dividita en klasoj: privilegiuloj kaj senrajtigitoj. La ekonomiaj kaj politikaj interesoj, pri kiuj temas tie ĉi, estas tiuj de la unuaj –la privilegiuloj– dum la patrolando de la duaj estas komuna kun tiuj, kiuj estas aŭ iĝas viktimoj de tiuj interesoj en la »fremdaj patrolandoj«.

Tenado de la politikaj kaj ekonomiaj interesoj ne estas ebla sen venenigo de la homkonscio pere de la *patriota fanatikeco*. Ĉi–lasta konsistas el tio: sisteme kulturi kaj teni la trompadon, kiu surŝutas per ĉiuj kvalitoj –kaj nur kvalitoj– »la siajn kaj ĉion propran«, kaj maljuste atribui ĉiujn difektojn –kaj nur difektojn– al la fremdaĵo kaj »la fremduloj«. Tiele, la suno, la tero, la aero, la akvo, la montoj kaj lagoj, la arbaroj kaj kamparoj estas belaj kaj fruktodonaj nur ĉi–flanke de la landlimoj. Transe estas nur malbeleco kaj mizero. La historio konsistas nur el grandfaroj kaj imponeco, la popola vivo kaj kreivo, scienco, arto kaj kulturo estas perfektaĵoj ĉe ununura kondiĉo: ili estu »niaj«. La »fremda« historio estas nenio alia, krom malnobleco, perfideco, sovaĝeco, barbareco, »bizancismo«, dekadenco. Transe de la limaj signoj ne ekzistas kreivo, nek arto, nek scienco, nek kulturo. Ĉi–flanke, nur venkoj; transe, nur malvenkoj. Ĉi–flanke, genioj; transe, nur idiotoj. Ĉu estas malfacile teni tiujn trompojn kaj per ili instigi iun fanatikecon de nacia tromemfido, memadorado, orgojlo, kaj de malestimo al la fremdaj popoloj kontraŭ kiuj la malamo estas tiom pli granda, ke ili estas pli proksimaj laŭ historio, kulturo, vivo kaj naciaj karakterizaĵoj, pli proksimaj al la landlimo –kiam per tio oni plenigas la kapojn kaj venenas la korojn, jam de la plej frua aĝo? Post kiam la fundamentoj de tiu fanatikeco lokiĝis en la familio kaj la lernejo, la kazerno, eklezio, teatro, kino, radio, gazetaro, facile oni povas teni ĝin kaj ekflamigi, disvolvante la malamon al »la fremda«, kiu superas la noblajn manifestiĝojn de l' homo kaj transformiĝas en malamon ankaŭ kontraŭ tiuj el »la siaj«, kiuj ne povas kaj ne volas resti blindaj. Tiele disŝiriĝas ĉia solidareco inter la homoj.

Jen, tiel estas la patriotismo–religio. Refutante ĝin, anarkiismo kontraŭmetas al ĝi alian principon, kiu an-kaŭ havas natŭran devenon, kaj radikiĝas en sento kiu, kvankam sufokita per jarcentaj antaŭjuĝoj, estas same profunda kaj natura –se ne eĉ pli profunda– kiel la primara korinklino al »la sia« –*la amo al proksimulo, al la homo*. Tiu ĉi principo, kontraŭa al la malvasta kaj sufokanta patriotismo estas *internaciismo*, kiu leviĝas sur la ŝtuparo de la kultura kaj homa progreso ĝis la ĉielaltoj, specifa nur de la homo ĉesinta esti gorilo, ĉar en lia krania kavo fabrikiĝas *penso*, al li permesanta vidi la solidarecon, la komunecon de siaj interesoj kun tiuj de ĉiuj surteraj homoj.

## Kontraŭmilitarismo

Diri, ke la paco estas natura leĝo, ke ĝi estas la natura stato per kiu komenciĝas la homhistorio, estus tiom ne–ekzakte, kiel aserti, ke la milito estas neevitebla sorto de la homspecio kaj eterna necesaĵo por teni la ekvilibron en la mondo. Samkiel la primara, natura patriotismo, la milito estas *reala* fakto en la homhistorio, kaj komenciĝas kun la besta stato de la homsocio, radikiĝante en la batalo pro ekzistado. Ĝia unua formo estas la kanibalismo propra, se ne absolute al ĉiuj sovaĝaj gentoj, almenaŭ al granda parto de la primitivaj homsocioj dependantaj de la natur–kondiĉaj kapricoj por sia vivtenado. Ĝi akompanas la tutan pluan historian disvolviĝon de l' homo, kaj la danĝero de ĝia nova furioziĝo eĉ en plej altkultura epoko tia, kian ni hodiaŭ travivas, ankoraŭ ne estas forigita. Tiel estas la reala kaj nedisputebla historia vero.

Sed el tio ne sekvas, ke ni akceptu la militon kiel neevi-

teblan neceson, nek ke ĝi estas vivprincipo. Ekde la momento kiam la milito transformiĝas en principon, kaj kiam oni ĝin vestas per la ornamo de *socia doktrino*, ĝi iĝas danĝera socia malbono, neado de la vivo, de la progreso, de la kulturo, de la homo –pensanta estaĵo. Kaj la granda krimo de la oficiala historio, per kio komenciĝas vestado de la milito en la togo de neskuebla principo, kuŝas en tio, ke ĝi prezentas la tutan disvolviĝon de la homspecio kiel senĉesan proceson de reciproka elventrigo de la homoj kaj popoloj. Legante tiun historion, la numtempa homo devige restas kun la impreso ke, krom la milito kaj la seninterrompaj reciprokaj mortigoj kaj forraboj, nenio alia ekzistis dum jarcentoj. Tiel estas la falsa ideo, kiun intence skulptas per siaj sangmakulitaj manoj la servistaĉoj de l' kapitalo kaj ŝtato, por ĝin alporti al la delikata cerbo de la formiĝantaj junaj generacioj en la lernejoj de la nuntempa aŭtoritata socia sistemo.

Ni ne ekokupiĝos tie ĉi pruvi, kiom estas falsita la oficiala historio, tiu ĉi per kiu pleniĝis niaj kapoj sur la lerneja benko. Ekzistas kultura historio, ekzistas monumentoj de la kulturo kaj arto, muzeoj, dokumentoj pri sciado kaj filozofiaj atingaĵoj kaj sintezoj el la plej antikvaj tempoj, kiuj plej nekontesteble disbatas tiun krudan kaj tendencan prezenton de la homo, kvazaŭ li senescepte estus sovaĝbesto. Ni volas nur montri, kiom malkonsekvencaj estas la oficialaj historiistoj, kiuj samtempe defendas la religion, prezentante sian Dio–kreinton kiel modelon de perfekteco kaj senlima amo, kaj prezentas ties kreitaĵon, la homon –kiu, laŭ konata evangelia formulo estas »*karno el lia karno*«, kronado de lia kreitaro– laŭ la bildo

de sangavida, sovaĝa besto, »monstra ido de la diablo«. El du, nur unu: aŭ la originalo kaj la kreinto ĉesas esti perfekteco kaj senlima amo, kiam la kreitaĵo iĝas neado de ĉia perfekteco kaj personigo de la malamo kaj krueleco; aŭ la homo tia, kia li estas, estas kreitaĵo de neniu imagebla Dio; la teologoj ne trompu nin per la sofismo pri la prapeko, kaj pri la puno al la homo trudata por elaĉeti sian grandan pekon (laŭ ni la plej nobla lia gesto, la unua ribelago) esti permesinta al si gustumi el la frukto de la sciado. La homo estas tia, kia ni lin vidas – kaj besto kaj homo– la frukto de miljarcenta evoluado, kiu komenciĝis de malalta ŝtupo de la besta stato, iranta direkte al ĉiam pli granda perfekteco, por ke iam pravigu lia nomo: homo. Ne post ni, sed antaŭ ni oni serĉu la perfektecon kiel rezulton de evoluado. La celo de la sociologo estas helpi per ĉiuj rimedoj, kiujn li disponas, tiun evoluadon al humaniĝo de l' homo, sed ne starigi kiel principon iun primitivan staton de la interrilatoj, pro kio eĉ multe da bestoj ne estus inklinaj fieri.

Ĉu necesas diri kaj pruvi, kia malbono estas la milito, kiel, laŭ sia esenco mem, ĝi aperas neado de ĉiuj principoj, kiujn anarkiismo, eltirante ilin el la vivo, prenas kiel bazon de sia socifilozofia koncepto kaj de la socia rekonstruado al kiu ĝi strebas? Ĉu estas necese diri kaj pruvi ke, deirinte de tiuj principoj, anarkiismo refutas *la principon mem de la milito kaj proklamas per tiu refutado alian principon –la principon de la kontraŭmilitarismo*, kiu iĝas nedisigebla de ĝia tuta koncepto pri la historio, nuntempa socio, karaktero kaj formoj de la estonta socia strukturo?

Pli vere necesos io alia: klara argumentado al tiu refuta-

do kaj kategoria aserto de la ideologia pozicio anarkiisma, kiu ĉi–lastan igas absolute malcedema koncerne la militon kaj ĉiujn militojn senescepte.

Militarismo, ĉerpante siajn vitalajn sukojn el la aŭtoritato entenata en la ideo mem pri Dio kaj sanktigita de ĉiuj religioj –aŭtoritata principo de tio rezultinta kaj iompostiome stariĝinta en la ensocia genta organizo, en la familio (matriarkeco kaj patriarkeco), pli malfrue ricev–inta ankoraŭ pli realan esprimon en la persono de genta militestro dum tempo de milito, por veni al stariĝo de la militista kasto en la »*civilizita*« socio– militarismo, do, simile al patriotismo sur kiu ĝi forte sin apogas, estas ankaŭ religio kun siaj dogmoj kaj kulto, kun sia kultoservisto, la plej supera estro, kiu kun marŝala sceptro staras paralele kun la papo en la socia hierarkio –necesaĵo de la aŭtoritataj socioj.

Tiu ĉi principo –la militarismo, tiu ĉi kulto –la milito kaj ties kultoservistoj, kaj la militista kasto estas intime ligitaj kun la apero de la ŝtato, kun ties evoluado kaj perforta stariĝo –t.e. plena realiĝo de la aŭtoritata principo. Konsekvence, se anarkiismo havas kialojn refuti tiun principon, la samaj kialoj gravas ankaŭ por neado de la milito kaj militarismo.

Anarkiismo tamen havas ankaŭ aliajn ankoraŭ pli gravajn kialojn por kategoria kaj senkondiĉa neado de la milito –de ĉia milito– kaj de la militarismo, kaj por sendeviaj korinklino kaj fideleco al la principo de kontraŭmilitarismo. Sed la pritraktado de tiuj kialoj metas nin en certan kontraŭecon kun la sekvo de tiu ĉi ekspono, ĉar ili estas ligitaj kun la ekonomia problemo, kiu ankoraŭ ne estas menciita kaj estos traktata pli poste. Pro nece-

seco akceptante tiun malgrandan ekstertemaĵon, mi estas devigata esti konciza.

Studante la tutan historion de la militoj, –kaj speciale dum la epoko de kapitalismo kaj moderna ŝtato, la teoriistoj de la anarkiismo, kaj cefe KROPOTKIN[1], nedubeble pruvas (hodiaŭ tio estas ankoraŭ pli facila dank' al la donitaĵoj kaj ciferoj de la oficialaj statistikoj, ŝtataj buĝetoj kaj bilancoj de la kapitalismaj entreprenoj), ke la milito ne nur estas *konsekvenco*, amara frukto de la ekzistanta ŝtatkapitalisma sistemo, sed ankaŭ *fonto de kapitaloj, faktoro de la kapitalisma ekonomio* kondiĉanta ties evoluon mem. Sekve, se sur vasta politika tereno la milito, en epoko de kapitalismo, aperas rimedo por konkero, por regado kaj por vastiĝo de la aŭtoritato de la ŝtato konsiderita kiel konkreta unuo (alivorte iu aŭ alia ŝtato: germana, ruslanda, angla aŭ usona), kiel institucio ĝenerale, alidirite kiel aŭtoritato super la homoj –sur la ekonomia tereno ĝi manifestiĝas kiel *unu el la plej potencaj rimedoj por la kapitalisma amasiĝo kaj koncentrado*. Tie ĉi, ĝuste, la marksa teorio montriĝis nesufiĉa en la ekspliko de la kapitalismaj fenomenoj. Ankaŭ tie ĉi, interalie, kuŝas la forto de la anarkiisma doktrino pri la ŝtato, kiun ĝi konsideras ne nur *servisto*, sed ofte ankaŭ *kreinto kaj mastro* de la kapitalismo, kaj faktoro per si mem. Parolante pri la milito kiel ekonomia faktoro, ni devas emfazi, ke ĝi ludas tiun rolon ne nur dum la periodo de militagoj sed dum la tuta antaŭa periodo, kiam oni ĝin preparas, sed ankaŭ dum la tuta longa periodo, kiu ĝin sekvas kaj kiu denove antaŭas kaj preparas la sekvantan militon.

1 Vd. KROPOTKIN: *Nuntempa ŝtato,* tradukita en ĉiuj lingvoj.

Tiun duan serion da kialoj la anarkiistoj neniam forgesas, deklarante sin klare, kategorie kaj decidige kontraŭ ĉia milito; *ĉar ili ja scias, ke la rektaj, por ĉiuj videblaj moralaj kaj materiaj malbonfaroj, kiujn la milito portas* kaj kiuj sufiĉas al la pacifistoj, por ke ili refutu, ne estas ĉio; kaj la esenca rolo de ekonomia faktoro, kiun ĝi ludas, koncernas la radikojn mem de tiuj sanktaj principoj de la socia moralo, de la socia kaj persona libero, kaj de universala bonstato, kiujn la anarkiismo akceptis kaj konfirmis.

## Neperforto

La sinteno de la anarkiistoj al la perforto, al la trudado, estas principa demando, ĉar praktike la limo inter principo kaj rimedo malfacile povas difiniĝi. La rimedo, kiam ĝi havas decidigan signifon, transformiĝas en principon, iĝas celo. Kaj ĉu povas esti alie, kiam donita rimedo, kia estas la perforto, tiuokaze uzata kiel sistemo, estas kapabla piedpremi kaj neniigi la bazajn principojn de sociaj doktrino kaj movado? Ĉu povas esti alia la afero por tiuj, kiuj akceptas la liberecon, la solidarecon, la justecon kiel bazajn principojn en la sociaj rilatoj, ĉu por ili la demando pri perforto povas ne esti principa demando?

Proklamo de la libereco, egaleco, solidareco, justeco, libera iniciato kaj ĉiuj aliaj jam nomitaj anarkiismaj principoj logike alkondukus al *neado de perforto* kaj tiamaniere al emfazo de alia esenca principo de la anarkiismo – tiu de *neperforto*.

Kaj ĉi tie, sur tiu punkto, la diverĝeco inter la anarkiistoj kaj la adeptoj de la aŭtoritata principo estas profunda, fundamenta. Kaj fakte ankaŭ por la aŭtoritatuloj la de-

mando pri perforto estas principa demando, ĉar ĝia uzado kiel rimedo estas nedisigeble ligita kun la aŭtoritata koncepto pri la organizado kaj funkciado de la socio.

Ĉe la anarkiistoj kiuj akceptas –diference de la tolstojanoj tute rifuzantaj la perforton kiel batalrimedon– uzadon de perforto en iuj limoj, sub iuj kondiĉoj, kun determinita celo, tiu rimedo ne logike devenas de la bazaj doktrinaj principoj, ne radikiĝas en ties soci–filozofia koncepto, sed ĝi trudiĝas de la establitaj kondiĉoj en la ekzistanta socia sistemo kaj aperas ties *neevitebla konsekvenco*. Eĉ en la uzado de la perforto kiel batalrimedo, la diferenco inter la kontraŭaŭtoritatuloj kaj la aŭtoritatuloj estas grandega, ĉar, por la unuaj perforto estas ĝuste ligita kun la tuto de la principoj, kiuj konsistigas la soci–etikan karakteron de anarkiismo. Por la anarkiistoj la perforto kiel batalrimedo ne havas alian valoron krom *detruan valoron. Perforto povas esti utila kaj efika nur en la detruo kaj por la detruo mem, kaj en nenia okazo ĝi povas servi por la konstruo*.

Tial, la anarkiistoj ne kontraŭstarus iniciatojn, kiuj en la kadroj de la donita socio montriĝus efikaj por atingi iujn konkerojn, sen uzo de perforto. Kontraŭe, ili estus tre fe–liĉaj, se la profunda socia transformado, al kiu ili strebas, iun tagon evidentiĝus tute ebla, sen uzado de kia ajn formo de perforto por detruo de la malnovaj sociaj formoj. Kaj se ili akceptas perforton kiel defendrimedon, kiel batal– kaj detrurimedon, tio estas nur ĉar ĉi–lastaj trudiĝas de la hodiaŭ ekzistanta reĝimo de perforto kaj trudado konservanta la krudajn materialajn interesojn kaj socialajn privilegiojn, reĝimo, kiu ne estas inklina cedi, sen uzado de forto; la ĝisnunaj eventoj donis ne-

nian motivon kredi, ke la perforto estas evitebla en periodoj de profundaj sociaj skuoj, kiam detruiĝas malnova mondo. Se la morgaŭa socia evoluo alkondukus al malpliiĝo kaj malpeziĝo de la fomoj de perforto, la anarkiistoj ĝojus pro tia rezulto.

Estas rimarkinde kaj emfazinde, ke la anarkiistoj, ne estas kaj neniam estis admirantoj de la perforto, eĉ kiam ili ĝin akceptas kiel defend– kaj batalrimedon kaj fakte ĝin aplikas. Por ili, respekto al la homvivo, al la homperseco ĉiam estas superanta sento, eĉ en ilia sinteno al la malamikoj. Ne estas hazarde, ke la plej eminentaj teoriistoj de anarkiismo, kiuj ĉiam servis kaj servos kiel imitinda ekzemplo, estis alte humanaj personoj. Iu Elisee RECLUS, iu KROPOTKIN povas rivali laŭ humaneco kun ĉiuj fondintoj de religioj; el ĉia ilia penso, el ĉia ilia ago, eliĝas penetranta humaneco, senlima amo al la homo kaj nedetruebla fido al la bona principo en li entenata. En iliaj verkoj oni povas trovi eĉ ne unu ofendan vorton al la malamikoj. Ne alia, sed ja MALATESTA estas aŭtoro de la penso, laŭ kiu, se por la efektivigo de lia idealo devus starigi pendumiloj sur la publikaj placoj, li preferus rezigni tian idealon. Iu BAKUNIN, kiu personigas la revolucian spiriton de la 19a jarcento kaj, ĉiam prointerese estas prezentata de la malamikoj, iafoje en romaneska formo, alifoje kiel demono de perforto, profunde abomenis ĉian perfortagon, kaj en multaj lokoj en siaj verkoj li tranĉe sin esprimis kontraŭ perforto, kaj ne nur unufoje alprenis rifuzan pozicion kontraŭ individua teroro. Io pli, eĉ la teroristoj–anarkiistoj ne metis en la perfortagon venĝ- kaj sangavidecon, kaj ne estis inspiritaj de malnoblaj sentoj. Iu Luiza MIŜEL, kiun la policistoj

el ĉiuj landoj rigardis kiel organizanton de la perfortaj agadoj, en juĝejo defendas iun duonidioton, kiu kontraŭ ŝi aranĝis malsukcesan atencon. Tiel estas la sinteno al la perforto ĉe la anarkiistoj, ĉu ili estas teoriistoj kaj grandaj revoluciaj figuroj, aŭ la plej modestaj aktivuloj. Kaj tiel estas ĉar, se ili neas la hodiaŭan socion, estas ĝuste pro tio, ke ĝi en ĉiuj siaj manifestiĝoj prezentas la leĝigitan perforton, transformatan en sistemon. Refutante tiun socion, la anarkiistoj refutas la principon mem sur kiu ĝi konstruiĝas.

La tuta historia sperto pravigas ilian nean sintenon al la principa perforto. Nenio granda kaj daŭra estis kreita per la perforto. Ankaŭ nia nuntempo konfirmas tiun ĉi konstaton. Ĉiuj civilizacioj konstruitaj per perforto pereis, pereas kaj pereos post malfortiĝo de la perforto, kiu donis al ili apogon, kaj ili ne postlasas daŭrajn spurojn. Kontraŭe ĉiuj konkeroj, kiuj estis frukto de memvola, ofte senbrua sed ĉiam libera fortostreĉo de la homoj, restas kaj restos senmortaj.

La homo vivanta en socio ne estas nur politika aŭ ekonomia kategorio, li estas samtempe *kaj antaŭ ĉio* portanto de penso kaj volo, esprimanto de psikologia esenco. Ĉio, kio estas direktita kontraŭ la penso kaj volo, estas neado de lia homa esenco. Pro tio li ĉiam kaj profunde en si mem reagas kontraŭ ĉiaj trudoj, ĉia perforto kaj ĉia ekstera ago, kiu strebas piedpremi lian volon, ignori lian penson, submeti kaj senpersonecigi lian personon.

Plej freŝdata, plej proksima al niaj samtempuloj kaj plej komprenebla por ĉiuj hodiaŭ estas la bolŝevisma eksperimento post 1917 kaj la konstruo de »socialismo« en la t.n. »*landoj kun popoldemokratio*«. Ni ne opinias, ke la

adeptoj de tiu sistemo estas instigataj nur de ambicioj pri ordonpovo kaj diktaturo, kaj ke ne estas ankaŭ ĉe ili sinceraj streboj realigi pli bonan mondon. Sed ilia tragedio, kaj ankoraŭ pli la tragedio de la popoloj de ili sklavigitaj kaj submetitaj, estas, ke ili viktimiĝas de la sistemo, en kiu fundamenta principo kaj mova forto estas la perforto. La trudado kaj la perforto eĉ en la plej delikataj kaj kamuflitaj formoj provokas tian reagon, kiu kondukas ĝis plena neado de ĉio, kio estas fakte realigita, eĉ kiam en tia afero estas ankaŭ pozitivaj elementoj.

Kaj tial la anarkiistoj, bone konantaj la homhistorion, hompsikologion kaj perfortagon, proklamis la *principon de neperforto en konstruado de nova socio kaj en la homaj interrilatojn*: ili akceptas uzon de perforto nur kondiĉe kiel batalforton kaj necesan malbonon.

## Malcentralizado

»Ĉe la centralizado vi havas apopleksion en la centro kaj paralizo en la ekstremajoj«

LAMENE (Lamennais)

»Historio instruas al ni, ke troa centralizado en malgran–da skalo samkiel en granda skalo estas malutilaj; aŭtonomion oni devas agnoski de ĉia natura unuo: ekononia, spirita kaj eĉ nacia«.

T.G. MASARIK

*»Ĉia minacata povo sin turnas al centralizado«.*

Jean–François GRAVIER

En la ordinaraj, kurantaj, ĉiutagaj eldiroj oni ofte eraras, identigante federismon kaj malcentralizadon tial, ke ili fakte estas proksimaj kaj reciproke sin kondiĉas. Tamen, la neceso de precizeco devigas nin dislimi ĉi tiujn du nociojn respondantajn al du principoj. Federismo estas *maniero de funkciado*, dum la malcentralizadon karakterizas strukturo de *donita organizaĵo*. Sekve, la principo de federismo, kiun ni jam traktis, malgraŭ tio, ke ĝi postulas kaj kondiĉas la malcentralizadon, tute ne elĉerpas ĝin. La malcentralizado same presentas principon, kiu radikale distingas anarkiismon disde ĉiuj aŭtoritataj konceptoj. Tiu ĉi principo kontraŭstaras al centralizado karakterizanta ĉiujn organizojn kaj sociojn, kiuj konstruiĝas sur la aŭtoritataj principoj.

La akcelita kapitalisma disvolviĝo, sekvinta la vastan aplikon de la vapormaŝino en la komenco de la 19a jarcento, tenis la atenton de la sociologoj el tiu epoko kun centralisma tendenco, kiu konturiĝis kiel ununura kaj universala en la ekonomio, kaj maskis, kiel ofte okazas en la socia vivo kiam ĝi ne estas sufiĉe lumigita ideologie, la ekziston de ĉia alia tendenco. Preskaŭ ĉiuj socialistoj de la tempo 1848a akceptis la centralizisman tendencon kiel neeviteblan fenomenon de la kapitalisma evoluo. Ankaŭ MARKS nenion novan alportis tiurilate; li per sia aŭtoritato nur trudis koncepton, kiun multaj akceptis. La fakto, ke la tekniko trudas certan koncentradon al la entreprenoj –ĉe kio unuj el ili malaperas profite al pligrandiĝo de la aliaj– estis tiom evidenta, ke sufiĉis doni al ĝi duonsciencan argumenton, por ke ĝin akceptu la malmulte kritikema mezcerbo, kiel sociologian leĝon.

Kaj de tiam ĝis hodiaŭ, kaj kleraj kaj malkleraj, kaj malgrandaj kaj grandaj, papage ripetas banalajn verojn: »la granda industrio englutas la malgrandan«, »la granda fiŝo formanĝas la etan«, ktp. Unu jarcento elfluis de tiam, kaj la sablona analizo de la ekonomia evoluo pluestas por multaj sur la punkto de glaciiĝo de la Marksa dogma sociologio.

Tiu fatala eraro, kiel ĝenerale ĉia eraro, koncernante vastan rondon da homoj, tiom obsedis la malseriozajn sociologojn kaj ekonomikistojn, ke, kiam KROPOTKIN en 1898 publikigis anglalingve sian libron *Kamparoj, fabrikoj kaj metiejoj*, poste tradukita en ĉiujn lingvojn, la pensoj, kiujn li tie elmetadis estis konsiderataj de multaj kiel herezon en la ekonomika scienco; por aliaj ili montris ĝis kie povas iri naivaj sonĝoj de simplulo sen ia ajn scienca valoro, kaj ĉe triaj estiĝis nur ŝercmokon. En la lasta kategorio estis kompreneble sur la unua loko la tre memfidaj »*sciencaj socialistoj*«. La centralizisma narkoto tiom ebriigis la cerbojn, ke ili estis nekapablaj vidi la plej okulfrapajn fenomenojn, eĉ kiam ĉi–lastaj estis argumentitaj de efektiva scienculo, kiel estis KROPOTKIN.

Malpli ol duona jarcento sufiĉis por ke oni vidu realigitaj la verojn rimarkigitajn de KROPOTKIN, kaj por ke ĉi–lastaj estu ŝtelume akceptitaj eĉ de la hodiaŭaj bolŝevis–toj. Bedaŭrinde, la oficiala marksisma ekonomia scienco ankoraŭ sin ŝajnigas neaŭdanta, kaj ne havas la noblan kuraĝon konfesi sian eraron kaj la netakseblan meriton de KROPOTKIN, kies rekomendoj en tiu sfero trovas ĉiam pli vastan aplikon, kaj eĉ iĝas bazo de la oficiala ekonomiko en multaj landoj. Ne estas hazarde, kompreneble, ĉar laŭ la samaj sociologoj kaj ekonomikistoj –por

kiuj la socia kaj ĉia alia disvolviĝo en la homrilatoj kondiĉiĝas de la ekonomia kaj eĉ pli precize de la teknika disvolviĝo– la ekonomia centralizado devis esti sekvita de la socia centralizado, kies personigo estas la moderna ŝtato. Kaj ĝuste male por KROPOTKIN kaj por ĉiuj anarkiistoj la tendenco al ekonomia malcentralizado respondis al la ĉe la homo natura strebo al libereco kaj sendependeco; kaj ĝi aperis apliko en la donita okazo nur en unu fako –la ekonomia– de principo, kiu egale validas por la strukturo de la socio en ties tuteco. *La malcentralizado estas nedisigebla en sia plena aplikado de la anarkiisma koncepto pri la homo kaj la socio*. Tial la aŭtoritatuloj volas silente preterpasi la faktojn, profitante, laŭ neevitebla neceso, de la parta apliko de principo respondanta al la naturaj postuloj de la vivo.

Sed ni ekzamenu la problemon pli precize. La centralizado, kiel strebado kaj kiel principo, akompanis ĉian aŭtoritaton dum la tuta historia evoluado de la homaro; ĝi tamen manifestiĝas speciale forte ĉe la plena diskresko de la ŝtato –dum la periodo ekde la disfalo de la romia imperio ĝis hodiaŭa tempo– ĉe la apero kaj konstruado de la nuntempa moderna ŝtato nacia post la 16a jarcento. Sur la ekonomia tereno, kiu pli speciale nin interesas ĉi tie, la centralizado koincidas kun la apero kaj rapida disvolviĝo de la kapitalismo, ligita kun la malkovro en 1767 de la vapormaŝino, kies »erao« daŭras proksimume ĝis 1850, kiam grandaj sciencaj malkovroj kontribuas al la naskiĝo de la elektro, kiu per sia vasta apliko inter 1875 kaj 1900 disbatas la fundamentojn de la industria centralizado. MARKS kaj ĉiuj, kiuj ĝis hodiaŭ ne ĉesis dividi la koncepton, laŭ kiu la centralizado estas

neevitebla fenomeno de la teknika kaj ekonomia disvolviĝo, blindigitaj de la superanta tendenco dum tiu unua periodo nur unuflanke vidis kaj prezentis la nekontesteblan tendencon de la industria centralizado dum la vapormaŝina epoko. La karbodonaj tavoloj aperis determinanta faktoro kaj komanda centro. Fakte ankaŭ tie ĉi la geografia faktoro kondiĉas la rolon de la tekniko. Anglujo kaj poste Germanujo en la imago de la tiamaj ekonomikistoj en harmonio kun la interesoj de la supreniranta kapitalismo, prezentiĝis kiel nediskuteblaj centroj de la tutmonda industrio dank' al la ĉeesto de karbodonaj tavoloj, la ununura fonto de energio por moderna industrio. Tiel sur la nacia plano la regionoj riĉaj je ŝtonkarboj devis »*fatale*« iĝi komandaj centroj de la industria disvolviĝo, kaj la koncernaj landoj same tiel »*fatale*« devis transformiĝi en grandajn uzinojn por la cetera mondo, kondamnita esti liveranto de krudmaterialoj kaj agrokul–turaj produktoj kaj sklavigita konsumanto de iliaj indus–triaj produktoj. KROPOTKIN kiel vera, serioza kaj antaŭ sia konscienco respondeca scienculo, profunde trastudis same la eraon de ŝtonkarba hegemonio, kiel la sekvintan periodon de la liberiga elektro, ne kontentigante per la nesufiĉaj statistikoj tiamaj, sed li mem, aŭ kunlaborantoj–korespondantoj, surloke kontrolante la faktojn. Li laŭtigis protestan voĉon kontraŭ la eraro kaj pruvis, ke *paralele kun la centralizado en la industrio, efektiviĝas ankaŭ malcentralizado, kiu montris nenian signojn de plena engluto kaj forigo de la etindustrio* –kontraŭe, ĉi–lasta ofte aperis eĉ pli vivkapabla. Li emfazis same, ke sur la internacia plano la *geografia malcentralizado manifestiĝas ĉiam pli kaj pli potence, ke la popoloj strebas disvolvi sian propran industrion*. Tiu ĉi tendenco, laŭ li,

unisone kun la vera idealo de la homo, kiu estas proksimigi la fabrikon al la kamparo, la sciencan laboratorion al la metiejo, por atingi integradon de la intelekta, fizika aŭ permana laboro, kiu, ununura, povas garantii la homan harmonian disvolviĝon, bazon de ĉiuflanka progreso. Kaj la vivo, kiel ni vidos, konfirmis tiujn konceptojn.

La centralizado geografia kaj teknika de la industrio estas ankaŭ fakto, kiun KROPOTKIN neniam neis. Konvenas rimarki tie ĉi, tamen, ke ankaŭ la ekspliko de tiu ĉi fakto estas unulatera flanke de la marksistoj. La potenca industriigo kiel la centralizado en la industrio estis decidige helpata de la *ŝtata interveno*, kiu ruinigis la agrokulturon kaj perforte proletigis la kamparanojn en Anglujo por krei la necesan manlaboron. Plej konvinka kaj okulfrapa estas la administra–ŝtata rolo en la mortiga centralizado, artefarite enplantita en Francujo, kaj kiun hodiaŭ unuanime kontestas la plej elstaraj intelektuloj en tiu ĉi lando. Ĉiuj sociologoj, ekonomikistoj kaj historiistoj hodiaŭ konfesas, ke tiu ĉi sufokanta centralizado, kontraŭ kiu oni gvidas jam organizitan kaj laŭplanan lukton, radikiĝas en la administra politiko de la francaj ŝtatistoj jam en la tempo de RICHELIEU, COLBERT, la Granda Franca Revolucio, NAPOLEONO la Unua kaj NAPOLEONO la Tria. Por tiu politiko Parizo estas Francujo. Ĉio devis centraliziĝi tien. Eĉ rigardante la fervojreton sur la landmapo, oni komprenos ĉi tiun politikon, kiu neniel estas diktata de ekonomia–geografiaj kaj teknikaj konsideroj. De la plej superaj postenoj oni hodiaŭ alarmas kontraŭ tiu ĉi centralizado. Specialaj oficoj kaj institucioj hodiaŭ estas komisiitaj malcentralizi. Oficiala komuniko antaŭ kelkdudek jaroj publikigita asertas, ke

6.043.693 personoj sufokiĝas en radiuso de 25 kilometroj de Parizo kaj, ke de la trideka kilometro komenciĝas »la franca dezerto«.

La monstra centralizado maltrankviligas ne nur Francujon, sed ankaŭ ciujn ceterajn industriajn landojn, kie la grand–urboj estas veraj frenezulejoj kaj menaĝerioj, ĉiutage englutantaj milojn da viktimoj nur pro la trafikaj malhelpoj, sendepende de ĉiuj afliktaj kaj domaĝaj konsekvencoj kaj de plikariĝo de la ensocia vivo. Anglujo kiel unua reagas. Usono ankaŭ ne malfruiĝis por entrepreni antaŭzorgojn kontraŭ la centralizado. La demando estas tiom vasta, la tiurilataj donitaĵoj estas tiom riĉaj, ke tutan libron oni povus verki kiel kompletigon kaj konfirmon de la antaŭvidoj de KROPOTKIN[2]. Eĉ la Stalina Ruslando ne restis, almenaŭ laŭ vortoj, malantaŭe. La sesa kvinjara plano antaŭvidas: »*certigi plibonigon de la distribuado de la produktantaj fortoj, alproksimiĝon de la industrio ĝis la krudmaterialaj fontoj, ĝis la termoelektrocentralaj fontoj kaj ĝis la konsumantaj regionoj. Certigi la prudentan specialiĝon kaj la konpleksan evoluon de la ekonomio en ekonomiaj regionoj, konsidere al la plej kompleta kaj efektiva utiligo de la naturaj riĉofontoj kaj manlaboran rimedoj cele al plikreskado de la produktiveco de la socia laboro*.« Tio ĉi estas nek pli nek malpli ol la malcentralizado en la industrio, antaŭvidita kaj rekomendita de KROPOTKIN.

Ni ne intencas tie ĉi esprimi nian opinion pri la antaŭ–zorgoj faritaj tie ĉi kaj tie por efektivigi la necesan mal-

2 Al tiuj, kiuj scipovas la francan lingvon ni arde rekomendas la studon de JF. GRAVIER *Malcentralizado kaj teknika progreso* Flammarion, Paris 1953. 394 paĝoj

centralizadon, nek fari tiurilate antaŭvidojn. Tiu ĉi tasko ne havas lokon en nia temo. Ni povas nur diri, ke ni neniel iluziiĝas rilate al la ebloj realigi tian malcentralizadon –antaŭviditan kaj defendatan de la anarkiistoj– en la kadroj de ŝtatkapitalisma socio. Nia celo estas emfazi, ke unu el la fundamentaj principoj de la anarkiisma sociologio –la malcentralizado– estas entute konfirmita de la nuntempa socia evoluo. La morgaŭa apliko de la atomenergio, post tiu de la elektro, efektivigos teknikrilate kompletan realiĝon de tiu ĉi principo.

## Komunismo

Inter la granda nombro de la nemezureblaj malbonaĵoj, kiujn la marksismo kaj pli speciale la bolŝevismo kaŭzis al la homaro kaj al la liberiga socia movado, estas ankaŭ la eraroj, kiujn ĝi ensemas en la konscion de niaj samtempuloj rilate al la komunisma principo, la bato, kiun ĝi donis al la komunismo –ne al la principo mem, sed al la nomo. Kiom malfacila estas hodiaŭ la tasko de tiuj, kiuj ne nur devos realigi tiun principon de la plej supera justeco, sed ankaŭ dispeli –antaŭ ĉio– la netravideblan nebulon de la amasigitaj trompaĵoj.

Kiam oni prononcas hodiaŭ la vorton »komunismo«, en la imago de ĉiu neinformito ekstaras la ideo pri laŭplane organizita politika reĝimo de trudado, de sistema perforto, de obskurantisma tiraneco, de ĉiuflanka senigo je libereco, de mizero kaj malsato.

Dum la vero estas, ke komunismo ne estas politika sistemo kaj politika principo, ke la marksistoj el ĉiuj specoj kaj disbranĉiĝoj inkluzive tiujn, kiuj nomiĝas komunistoj, ke nek MARKSO, nek LENIN, nek TROCKI, nek STALIN

iam estis komunistoj. Komunismo estas »*ekonomia principo*«, t.e. baza principo por mastrumado de la ekonomiaj rilatoj inter la homoj, maniero de posedo super la naturaj kaj sociaj ricaĵoj, de produktado de materialaj havaĵoj kaj de ties distribuado.

En la ekonomiko estas ĉefe tri principoj regantaj la produktintersanĝojn kaj konsumadajn rilatojn inter la homoj: la unua (1), la privatposeda, principo karakterizanta la hodiaŭan kapitalisman socion; la dua (2), la kolektivisma principo, kiu antaŭvidas socian posedon de ĉiuj produktrimedoj kaj socialigitan produktadon de la materialaj havaĵoj, sed ties dispartigon konforme al la *kvanta laborpartopreno* en ties produktado aŭ en la servoj faritaj al la kolektivoj kaj la tria (3), la komunisma principo, kiu antaŭvidas socialigitajn posedon kaj produktadon, sed dispartigon *laŭ la bezonoj*, kaj la laborpartoprenon laŭ la fortoj kaj la kapabloj.

Estas vere, ke en la verkoj de la marksistaj teoriistoj el ĉiuj varioj de aŭtoritata socialismo, renkontiĝas dekla–roj pri akcepto de la komunisma principo kiel tre ĝenerala principo. Sed en ĝia konkreta traktado de la demando pri la produkt–konsumaj rilatoj en socialisma socio, ĉiuj marksistoj senescepte –inkluzive de tiuj, kiuj preferis esti nomataj komunistoj– ĉiam akceptis, rekomendis kaj disvastigis la kolektivisman principon. Tiu principo praviĝas per la teorio mem de la valoro proponita de Adamo SMIT, RICARDO kaj ROTBERTUS, kaj akceptita, plendisvolvita kaj falsprezentita de MARKSO, laŭ kies difino la valorkriterio estas la kvanto de la uzita laboro aŭ »*socie necesa laboro*« por la produktado de la havaĵoj; absurda mezuro kaj mem nemezurebla. Tiu kvanto da

laboro, kiun neniu iam sukcesis kaj sukcesos mezuri, devas servi kiel mezurilo ĉe la dispartigo de la materialaj havaĵoj konforme al la kolektivisma principo, kiu estas definitive disvolvita kaj argumentata de la marksistoj, kaj kiu trovis sian aplikon sub karikatura formo en Ruslando kaj ties satelitoj.

Sekve, la marksistoj el ĉiuj koloroj nek teorie nek prak–tike iam havis kaj havos ion komunan kun komunismo. Tio ĉi estas tiom klara, ke ĉiu elemente informita homo povas miri, ke povis disvastiĝi kaj subteniĝi tia absurda trompo.

En la historio de la socialistaj ideoj, la ideo pri komunismo kaj formulado de la komunisma principo antaŭiras la aperon de marksismo kaj anarkiismo. Ĝiaj partizanoj estas Louis BLANC, FOURIER, CABET, PECQUEUR k.a. el t.n. »Utopiistoj«. En sia primara formo ĝi prezentiĝas kiel kazerna, monaĥeja principo de egaleco. Tial, PRUDON ĝin kontestis kaj sin deklaris kontraŭkomunisto. MARKSO kaj ENGELS, publikigante *La Komunistan Manifeston*, en kiu ili argumentis por la ideo pri ŝtata socialismo, ankoraŭ pli forpuŝis de la komunismo tiujn, por kiuj la ideo pri socialismo estis nedisigebla de la ideo pri libereco. Tial, BAKUNIN kaj liaj amikoj en la Unua Internacio, malgraŭ tio, ke ili ne estis esence malproksimaj de la komunista principo –kiel ĝin difinis kaj akceptis iliaj disciploj: KAFIERO, MALATESTA, KROPOTKIN, RECLUS, k.a.–, preferis nomiĝi kolektivistoj, por ne esti konfuzitaj kun la aŭtoritat–socialistoj, nek kun la »Utopiistoj« kun ties kazerna–monaĥeja komunismo. Ankaŭ pro tio la hodiaŭaj anarkiistoj–komunistoj ofte nomas sian komunis–mon anarkiisma, senestreca aŭ simple libereca komu-

nismo. Kaj fakte estas nur unu komunismo: tiu ĉi, kiu estas determinita de la principo: »de ĉiu laŭ ties fortoj, al ĉiu laŭ ties bezonoj«. Kaj ĝi ne povas esti alia, krom libera.

Historie naskiĝante kiel neado de la rajto de unuj eks–pluati alies laboron profitante de la akirita monopolo su–per la tero, la naturaj kaj sociaj riĉaĵoj kaj la labor– kaj produktrimedoj, la principo de komunismo estis formale akceptita de la anarkiistoj unuafoje en Italujo en 1876 ĉe la kongreso de la Internacio en Florenco, sekve de raporto de KAFIERO subtenita de MALATESTA. Ĝi poste estis ellaborita kaj vaste argumentita de KROPOTKTN kaj pro tio ĉi–lasta estas konsiderita kiel teoriisto de la komunismo difinita kiel anarkiisma.

En kio pli precize konsistas la principo de komunismo kaj kiu estas ĝia praviĝo?

Kiel principo, komunismo estas tiom malnova kiom la mondo. Malgraŭ tio, ke ĝi estas ekonomia principo, t.e. principo reganta la ekonomiajn rilatojn –produktadajn kaj konsumajn– komunismo esence estas principo etika. Ĝi spegulas la eternan kaj profundan senton de justeco, kiu en la kristanismo, en pli limigita formo, prezentiĝas kiel amo al la proksimulo kaj kiel korfavoreco al la necesbezonantoj kaj suferantoj, kio en la etiko kunfluas kun la sento de solidareco, kaj en sociologio identiĝas kun la vivorajto.

Ĉia homo pro la forto de sia naskiĝo kaj ekzistado kiel produkto de la socio kaj ties nedisigebla parto, havas la plenrajton ĝui la bonaĵojn, kiujn li trovas ĉirkaŭ si –la naturajn riĉajojn kaj sociajn bonaĵojn– por kontentigi siajn

bezonojn kaj asekuri sian vivon. Neniu al iu ajn kaj nome de io ajn povas kontesti tiun rajton. La rajto –kia ajn estas tiu rajto– ne eliminas la devigojn kondiĉe –ununura kaj necedebla kondiĉo– ke tiu, sur kiun nature falas la devigoj estu kapabla ilin plenumi. De tio, la formulado: ĉiu havas rajton, plenan kaj necedeblan rajton, kontentigi siajn bezonojn per la socie kolektitaj bonaĵoj. Sed ĉar tiuj bonaĵoj, nek kiel naturaj riĉajoj nek kiel fruktoj de la homlaboro, estas neelĉerpeblaj, ĉiu sana, laborkapabla, konvene aga homo estas socie devigata partopreni per sia laboro en la produktado de bonaĵoj laŭ siaj fortoj kaj kapabloj.

Kiel morala principo komunismo sendube staras je neatingebla alteco kompare, ne nur kun la *privatproprieto -principo* de posedo de la produktrimedoj kaj de dispartigo de la bonaĵoj, frukto de la homlaboro –sed ankaŭ kun kolektivismo, ĉar nur ĉe ĝia plena apliko povas realiĝi egaleco, kies adeptoj estas ankaŭ la kolektivistoj. Sed kiel principo de dispartigo de la sociaj bonaĵoj kaj kiel bazo de ekonomi-sociaj rilatoj, ĝi estas ne nur la plej justa, sed ankaŭ ununure racionala principo. Neniu povas iel pravigi sian rajton ekskluzive posedi donitajn riĉajojn, kaj je ĉi–lastaj senigi la aliajn. Tio estas tiel klara, ke ĉia disputo estas superflua. Koncerne la produktrimedojn aŭ la produktatajn kaj kreitajn bonaĵojn, eĉ kiam ili ne estas unuarigarde la laborfrukto de tiu, kiu ĝin posedas pro la premo de la cirkonstancoj, ili same apartenas al la socio en ties tuteco kaj en historia perspektivo. Ĉio, kio nin ĉirkaŭas, estas frukto de la nemezureblaj penoj de multaj –de ĉiuj– pasintaj kaj hodiaŭaj generacioj de laborantaj homoj, de intelekta kaj fizika laboro,

de la scienco kaj de la tekniko. Kiu povas elmezuri –kaj ĉu praktike estas eble?– la parton de persona laboro en donita intelekta aŭ materiala bonaĵo? Nek uzita tempo, nek farita fortostreĉo, se oni povus ilin mezuri per ia instrumento, nek la nombro kaj la pezo de la produktitaj objektoj povas servi kiel mezurilo. Pro kiu rajto tiam iu povas pretendi, ke la donita bonaĵo apartenas al li ekskluzive pro la cirkonstancoj, ĉar li partoprenis per laboro en ĝia kreado aŭ ke li ĝin akiris per intersanĝo de alia egalvalora bonaĵo, kies valoro estas same arbitre determinita? Kian scienc–ekonomian valoron povas havi dispartigo de la bonaĵoj bazita sur kolektivisma principo: »al ĉiu laŭ laboro kaj meritoj«? Ĉu ne estas absurde, ekzemple, aserti eĉ pri intelekta bonaĵo tia, kiel oni povas konsideri la nunan ĉapitron, ke ĝi estas ekskluzive laborfrukto de sia aŭtoro kaj devas ekskluzive al li aparteni, aŭ ke li devas ricevi por ĝi pagon aŭ ĝui sociajn bonaĵojn respondantajn al la kvanto da de li efektivigita laboro? Ĉu li apartenas mem al si? Ĉu li povus verki ĉi tiun ĉapitron, se la socio en sia tuteco kaj granda nombro da malfacile difineblaj kaj ankoraŭ pli malfacile mezureblaj faktoroj ne estas lin kreintaj, formintaj kaj asekurintaj en lia persona ekzistado? Kio li estus, eĉ en la sfero de la ideoj, kiujn li esprimis kaj elmetis, se ne estus malantaŭ li, kaj malantaŭ ĉiuj ni, grandega komunhavo de kulturo, scioj kaj la penoj ofte superhomaj? Eĉ la inkludita en lian plumingon socia laboro, en kiu li neniel partoprenis, estas nemezurebla, kaj sen tiu ĉi plumingo li ne povus esprimi siajn pensojn.

Koncerne realigon de la komunismo kiel ekonomia sistemo, ni havos okazon alifoje paroli. Tiu ĉi principo en pli

limigita formo ĉiam trovis, kaj ankoraŭ hodiaŭ trovas aplikon. Ĉiuokaze la moskva sistemo de egipta sklaveco –kun sia staĥanovismo, neado ne nur de komunismo sed ankaŭ de kolektivismo, ĉar ĝi okulfrape prezentas prirabadon de alies laboro, kaj servas kiel piedestalo por la staĥanovisto– en nenia grado povas servi kiel ekzemplo.

## Neado de la leĝo

»La senkondiĉa regado de la racio –jen la principo, kiu anstataŭos la leĝon«.

W. GODWIN

*»La leĝoj! Araneaĵo por la riĉuloj kaj potenculoj, nefrakaseblaj katenoj por la malfortuloj kaj malriĉuloj; fiŝis–taj retoj en la manoj de registaro«.*

PRUDON

»La leĝoj, faro de iu leĝodonanto dieca aŭ homa, individua aŭ kolektiva, kaj eĉ se ili estus balotitaj per universala voĉdonado, estas leĝoj despotaj, fremdaj kaj malamikaj pro neceseco al la homoj kaj aĵoj, kiujn ili devas regi; tio ne estas leĝoj, sed dekretoj al kiuj homo submetiĝas ne pro ia interna neceseco kaj pro natura inklino, sed pro trudo de iu ekstera –dieca aŭ homa– forto; arbitraj ordonoj al kiuj la socia hipokriteco plej ofte senkonscie donas la nomon ›leĝo‹.«

BAKUNIN

»La protekto de la ekspluatado –senpera per la leĝoj pri la proprieto kaj nerekta per la apogo de la ŝtato– jen la esenco kaj senco de la nuntempaj leĝoj kaj la ĉefa zorgo de niaj

multekoste pagitaj leĝofaraj kunvenoj.«

KROPOTKIN

*»La leĝo ekzistas nur por la sklavoj«.*

Ĥristo BOTEV

La proklamo kaj la plena realiĝo de la principoj de libereco, solidareco, egaleco, justeco, libera iniciato, libervola kontrakto, federalismo, senestreco, ateismo, internaciismo, kontraŭmilitarismo, neperforto, malcentraliz–ado kaj komunismo –fundamentaj principoj de anarkiismo, el kiuj speguliĝas eternaj streboj de la homo al pli plenaj feliĉo kaj bonstato, streboj karakterizaj por ĉiuj tempoj kaj ĉiuj homoj; la plena efektiviĝo kaj daŭra stariĝo de ĉiuj ĉi principoj en la homrilatoj en la homsocio, postulas kaj trudas senkondiĉan kaj plenan rifuzon de la trudado, subpremado, kaj ĉiuspecaj perfortoj, de la persona kaj kontraŭsociala egoismo, de la ekspluatado en ĉiuj ties formoj, de la maljusteco, de ĉiuj religioj agnoskantaj eksteran diecan aŭtoritaton, de ĉiuj formoj kaj manifestiĝoj de ordonpovo, de la naciismo kaj kun ĝi ligita militarismo.

Ĉio ĉi, kion anarkiismo neas, prezentas la *principojn de aŭtoritato*, kiuj resumiĝas per unu principo: *la rajto de iuj homoj aŭ homgrupoj* –kiuj en la diversaj aŭtoritataj socioj el la diversaj epokoj portas diversajn nomojn– *regi super aliaj homgrupoj aŭ super ĉiuj ceteraj homoj*. Tiu rajto povas esti agnoskita aŭ neagnoskita de tiuj, kontraŭ kiuj ĝi ekzerciĝas, ĝi povas esti perfekte arbitra

kaj esprimi nur iun krudan forton, iun fizikan aŭ materialan superregadon, kaj malgraŭ tio havi realan esprimon kaj pli–malpli longan daŭron. Sed en la nuntempa epoko moderna, la rajto de regado de la homo super la homo akiras sian plenan efikecon, nur kiam ĝi estas vestita per laŭleĝa formo, kiam ĝi estas *leĝo*. Jen kial, ĉiuj ĉi principoj de aŭtoritato, kiujn anarkiismo refutas, sin apogas sur la jura rajto, sur la *skribita leĝo*, kaj ilia neado neeviteble kondukas ĝis *neado de la leĝo mem kaj de la rajto edikti leĝojn*. Per tio anarkiismo atingas la medolon mem de sistemo, kiun ĝi refutas, kaj per tiu refutado ĝi starigas sian lastan principon, kiu sintezas la tutan anarkiisman filozofion socian. Per tio ni tuŝas la plej delikatan por la nuntempaj homoj problemon koncernantan la plej krustiĝintajn antaŭjuĝojn de obskura stratumiĝo de multnombraj jarcentoj.

La esenco de la leĝo estas determinita de ĝia origino kaj el ĝia historia rolo. Tri diversaj elementoj partoprenas en la kreado de la leĝo. Kronologie, la unua elemento, kiu jam iomete determinas ĝian karakteron kaj ĝian hodiaŭan socialan rolon, estas la *kutimjuro*. La homaro vivis dum jarcentoj sen havi kaj sen koni skribitan leĝon. Al ĝi sufiĉis *kutimoj, moroj, tradicioj*. Ĉi tiuj kreiĝis kiel rezulto de kunvivado. Estas rimarkinde, ke eĉ hodiaŭ la kutimjuro okupas multe pli vastan lokon kaj ludas multe pli gravan rolon en la homrilatoj ol la skribita leĝo. Sed tiu kutimjuro konsistas el du kategorioj de kutimoj, tradicioj kaj moroj per diversa origino kaj diversa karaktero. La unua kategorio ampleksas la kutimojn utilajn por la ensocia vivo, kaj estas naskitaj de sentoj, kiuj strebas al reciproka solidareco, kaj al garantio de la ekzisto mem

de la socio. Tiaj estas la kutimoj kaj moroj pri gastameco, estimo kaj respekto al la homvivo, la sentoj de reciprokeco, de sociala solidareco, de kompato al la malfortaj, senprotektaj kaj bezonantaj homoj, atinginte ĝis memofero kaj braveco. Ili radikiĝas en la socia naturo de la besto–homo. La religio havas nenian meriton pri ilia kreo, ĝi nur ilin malbonuzis, injektis en ilin »*diecajn elementojn«*, por ilin enjungi por la servo de al la homo fremdaj interesoj. La dua kategorio de *kutimoj*, kiuj havas saman naturan devenon sed estas *malutilaj* por la kunvivado kaj *por la homa progreso* ĝenerale, radikiĝas en la negativaj deziroj kaj sentoj de superregado, de trudado de ies volo al aliuloj, de konkero, de prirabo por akiro de bonaĵoj kaj vivkondiĉoj permesantaj utiligi alies laboron ktp. De tiuj ĉi sentoj kaj pasioj ĝuste profitas la diversaj religiaj gvidantoj, idolpastroj, magiistoj, ktp, kiuj ilin uzas por korupti la morojn per injekto de nova elemento en la origino de la leĝo. Tio ĉi estas la *koncepto* pri la *malvirteco de la homo*, pri la peko. Tie ĉi ĝuste estiĝas la interveno de la religio, kiu kondiĉas la »*diecan«* karakteron kaj devenon de la leĝo. Ĉiuj religioj subtenas kun diversaj nuancoj kaj variantoj la koncepton laŭ kiu la homo portas en si elementon de la peko, kaj pro sia materiala origino estas inklina defali en pekon. Por ke li estu antaŭgardita de ĉi–lasta, li bezonas »superan protekton«, bonintencan, eksteran volon, spirita–diecan forton. Tiu ĉi ekstera, »supera« forto devas lin direkti, lin gvidi, dikti al li kondutregulojn kaj li devas per plena fido fordoni sin al ĝi, obei al ĝi, por ke li ne peku, aŭ se li tamen pekas, li povu denove trovi »la vojon«. Pro tio ankaŭ estiĝas la diversaj reguloj, instruoj kaj »*ordonoj«*, kiuj per la buŝo de la idolpastroj kaj diservistoj la »supe-

ran« forton donas al la homoj. Tiel estas la deveno de la *»Dek Di-ordonoj«* proklamitaj de la supro de Sinajo; kaj la defendantoj de la potenculoj, riĉuloj kaj privilegiuloj sukcesis enŝovi en la kutimjuron ĉiujn elementojn necesajn por konsekri la instituciojn de ekspluatado kaj subpremado senpere post la ordonoj: »Ne mortigu!«, »Ne ŝtelu!«, ktp; ili ne preterlasis aldoni: »Oferdonu al Dio kaj pagu al kultservisto dekonaĵojn!«, »Ne avidu la edzinon kaj la azenon de cia proksimulo!«, ktp. Poste, tiujn aldonaĵojn kaj suplementojn ili plimultigis, plivastigis kaj multobligis per rimedoj taŭgaj por sklavigi la spiritojn, en kio nuntempe povas konkuri nur la marksaj heroldoj. »La tuta nia religia, historia, jura kaj socia edukado – skribis KROPOTKIN en *La moderna scienco kaj anarkio* (p.41 en la franca eldono)– estas penetrita de la ideo, ke homo, se li estus lasita al si mem, transformiĝus denove en sovaĝbeston«. Sed la »ĉiuamanta« Dio kaj speciale liaj surteraj reprezentantoj siatempe zorgis elforĝi al si leĝojn, kiuj, de diecaj, ne malrapidis transformiĝi en kreaĵojn de l' homo por pravigi ne nur la religian sed ankaŭ la surteran povon.

Tiel oni atingas la trian elementon enkalkulitan en la leĝodeveno: *la perforton*. Kun diskresko de la homaj kunloĝejoj kaj de iliaj kolizio kaj konfliktoj, ekaperas la unuaj internaj disiĝoj de du malamikaj tendaroj, ĉiu el ili strebante trudi sian volon kaj firmigi la akiritan aŭtoritaton. La venkinto trudis sian leĝon, sanktigitan de la idolpastro, kiu ne malfruis alianciĝi kun la unua. Komprenebla tio ĉi ne fariĝis en unu tago; longdaŭra procezo de firmiĝo de la potenculaŭtoritato efektiviĝis, ĉe kiu la *skleroziĝo de la kutimoj* –speciale de la dua kategorio: ru-

tinemo, konservativemo, timo de sanĝoj, kiuj same karakterizas la homan starantan sur pli malalta evoluŝtupo– ludis ne sengravan rolon. Kreita por asekuri la frukton de la forrabo, de la konkero kaj ekspluatado, la leĝo ne ĉesis firmiĝi.

En hodiaŭa tempo la leĝoj povas dividiĝi en tri ĉefajn grupojn. La unua kaj plej grava grupo ampleksas *la leĝojn, kiuj celas la defendon de la proprieto kaj kapitalo*. La defendo de la proprieto eĉ en la socialismaj konstitucioj estas enskribita. Sub la kapitalisma reĝimo de privilegioj kaj monopoloj ne temas pri la defendo de fruktoj de persona laboro, sed male pri la defendo de la proprieto, kio signifas ĝuste garantion de la forrabitaj fruktoj de alies laboro –en tio estas la kvintesenco de la principo. Eĉ kiam la leĝo garantias la proprieton de loĝejo, per tio ĝi leĝigas la forrabitan aŭ ne plene pagitan laboron necesigitan, ĉar neniu loĝejo estas frukto de la persona laboro de tiu, kiu ĝin posedas. Ĉiu havaĵo, ekzemple la menciita loĝejo, kiam ĝi estas en grande loĝata centro, krom la nepagita laboro fremda, enhavas ankaŭ socian valoron devenantan de la komuna progreso. Henry GEORGE multe prave emfazas, ke terpeco en Nov–Jorko pli multe kostas ol la oro, per kiu ĝi povus kovriĝi. Kaj kiam la leĝo garantias la proprietrajton de la posedanto de tiu terpeco ricevinta tiom altan valoron sekve de la urba diskresko kaj de la serio de teknikaj, kulturaj, ktp konkeroj, ĝi garantias forrabon al la socio, ĉiuj civilleĝoj en ĉiuj landoj havas kiel objekton tenadon de similaj alproprigoj kaj monopoloj de malmultaj homoj, domaĝe al la ceteraj. Eĉ granda parto de la punleĝoj, koncernantaj krimojn faritajn en ligo kun havaĵoj,

fakte apartenas al la sama kategorio de leĝoj, kiuj defendas agnoskitajn monopolojn kaj privilegiojn.

La dua kategorio de leĝoj estas el tiuj, *kiuj tenas kaj defendas la registarojn* kaj ĉiujn ŝtatajn organojn kaj instituciojn. Grandan parton el tiuj leĝoj oni povas envicigi en la unuan kategorion; tiaj estas la leĝoj pri diversaj impostoj, taksoj k.a., kies destino estas favori malrekte kaj kelkfoje rekte iujn ekonomiajn tavolojn; kaj ĉiuj aliaj leĝoj el tiu grupo, subtenante la ŝtaton, malrekte servas la kapitalistojn, kies servisto estas la ŝtato.

La kontraŭsociala, perforta kaj malutila karaktero de tiuj du grupoj de leĝoj estas evidenta. Nur la interesataj defendantoj de la nuntempa ŝtatkapitalisma sistemo povas ŝajnigi, ke ili tion ne vidas. Alia estas la demando pri la tria kategorio: la leĝoj por defendo de la individuo, kiel la trompoj estas plej malfacile detrueblaj. Multaj estas tiuj, kiuj ilin konsideras kiel nepre necesajn. Ili ne povas prezenti al si, kiel oni vivus en socio, kie tiaj leĝoj mankus. Plendetalan respondon ili trovos en tiu parto de nia programo, kiu koncernas la problemojn de rekonstruado. Tie ĉi ni nur principe kaj rapide povas respondi.

Granda parto de la krimoj hodiaŭ faritaj kontraŭ la homa persono estas rekte ligitaj kun la ekzisto de la proprieto, ŝtato kaj eĉ al la leĝo mem kaj la institucioj, ligitaj al ties ekzisto: juĝejoj, malliberejoj, punoj ktp. Kun malapero de la tuta hodiaŭa sistemo ili neeviteble malaperus, sed eĉ en la hodiaŭa sistemo, se la leĝon oni forigus, la krimoj koncernantaj la personon ne nur ne pligrandiĝus laŭ nombro kaj dimensio, sed eĉ malgrandiĝus.

En ĉiuj okazoj la leĝoj, al kia ajn kategorio ili apartenas, ne estas esence destinitaj gardi la socion, sed la regantojn, la proprietulojn kaj la kapitalistojn. Tio ĉi estas determinita de ilia deveno, de ilia historia rolo kaj de la karaktero de la hodiaŭa sistemo socia, kiu dividas la homojn inter privilegiuloj kaj malfavoratoj. Tio ĉi gravas ankaŭ por la socioj, kiuj nomas sin »socialismaj«.

Du vortojn ankaŭ pri iu nova kategorio: »*la socialaj leĝoj*«. Sufiĉas rimarkigi nur, ke ĉiuj akiraĵoj, kiuj estas objekto de tiuj leĝoj, estas frukto de lukto de la laboris–toj, sed ne donaco. Tiuj leĝoj nur registris truditan real–aĵon, tiel grave kaj intence estas kripligitaj la akiraĵoj konkeritaj per longaj kaj malfacilaj luktoj kaj viktimoj. Tiuj ĉi akiraĵoj tamen ekzistus sen konsekrado fare de sociala leĝaro laŭ tio, ĉu ili estus respektataj kaj ne piedpremataj, ĉar ili estas rezulto ne de la leĝo kaj bondeziro de la leĝdonanto, sed de *realaj fortorilatoj* en konstanta lukto. Kaj tamen sensignifan parton prezentas la socialaj leĝoj el la miloj da aliaj leĝoj, kiuj naskiĝas tiel rapide, ke eĉ la juristoj ofte ilin ne konas, leĝoj kies destino estas teni la subpremadon, maljustecon, ekspluatadon, neegalecon, perforton kaj la tutan ŝtatan aparaton, personiganta ĉion negativan en la homsocio. Konsekvence, la konstruo de nova mondo postulas, trudas neniigon de *la leĝo* –bazo de la tuta nuntempa sistemo socia.

# Institucioj de la aŭtoritato

Se ni provas konkretigi en unu baza kaŭzo la kaŭzojn de ĉiuj malbonoj suferataj de la homoj ĉe la nuntempa soci–strukturo, ĉi tiun unuan fonton oni povas esprimi per nur unu vorto: aŭtoritato –ekonomia, politika kaj spirita. Tiuj tri fundamentaj formoj de la aŭtoritato –esprimo de unu kaj sama principo: la rajto de regado de l' homo super la homo– estas prezentitaj en la tri historiaj institucioj, kiujn anarkiismo refutas: la proprieto, la ŝtato kaj la eklezio. La proprieto reprezentas la ekonomian regpovon, la ŝtato –la politikan, kaj la eklezio –la spiritan regpovon. Tiuj tri sociaj institucioj, parazitaj elkreskaĵoj sur la homsocio, havas malsaman agon, sed, de la momento kiam ili aperas sur la historia scenejo, plej ofte ili sin manifestas kiel aliancanoj, malgraŭ tio ke ili iafoje rivalas kaj militas inter si por superregado. Finfine ili ĉiam venas al paco kaj interkompreniĝo por sklavigi la homon. La »teritorio« de tiuj tri institucioj de la aŭtoritato ne estas rigore limsignitaj, malgraŭ ke ĉiu el ili prezentas determinitan formon de regpovo. Ofte okazas, kiel ni vidos, ke estiĝas iu interplekto kaj samtempa praktiko de ĉiuj formoj de regpovo fare de unu aŭ alia el tiuj institucioj. Tiel la eklezio ofte strebas ne nur esti »pastisto de la animoj«, sed ankaŭ praktiki politikan ordonpovon, kiel ankaŭ partopreni en la ekspluatado de l' homo, kiel proprietulo kaj kapitalisto. La proprieto kaj kapitalismo ankoraŭ pli ofte praktikiĝas samtempe kun la ekonomia

aŭtoritato, politika kaj spirita povo. Same la ŝtato –la plej tipa formo de la regado super la homo– neniam en la daŭro de la tuta historio homa ĉesigis la strebadon al koncentrado en siaj manoj, kaj nur en siaj manoj, de la super la homoj plena regado politika, intelekta kaj ekonomia. Tia estas ĝia fundamenta tendenco, kiu ĉiam pli realiĝas en la nuntempa epoko. Tial la anarkiistoj ne ĉesante ataki ĉiujn formojn de aŭtoritato, diference de la marksistoj, atribuas unuaecan gravecon al la ŝtatdetruo en la procezo de la socia rekonstrŭo.

## La ŝtato

La problemo pri la ŝtato, el ĉiuj problemoj, kiujn ĝis nun studis la anarkiisma mondkoncepto, estas la plej bone ellaborita. La anarkisma priŝtata koncepto, kompare kun ĉiuj aliaj sociaj doktrinoj kaj movadoj, estas la plej bone argumentita. Tion ĉi ne povas ne konfesi ĉia bona historiisto, ĉia senpartia kaj honesta esploristo de la sociaj doktrinoj kaj movadoj, kiujn konis la homaro. La anarkiisma kritiko, la anarkiisma rifuzo de la ŝtato estas tiel bone argumentataj, ke sub iliaj batoj ĉiuj fleksiĝas. Estas interesa kaj karakteriza la tiurilata sinteno, unue de ĉiuj, kiuj opinias sin liberaluloj kaj demokratoj, kaj due de la marksistoj. Se ni penetras atente en la kritikon fare de la unuaj kontraŭ faŝismo, hitlerismo kaj ĉiuj totalismaj sistemoj ĝenerale, kaj especiale kontraŭ la bolŝevisma diktaturo, ni vidos, ke ĉiujn siajn argumentojn ili prunteprenas el la arsenalo de la frakasa anarkiisma kritiko kontraŭ la ŝtato. Ili ankaŭ nekaŝite emfazas, kvankam nur per vortoj, sian preferon al la persono kaj ties necedeblaj rajtoj, en la konflikto de tiu ĉi kun la ŝtato. Tio ĉi estas tiom evidenta, ke eĉ iuj anarkiistoj povas

trompiĝi, ĝin akceptante kiel sinceran pozicion de t.n. liberaluloj. Koncerne la marksistojn, kiujn oni povas rajte konsideri la plej bonaj, la plej logikaj, la plej plenaj esprimantoj de la ŝtata ideo, ili neniam povis kaj neniam povos eliri malgraŭ tuta sia dialektiko, el la senelirejo, en kiun ilin metas la anarkiisma priŝtata kritiko. Kiel unua adaptiĝis al tiu kritiko MARKSO. Post li ENGELSO, antaŭdirante la estontan sorton de la ŝtato post la socia revolucio, determinis ĝian lokon en muzeo apud »spinbastono kaj bronza hakilo«. La granda demagogo LENIN rapidis en la tempo de ruslanda revolucio, alte proklami la saman promeson pri la muzea destino de la ŝtato en iu estonto, kiun, simile al siaj instruantoj, li forgesis determini. En hodiaŭa tempo la jugoslavaj stalinistoj estas tiuj, kiuj alkuras al la laŭmoda proklamo pri la iompostioma detruiĝo de la ŝtato, enkondukante nur per vortoj ian komunuman malcentralizon kaj laboristajn konsiliojn en la administradon de la ekonomio. Malmultaj povas esti trompitaj de tiuj pozoj –kaj plej malmulte la jugoslavaj kamparanoj kaj laboristoj, ĉar la problema »detruiĝo« de la ŝtato absolute neniel tuŝus ties fostojn: la armeon, la policon, la tribunalon. Ĉi–lasta kondamnis je trijara mallibero alian, eble pli sinceran, teoriiston de tiu marksisma »detruiĝo« de la ŝtato: ĜILAS. Tamen estas vero, ke tiuj iel trudataj babiladoj pri »detruiĝo« serioze ĝenas la moskvajn satrapojn, kiuj fidelaj al STALIN ne kuraĝas kaj ne deziras plu rememori eĉ pri la malnovaj formuloj; unu el ĉi tiuj de LENIN el *Ŝtato kaj Revolucio* –la plej demagoga, eble– tekstis : »Se ekzistas ŝtato, ne estas libero, se realiĝos la libereco, la ŝtato malaperos«.

La serioza nuntempa sociologo, analizante la fundamen-

tajn elementojn de la tragedio, kiun travivas la homaro en nia epoko, ne povas ne konstati, ne povas ne konfesi, ke la problemo super la problemoj, en kiu turniĝas la filozofoj, la ŝtatistoj, la ekonomikistoj kvazaŭ en senelira cirklo, kvazaŭ stampitaj pro la fatala malbeno, estas la priŝtata demando, al kiu ili ne povas trovi solvon respondantan al la ekonomiaj, moralaj kaj kulturaj bezonoj de la homo de l' Dudeka jarcento, kiu ne volas kaj ne povas rezignacie akcepti la ekzistadon de la sklavoj de la faraona civilizacio, de la barbaroj el la tempo de ĜINĜIS-ĤANO, nek tiun de la parioj el la cezara Romio; ili ne povas, ĉar ne estas alia solvo krom tiu, kiun la anarkiistoj donas: plena neniigo –sen ia restaĵo, sen iaj transiraj formoj– de ĉia ŝtato, kaj ties anstataŭo per la federacio de la liberaj lokaj komunumoj.

La anarkiistoj konstatis kaj pruvis per la plej preciza scienco –kaj la historia eksperimento, speciale la marksista– evidente kaj nerefuteble tion konfirmas –ke la ŝtato, personigo de la strebado al superregado, al kiel eble plej vasta, plej plena kaj tutampleksa superregado estas sanktigita de la eklezio kaj leĝigita de la jura rajto, organizita perforto, praktikata nur de malplimulto, kiu ĉiam kaj neeviteble fariĝas privilegiita super la plimulto da homoj.

La historio de ĉiuj civilizacioj instruas, ke ĉia socio komenciĝis per triba organizo, por transiri strukturon de teritoria unuiĝo laŭ komunumoj ofte prenintaj gravajn dimensiojn de liberaj civitoj, iafoje federitaj en vastaj unuiĝoj, kaj finiĝis per starigo de grandegaj monstre centralizitaj imperioj, –kiuj malaperis en plena katastrofo de tiu civilizacio. Sed precipe klare tiu disvolviĝo kon-

turiĝas en la historio de nia civilizacio, kiu komenciĝas per apero de la kristanismo kaj falego de la romia imperio. Tiu historio estas bone studita. La triba organizo, la kamparana komunumo, la mezepokaj liberaj civitoj, la apero de la nuntempa moderna ŝtato dum la 16a jarcento, estas periodoj kaj etapoj klare konturitaj, bone dokumentitaj per multaj historiaj materialoj kaj monumentoj. La mondo hodiaŭ atingas sian lastan etapon. Se ne ni, niaj proksimaj posteuloj estos atestantoj kaj aktoroj de la elnodiĝo, kiu neeviteble estos bankroto, tiu de la nuntempa ŝtato–monstro. Se tio tamen estos tragedio por la popoloj aŭ komenciĝo de nova mondo, revo el ĉiuj tempoj –ĝi dependos de la popoloj mem.

Kiu estas la anarkiisma interpreto pri la apero de la ŝtato, pri ties historia rolo kaj socia esenco kiel subprema instrumento kaj institucio?

La origino de la ŝtato estas triobla: 1. psiko-biologia; 2. religie dogma; kaj 3. jure dogma. Eĉ ne unu, tamen, el tiuj tri konsistigaj elementoj de la aŭtoritato –patrino de la ŝtato– partoprenis en ties krima koncipo sen certa dozo de kruda forto, de perforto. La homo estas besto; kiel tia li komencis sian historion; kiel tia, bedaŭrinde, li ĝin pludaŭrigas ĝis hodiaŭ. La batalo en lia ĉiutaga vivo estas leĝo; lukto unualoke kontraŭ la malfavora naturo, dualoke kontraŭ la aliaj specioj, kaj trialoke, bedaŭrinde, kontraŭ la aliaj homoj –batalo por defendo, por supervenko de la malfaciloj, por hegemonio, kio finiĝas per superregado. Frukto de ĉi tiu batalo aperas la strebo al superregado. Historie tiu strebo trovis sian plenan kaj klaran esprimon en la persono de tiuj, kiuj estis plej fortaj, plej kuraĝaj kaj kapablaj en la lukto: la tribaj milites-

troj, kiuj transformiĝas kun la tempo en kaston. Paralele kun la militestro aperas idolpastro, la majstro de la magio, reprezentanto de la dioj, reganta super la tribo per sia spirita aŭtoritato, kiu ne malfruiĝas por transformiĝi ankaŭ en materialan aŭtoritaton, ĉu socian, ĉu ekonomian, ĉu eĉ politikan. Al tiuj unuaj kaj eternaj reprezentan–toj de la aŭtoritato aliĝas ankaŭ la konservanto de la neskribitaj leĝoj, la gardanto de la kutimjuro, reprezentanto de la jurdogmo. Tiel kreiĝas, disvolviĝas kaj pluiĝas la triobla alianco inter la kruda forto de la militisto –sanktigita per la religiaj dogmoj kaj leĝigita de la juĝistaj dogmoj–, la trompado kaj perfideco de la pastro kaj juĝisto. Tiu triobla alianco estas la ŝtato mem en ties moderna formo, kun la plena koncentriĝo de ĉiuj povoj ampleksantaj la donitan teritorion.

Laŭ la koncepto de la marksistoj la ŝtato estas frukto de la en klasojn socia divido kaj instrumento por subpremo en la manoj de la posedreganta klaso super la de produktrimedoj senigitaj klasoj. Tiu historie necesa formo de la socio respondas al donita ekonomia kaj socia strukturo –kiam malaperos la klasoj, malaperos ankaŭ la ŝtato. Por akceli ĉi tiun procezon la klaso de la ekspluatatoj devas uzi la ŝtaton kiel instrumenton por detrui la klasojn kaj detrui sin mem.

Por multaj la anarkiisma priŝtata koncepto prezentiĝas kiel tre proksima al tiu de la marksistoj. Fakte ĝi estas radikale malsama. Unue, kiel ni vidis, la ŝtato historie aperis kiel frukto de la perforto kaj trompado, sed ne kiel respeguligo de donita ekonomia strukturo. Due, ĝi estas la tipa instrumento por subpremado, kio ofte povas ŭtili al dominanta ekonomia klaso, sed ankoraŭ pli

ofte ĝi estas kreinto de klasoj, kaj ĝi mem reprezentas unu klason, precipe kiam ĝi atingas sian plenan disvolviĝon, kiel okazas ĉe la absolutaj monarkioj, ĉe la faŝismo, kaj bolŝevismo. Totalismaj reĝimoj en faŝisma Italujo, en Hitlera Germanujo, tiu de PERON kaj precipe stalinistaj reĝimoj prezentas riĉan dokumentan materialon kiel konfirmon de tiu koncepto. La ŝtato laŭ origino, his–toria rolo kaj socia esenco estas klasa institucio, t.e. instrumento de la regantaj klasoj aŭ kastoj, kiuj ne, ĉiam koincidas kun posedanta klaso sed kiuj por sia ekzisto postulas  la ekzistadon de ekspluatataj kaj subpremataj klasoj. Ĝia morto ne povas ekesti aŭtomate, fatale, ne povas esti »natura«, sed nur perforta morto, laŭ la volo de tiuj, kiujn ĝi subpremas. Ĉio alia estas vanaj babiladoj.

La nuntempa moderna ŝtato –ankaŭ kaj precipe la bolŝevisma– estas personigo de ekonomia monopolo, kondiĉanta la ekziston de ekspluatado kaj diskreskon de la kapitalismo –privata aŭ ŝtata– kaj la disvastiĝon, la »amasiĝon« de la socia mizero, kiu karakterizas en la historio de l' homaro la lastan evolufazon de ĉia ŝtato – la komenciĝon de ĝia fino. Atestantoj kaj viktimoj ni samtempe estas hodiaŭ de tiu dramo.

## Propieto

En sia unua apero, la proprieto kiel embrio kaj formo de aŭtoritato, de ekonomia aŭtoritato, estas frukto de perforto, de rabado, de favoro, de privilegio, de sklavigo fizika kaj spirita. »La milito –skribas Elizeo RECLUS en sia grandega sesvoluma verko *Homo kaj Tero* pri la historio de homaj civilizoj– estas unu el la grandaj kaŭzoj, la plej grava el tiuj, kiuj alkondukis al la kreo de la privata pro-

prietaĵo«. La venkon super la fremda tribo akompanas rabado, ĉe kio la homoj mem ofte fariĝas propraĵo de la venkinto. La militestro dividas parton de sia predo kun tiuj, kiuj havas meritojn en la akirita militvenko. Tiel ekaperas la persona proprietaĵo. En ĝia primara amasiĝo ludas certan rolon la religio en diversaj epokoj, sub la formo de donacoj al la eklezio kaj ties servistoj. Plue, la diskresko de la proprieto estas kondiĉita de la ekspluatado de la homlaboro plej ofte senpaga, sklava. La instituciigo, tamen, de la proprieto aperas rezulto de la konsekrado de eklezia kaj politika aŭtoritato, cirkonstanco kiu al ĝi donas la tutan socian aŭtoritaton tia, kia ĉi–lasta manifestiĝas tra la jarcentoj. La primara akaparo havus nenian daŭran gravecon, se ne sekvus ĝin, la jura mekanismo de la heredo kaj ĉiuj privilegioj, kiuj certigas al la proprietuloj kaj la rajtuloj la posedrajton pere de la diversaj leĝoj de la politika aŭtoritato rilatantaj al la rajto de proprieto. Tiel ke la ekzisto, la diskresko kaj la pluiĝo de la privata proprietaĵo estas rekte ligitaj kun tiuj de la ŝtato. Tial, la anarkiistoj ligas la detruon de la unua kun tiu de la alia. La tuta historia sperto demonstris, ke ili estas nedisigeblaj kaj dependas unu de la alia. Kiu diras proprieton, tiu diras monopolon, privilegion, kaj neniu monopolo kaj neniu privilegio estas pensebla sen garantio de laŭleĝa forto tia, kian trovas la proprieto sub formo de ŝtato. La ŝtato mem prezentas personigon de privilegio –privilegio regi la aliajn, privilegio kiu laŭ la esenco mem de la ŝtato sin sekurigas per sia hierarkia strukturo. Tiu ĉi privilegio –la politika– neeviteble naskas materialajn avantaĝojn kaj rajtojn, kiuj siavico kondukas al proprietamasiĝo, kio fariĝas reala eĉ kiam ĝi no estas garantiita de la heredrajto. La ekzisto de la

ŝtato naskas la proprieton eĉ se sub novaj formoj, kiuj ĉiam sin karakterizas per la simpla fakto, ke unuj vivas je la kosto de alies laboro. Ĉe la bolŝevista ŝtato la proprietula klaso konsistas en la reganta ŝtata burokrataro, la partia kaj sindikata aristokrataro. Post la bolŝevista eksperimento, ĉu ankoraŭ ekzistas naivuloj, kiuj kredas je »la socialisma« rolo de la ŝtato, ĉu estas homoj, kiuj ne komprenis ĉi tiujn simplajn veraĵojn, kiujn jam PRUDON kaj post li BAKUNIN klare konstatis?

La senreviĝoj, kiujn alportis la bolŝevisma malsukceso, la ĉiuflanka, profunda reago, kiun estigis ĝia tro brutala kaj cinika diktaturo en ĉiuj sociaj tavoloj, donis precipe negativajn konsekvencojn rilate al la privata proprietaĵo kaj al la kun ĝi ligitaj iluzioj. Tio gravas ĉefe pri la etproprietaĵo en agrikulturo. El vidpunkto de la spirita evoluo kondiĉanta la socian progreson, tio estas la plej granda malbono, kiun la bolŝevismo kaŭzis –morta bato kon–traŭ la socialisma ideo. Tiel en la konscio de la popolamasoj kaj ĉefe de la kamparanaj etproprietuloj multe da antaŭjuĝoj refirmiĝis. Unu el ili estas, ke la proprieto estas fortikaĵo, garantio por la libereco. La laborkaraktero de la proprieto estas alia tia antaŭjuĝo, kiu denove akiras krediton.

Cetere, la progresinta disvolviĝo de la ŝtatismo, ĉefa signo de nia epoko, profunde trafis la sanktan rajton de la privata proprieto. Ne nur la bolŝevistoj ĝin piedpremis; sed ilia bato multe pli brutala kaj sen ia ekonomia efiko provokis pli fortan reagon. La privata posedo de la produktrimedoj kreas nur iluzian senton de sendependeco kaj libereco en la landoj kun postrestinta ekonomia disvolviĝo, kun primitiva agrikulturo, kun precipa dispe-

cigo de la grundo, kun supereco de la metioj kaj kun duonmetiista industrio. La ekstrema diskresko de la ŝtata aparato kaj la ĉiam pli vasta enmiksiĝo de la ŝtato en la ekonomian vivon per la kreo de monopoloj kaj la troa plialtigo de la impostoj, en multaj kazoj transformas la ŝtaton en faktan proprietulon, kiam en tiu rolo ĝi ne estas jam preterpasita de la financa, industria kaj komerca kapitalo.

La rajtecon de la privata ĝuo de la laboristo, koncerne la propran laboron, neniu prudenta homo, neniu revoluciulo kaj serioza publika homo povus nei, refuti, sen malobservi la elementan homan justecon, kiu rekonas egalrajton por ĉiuj. La privata uzado de la produktrimedoj kapablaj kovri la laboron propran de la posedanto, sen ekspluato de alies laboro, principe ne kontraŭdiras al socialismo kaj komunismo. Eĉ PRUDON, aŭtoro de la fama kaj por la epoko kuraĝa formulo: »La proprieto estas ŝtelo«, falis en eraron rilate al la labora proprieto, kaj venis al la ideo pri »la popola banko« –la plej malforta flanko en lia verko. Konforme al tiu ideo »la popola banko« devis certigi al ĉiu produktanto la necesan, preskaŭ seninterezan krediton por akiri produktrimedojn. Tiel, ĉar ĉiuj homoj havus egaleblecon fariĝi proprietuloj, la ekspluatista rolo de la privata proprieto devus malaperi. Estas apenaŭ necese diri, ke tiu ideo transformata en iniciaton entute fiaskis.

La ekonomia mastrumado bazita sur la persona laboro povas konserviĝi, sed ne tiu formo de ekonomio solvas la ekonomiajn problemojn, kaj kio estas ankoraŭ pli grava, en tiu kazo, ne ĝi personigas la ekonomian formon de la aŭtoritato.

La proprieto –jura institucio de la ekonomia formo de aŭtoritato– montras sian veran karakteron, ludas sian efektivan rolon socian pere de la monopolo, kiun ĝi reprezentas, monopolo de la produktrimedoj. La privata uzado de la produktrimedoj, ekzemple okaze de proprieto bazita sur persona laboro ne estas malbono en si mem. Se estus eble, ke ĉiuj posedu egalajn produktrimedojn, kiel erare kredis PRUDON, el tio ne estus okazintaj maljustaĵoj. La socie negativa rolo de la privata posedo de la produktrimedoj komenciĝas en la momento, kiam ĝi transformiĝas en monopolon. La vera aŭtoritato de la privata proprieto manifestiĝas en la momento, kiam la senigitoj je produktrimedoj estas devigataj vendi sian laboron, t.e. konsenti la ekspluatadon de sia muskola kaj intelekta energio por asekuri sian ekzistadon. Kaj tiuokaze estas sen ia graveco, ĉu la senigitoj je produktrimedoj estas en rekta aŭ nerekta kontakto kun ties posedanto, ĉu ĉi–lasta estas fizika persono aŭ akcia societo, ĉu tiu monopolo super la produktrimedoj estas privata aŭ ŝtata, kiam ili estas en plena dependeco je la posedantoj de la produktrimedoj, al kiuj ili estas vivnecese devigataj vendi sian laboron, t.e, se ili akceptas pro truda neceso esti ekspluatataj. Kaj tio estas terura aŭtoritato, kaj des pli terura ĝi estas, ju pli la monopolo estas pli bone organizita, ju pli ĝi transiras en la manojn de la sennoma aŭ senpersona posedanto. La ŝtata kapitalismo donis sufiĉe konvinkajn pruvojn pri tio. Koncerne sian monstran ekspluatadon ĝi neniom cedas al la privata kapitalismo; ĝi ne diferencas de ĉi–lasta, kun samaj karakterizaĵoj: vekria malegaleco, peniga, malbone pagata laboro, sociaj konfliktoj, senlaboreco, prostituado, malbonuzoj, koruptado, ktp.

Ĉe la privata kapitalismo la monopoloj kreiĝas kaj ten–iĝas plej ofte de la ŝtato. En la epoko en kiu ni vivas, ni estas atestantoj de ĉiam pliiĝanta ŝtatigado de la proprieto; kapitalo kaj ŝtato ĉiam pli kaj pli strebas aliformiĝi en unusolan kaj saman aferon. Ĉe tiu iompostioma ŝtatigado de la ekonomio, ni vidas ke la ŝtato, eĉ ĉe la privata kapitalismo, fariĝas efektiva ekspluatanto aŭ almenaŭ ĉefa peranto en la ekspluatado de la popolamasoj per la impostoj rektaj aŭ nerektaj, kiuj transformiĝas en miliardajn subvenciojn je la profito de la ekspluatantoj. T.e. ankaŭ ĉe la privata kapitalismo la superanta tendenco –en la hodiaŭa fazo de la ŝtata kaj kapitalisma evoluo– estas al kunfandiĝo de la politika kaj ekonomia povoj kun konstanta supereco de la politika super la ekonomia, t.e. transformado de la ŝtato en ununuran kaj plenpotencan mastron, ĉe kio la institucia proprieto – ekonomia formo de la aŭtoritato– neniel perdas sian potencon.

## Eklezio

> »Kiu povus kalkuli ĉiujn murdojn, sangverŝadojn, hekatombojn, mortpafojn, krimojn, per kiuj la religia fanatikeco kaj mistika netoleremo sangokovris la teron, sur kiu la homaro treniĝas dispremite de tiu ĉi sangavida tirano, kiun adorigi al ni la religiaj kastoj donis al si kiel mision?«
>
> Sebastiano FAURE

Ni devas konfesi, ke en Bulgario la eklezio havas nek tian potencon, nek tian influon, kiujn ĝi havas Okcidente kaj precipe en la landoj, kie katolikismo estas superanta aŭ oficiala religio, por ke ĝi povu ludi la saman socian rolon. Nia popolo multkaŭze estas fremda al la religia

fanatikeco kaj la eklezio en Bulgario estas institucio malforta de aŭtoritato. Tiel estis almenaŭ antaŭ la stariĝo de la stalina diktaturo. Ĉi–lasta, fakte, per sia sistemo de perforto, kiu puŝas la popolamasojn al izoliĝo en si mem, sekve al plifortigo de la mistikismo, ankaŭ per siaj malsukcesoj sur la sociala tereno, provokantaj disreviĝon kaj fuĝon for de la vivo, certe grave kontribuis al certa renaskiĝo de la religia sento kaj al plifortiĝo de la eklezia influo. Sed ni ne kredas, ke tio kondukos al profundaj sanĝoj en tiu sfero de la spirita vivo de nia popolo. Konsekvence, por la bulgaraj anarkiistoj, la demando pri la eklezio ne povas okupi tian gravan lokon en niaj antaŭvidoj pri la morgaŭa socia rekonstruo, kiel en multaj aliaj landoj. Tial ni traktas la demandon prefere el pure teoria vidpunkto, kiel praktikan problemon por konservi pli kompletan karakteron al ĉi tiu pritraktado.

Cetere, la demando ne estas tute senigita je praktika graveco, se oni konsideras la ĝenerale rimarkitan plifortiĝon de la eklezio en la internaciaj rilatoj, kaj ties aktivigon sur la politika tereno per kreo de kristan–demokrataj partioj, iniciato kiu eble ne preterpasos morgaŭ nian landon.

Alia anticipa rezervo estas necesa. Oni devas fari esen–can diferencon inter religio kaj eklezio, malgraŭ tio ke la unua kondiĉas la ekziston de la dua. Religio povas ekzisti sen eklezio. La fakto, ke iuj homoj kredas je superteraj fortoj, aŭ ke ili havas mistikan kondutadon rilate la universon kaj ĝin perceptas plimulte per siaj sentumoj, ne prezentas ian danĝeron por la socio. Ĉiu estas libera kredi je kio li volas. Estas sciate ankaŭ, ke homoj kiel TOLSTOJ, GANDI k.a., kiuj havas nenion komunan kun la

malklereca superstiĉo, siamaniere estis religiaj, fakto, kiu ne malhelpis al ili esti, ankaŭ siamaniere, »revoluciuloj«, kaj profunde deziri radikalan rekonstruon socian kaj serioze aktivi pri ties efektiviĝo. La socia danĝero ekestas en la momento, kiam la religio organiziĝas en eklezio, en socia institucio, cele al trudado de sia superrego sur la spiritoj kaj koroj de ĉiuj homoj. Tiam ĝi fariĝas institucio de la aŭtoritato, kiu, koncerne sian malutilan rolon, neniom cedas al la ŝtato kaj al la proprieto; iafoje ĝi ilin eĉ superas. Tial, la anarkiistoj aktivantaj por la plena liberiĝo de la individuo kaj socio el la aŭtoritato –politika aŭ socia, ekonomia kaj spirita– opinias necesaj same la neniigon de la eklezio, kiel tiun de la ŝtato kaj proprieto.

Historie la eklezio naskiĝas paralele kun la proprieto kaj la ŝtato, iuokaze ĝi ilin eĉ antaŭas malgraŭ tio, ke iafoje en sia strebado ununure mastri la homajn korpon kaj animon, ĝi ekkonfliktas kun la ŝtato kaj mem kreas sian propran ŝtaton. Malgraŭ ĉio tio ĝi sin ligas al la proprieto kaj al la ŝtato en ilia komuna strebado regadi super la homoj. Samtempe ĝia rolo estas de »supera« kvalito, ĉar ĝi sanktigas la ŝtatan kaj aŭtoritatan proprieton. Tia estas precipe ĝia historia rolo. Tiu ĝia krima kunkulpeco en ĉiuj malbonoj, kiujn la ŝtato kaj la proprieto kaŭzis al la homaro dum ĉiuj pasintaj civilizoj kiel kaj precipe dum la kristanisma civilizo –malbonoj, kiujn la eklezio ĉiam pravigis kaj sanktigis– duobliĝas per la krimoj, kiŭjn ĝi mem senpere plenumis. Milojn da paĝoj oni povas plenigi per la krimoj rektaj kaj malrektaj de la eklezio, –de ĉiuj eklezioj el ĉiuj konfesioj.

Kiel institucio de la aŭtoritato la eklezio distingiĝas per

sia plena neado de ĉia spirita progreso. En la homhistorio ĝi estas personigo de la mallumo. Kiom da bibliotekoj estis neniigitaj kaj forbruligitaj ordone de la ekleziaj episkopoj el ĉiuj konfesioj! Kiom da sciencaj veroj estis sufokitaj, neniigitaj antaŭ ol atingi al la homoj kaj fariĝi ties posedo, aŭ estis malakcelataj dum jarcentoj en sia rolo lumigi la homkonscion kaj trabati al ĝi la vojon por universala progreso! Kiom da kapoj de grandaj sciencistoj, artistoj, edukistoj, klerigantoj la eklezio detranĉis! Kiom da elŝiritaj langoj, palisumitaj kapoj, kiom da bruligitaj aŭ diskarnigitaj vivantaj korpoj, kiom da senkulpaj viktimoj en la nomo de tiu sangmakulita monstro nomita Dio! La nomoj GALILEJO, Ĝordano BRUNO, HUS, estas de ĉiuj konataj, sed kiom da aliaj nekonataj pasis tra la fajro de la eklezio, sen eniri kun siaj nomoj en ĝian martirlibron, malgraŭ tio, ke multaj el ili ne havis pli etan valoron ol tiuj, kiuj estas konataj. Ni lasu flanken la aliajn ekleziojn el la pli foraj epokoj kaj por ni pli fremdaj, kaj ni limiĝu nur je la katolika eklezio; la sangmakulita figuro, kiun ĝi skulptis al si estas sufiĉe malbonaŭgura, por ke ĝi meritu la eternan malbenon de la homaro kaj ties plenan kaj senkondiĉan rifuzon ĉe la rekonstruo de iu socio, kie la ununura religio inter la homoj devas esti la interhelpo kaj la sociala solidareco.

Ni ofte uzas la vorton inkvizicio, ne malofte ni parolas ankaŭ pri krucmilitoj, sed neniam ni povas klare prezenti al ni la teruron, kiu kasiĝas malantaŭ tiuj malbonaŭguraj esprimoj. Se kalkuli nur en Hispanujo, la inkvizicio bruligis vivaj inter 1481 kaj 1808 –en 327 jaroj– 34.658 animojn, aliaj 288.214 estis kondamnitaj je porĉiama mallibero, 200.000 por eterna humiliĝo punmarkitaj,

k.a., kaj plej ofte la viktimoj estis senkulpaj, aŭ punitaj pro faroj, kiujn neniu sana, saĝa homa cerbo povas akcepti kiel krimojn. La bruligo de JEANNE D'ARC ne estas escepto, sed regulo tiurilate.

La misteraj forraboj kaj malaperoj, en kiuj rivalas nur la bolŝevistoj en sia krimeco, ne estas maloftaj ankaŭ hodiaŭ en la landoj, kie la povo de la eklezio donas al ĉi tiu la rolon de »ŝtato en ŝtato«. Sed ne per tio elcerpiĝas la krimeco de la eklezio kaj ties potenca povo, precipe en la katolikismaj landoj. De jarcentoj ĝi reprezentas la politikan kaj ekonomian forton, kiu ofte staras malantaŭ la registaroj, kaj ĝi mem partoprenas senpere en la homekspluatado. La katolika eklezio disponas nekalkuleblajn riĉaĵojn, konsistantajn el senlimaj agrikulturaj posedaĵoj, industriaj entreprenoj, bankoj, akciaj societoj kaj diversaj aliaj bienoj kaj valoraĵoj. Ĝi havas sian grandegan buĝeton, siajn universitatojn kaj lernejojn, ĝi organizas infankoloniojn kaj diversajn bonfaradajn societojn per kiuj disvastiĝas ĝia ordonpovo ne nur super la hodiaŭaj, sed ankaŭ super la morgaŭaj generacioj. Ĝi ofte staras malantaŭ la dorso de la registaroj, kaj diktatoroj, flustretas al ili la politikon kaj kontrolas iliajn agojn, kaj se bezone senpere partoprenas per sia fizika forto. Ĝi ankaŭ ne estas senigita je polico, juĝistoj kaj ekzekutistoj, kaj ĝia propaganda aparato, en kiu partoprenas miloj da episkopoj kaj kardinaloj, pli ol unu miliono da katolikaj pastroj, apenaŭ estas konkurencita eĉ de tiu de la bolŝevistoj. Cetere, ne nur tiurilate, sed multrilate la simileco inter la katolikismo kaj la bolŝevismo estas okulfrapa.

Ekde la dua mondmilito la eklezio fariĝis speciale aktiva

kaj sur la politika kaj sur la sindikata terenoj. Ĝi havas siajn proprajn sindikatojn kaj politikpartiojn, kiuj ludas unuarangan rolon en la katolikismaj landoj. Ni vidis, ke eĉ la bolŝevistoj ne scipovis venki la katolikisman influon en Pollando kaj Hungarujo, kaj labolŝevistaj registaroj estis devigataj en tiuj landoj kontrakte rilati kun la eklezio, kaj allasas ĝin eĉ en la lernejon. Jen kiom grandega estas la eklezia aŭtoritato –ne nur spirita– eĉ en hodiaŭa tempo. Sekve, nenio miriga kaj neklarigebla en la fakto ke, kiam la popoloj en iuj landoj –kiel ekzemple en Hispanujo– ribelas, ili per granda furiozo sin ĵetas sur la preĝejojn kaj ilin bruligas. Ne tia estos la okazo en Bulgario. Dubinde estas, ke la estonta revolucio okupiĝos pri la eklezio. Perdinte sian decidigan socian influon en Bulgario, ĝi estos allasita al sia propra morto. Liberaj estos tiuj, kiuj kredas subteni ĝin, kaj ĝin gardas...

# Instrumentoj de la regpovo

## Registaro

La registaro ofte identiĝas kun la ŝtato. Ni ne logiĝos de juraj difinoj, kiuj nenion liveros al ni. Ni diros nur, ke la ŝtato estas kompleksa maŝino kun multnombraj diversaj mekanismoj. La registaro estas de ĝi maŝinisto. Sed la naturo de la ŝtata maŝinaro estas tia, ke la maŝinisto kunfandiĝas kun la maŝino, iĝas nedisigebla parto de ĝi, unu el ĝiaj mekanismoj, unu organo, unu instrumento tiom reganta, kiom regata.

La registaron oni povas identigi same kun aliaj instru–mentoj de tiu grandega maŝino, kiu cirkaŭprenas ĉiujn organojn de la ŝtata aŭtoritato. Se ni trarigardus ĝin tie-le, ni ignorus iujn karakterizaĵojn de la aliaj instrumentoj per kiuj efektiviĝas la aŭtoritato, kaj la pleneco de nia penso breĉetiĝus, la bildo de la aŭtoritata sistemo nebu-liĝus. Pro tio, sub »registaro« oni komprenu nur la admi-nistradon de iu lando, la administra aparato de la ŝtato.

La komunuman administracion, laŭ ĝia historia deveno kaj laŭ ĝia iom pli speciala karaktero, ni devus trakti aparte. Sed konsidere al la hodiaŭa grado de evoluo en la ŝtata centralizado, kiu reduktas al minimumo la ko-munuman aŭtonomion, la administrado de la komunu-moj same devas identiĝi al la ĝenerala administrado de la lando. Kaj ĉe la bolŝevistaj reĝimoj eĉ tiu tre eta dife-renco, konstatebla en la aliaj landoj, ne plu ekzistas –la

komunumo estas simpla organo loka de la registaro. Ĉe la bolŝevistaj reĝimoj, ankaŭ la partio aŭ almenaŭ ĝiaj respondecaj komitatoj (centra, regiona, distrikta, loka, ktp) identiĝas al la administrado. Ĉiu bolŝevista partio estas nedisigebla parto de la ŝtata administracio.

La registaroj de la diversaj epokoj kaj landoj prezentas iujn malsimilaĵojn en sia kreo, en siaj formoj kaj funkci–metodoj. Estus kontraŭe al la historia kaj vivpova vero, estus kontraŭscience nei la malsimilaĵojn en la formoj de la registaroj. Ni ne povas allasi tiun eraron kaj neniam ni fermas niajn okulojn antaŭ la ekzistantaj diferencoj. En la socia vivo, praktike, speciale pri aparta persono, povas okazi kaj efektive okazas, ke oni preferas unu formon de administrado al aliaj. Estas kontraŭe al la homnaturo, al la vivpova vero, konsideri, ke ne alia sed ja la viktimo meritas elekti sian ekzekutiston aŭ la formon de la ekzekuto. Estas pli normale por la viktimo, konsiderante sian intereson, eĉ la ordonon de sia instinkto, refuti la ekzekutiston mem kaj ĉiun formon de ekzekuto. Se al la malliberulo oni disponigas elekton unuflanke inter la diversaj etaĝoj de donita malliberejo, inter la komunaj kaj unuopaj ĉeloj, la karcero kaj la koncentrejo, kaj aliflanke la liberecon, sen ia dubo li elektos la liberecon kaj nur la liberecon.

Kiam ni, anarkiistoj, deklaras, ke ni rifuzas la registaron, ĉian formon de registaro, la rajton mem regi la homojn, sub tiu nomo ni komprenas same registaron reprezentitan de unu persono, de grupo da personoj, de unu partio, de multaj partioj, de malplimulto kaj eĉ de plimulto reala aŭ nur formala, kiu alproprigas al si –aŭ al kiu oni rekonas– privilegion, monopolon, ĉiam sin apogante sur

armita forto, trudante sian volon, kio praktike ĉiam resumiĝas en kontentigo de la interesoj de iu partio, de grupo da partioj aŭ de unu klaso.

Iam la superanta formo de regado estis la absoluta povo de monarko. Pli malfrue estiĝis la konstitucia monarkio por rekoni realan fakton, nome sanĝon okazintan en la ekonomia kaj socia strukturo mem, ĉe kiu la povo de la monarko dividiĝas jam kun tuta privilegia klaso: la aristokrataro. La historia, ekonomia kaj socia evoluo enscenigis novan klason: la burĝaron. Ankaŭ ĝi alportis per sia supreniro novan formon de regado: la parlamentismon, per kiu ĝi trudas kaj praktikas sian soci–ekonomian regadon. Laŭvoje de tiu evoluo la diktatoraj formoj de regado –faŝismo, hitlerismo, bolŝevismo– estas paŭzo kaj eĉ retroiro al la transformiĝinta absoluta monarkio. La problemo, kiu stariĝas antaŭ la nuntempa homo, antaŭ la homo de la XXa jarcento kaj la homo de la estonteco, ne plu estas pri elekto de regadformoj, ne plu estas pri elekto inter monarkio kaj demokrat–respublika registaro, inter okcidenta kaj orienta »demokrati-oj«, ĉar unu kaj alia koncize konkretiĝas al iu fikcio, ĉar ĉia registaro estas reakcia laŭ sia esenco kaj socia rolo; sed elekto inter registaro kaj *simpla, rekta administrado de la socia vivo fare de la komunumoj federitaj en distriktaj, regionaj, landaj kaj internaciaj mezurskaloj*.

La ekonomia kaj kultura evoluo de la mondo gvidas al socialismo, al socia posedo kaj mastrumado de la produktrimedoj por produktado de bonaĵoj; gi gvidas al komunismo, vera, reala komunismo, kiu por esti tia, devas esti *libera*. Al tiu nova soci-politika formo de la homrilatoj respondas nova soci–politika formo de administrado:

senestreco, federismo. La registaro, ĉia registaro estas esprimanto kaj simbolo de privilegio, kaj ĝi estas kondamnita al morto pro la homprogreso.

## Parlamento

Etimologie, parlamento signifas lokon kie oni parolas, babiladejo; fakte la parlamento, ĉia parlamento en ĉiuj landoj de l' mondo, estas loko de babilaĉo, de senenhavaj paroladoj. Antaŭ nelonge iu okcidenta diplomato havinta okazon ĉeesti kunsidon de la Supera Soveto en Moskvo, esprimis sian surprizon, ke neniu aŭskultis la tie prononcitajn paroladojn, kiuj sin sekvis unu post alia kiel gramofondiskoj. Tiu diplomato nature forgesis, ke saman bildeton prezentas la parlamento ankaŭ en lia lando. La parlamentoj ĉie estas al la popoloj altpreze kostantaj paroladejoj.

Se estus, nur tio! Bedaŭrinde, la socia rolo de la parlamento ne reduktiĝis al senfinaj elokventaĵoj; ĝi same estas instrumento de la povo –unu el la plej gravaj kun la konsekvencoj, ĝis kiuj kondukas ĝia »aktiveco«. Ĝi estas eĉ forĝejo, fabriko de la leĝoj, kiuj konsekras la tutan sistemon de perforto kaj ekspluatado de la nuntempa kapitalisma aŭ ŝtatsocialisma socio. Konforme al la klasika formulo pri povdivido, la parlamento estas esprimanto de la leĝdona aŭtoritato. Tiu ĉi divido –spite, ke oni iam ĝin idealigis, spite la pravojn de l' teoriistoj por konvinki nin pri ĝia realeco– en efektiveco neniam povas plene realiĝi eĉ sub la plej demokratia reĝimo. La demando pri la praktikado de la povo en la homa socio, pri ĝia demokrateco aŭ reakcieco, pri pli aŭ malpli reala divido ĝia, estas demando pri fortorilato. Ĉia ordonpovo finfine estas reprezentanto, esprimanto kaj defendanto

de donita klaso, ĉiuj institucioj kaj instrumentoj de tiu ĉi aŭtoritato havas internan ligon kaj prezentas tuton. La parlamento, institucio por leĝdona povo ne estas tiurilate escepto el la ĝenerala regulo. Kiam la regado de la klaso staranta malantaŭ la ŝtata povo estas malpli minacata, la donita klaso kaj ĝiaj reprezentantoj en diversaj ordonpovaj institucioj povas permesi al si la lukson sin gvidi iom pli laŭ »principoj«; unu el ĉi tiuj estas la »divido« de la povoj. Tiaokaze, ni havas »demokration«, »liberalismon«, ktp. Tamen ju pli ĝi sentas kaj vidas sin minacata, des pli ĝi emas piedpremi siajn »principojn« kaj sin prezenti en sia vera bildo, des pli ĝi estas diktatora, tirana, ktp. Fakte la parlamento en sia rolo de leĝfabriko rekte aŭ malrekte estas subigita al la reganta klaso, kiu, kvankam ĝi parolas pri povdivido, tenas en siaj manoj la ŝtatan aparaton kaj reprezentas la aŭtoritaton en ĉiuj ties formoj. La leĝoj forĝitaj de la parlamento devos neeviteble harmonii kun la interesoj de la reganta klaso. Kontraŭokaze egaleco de la fortoj pezos sur la sociaj tavoloj, kiuj minacas la ekziston de la reganta klaso, kaj tiam la parlamenton oni devos fermi aŭ ĝi perdos sian ŝajnan memstarecon kaj subiĝi al la efektiva aŭtoritato, kiu plej ofte sin manifestas sub sia ekonomia formo kun akompano de la brutaleco de armita forto.

Tia estas la vera rolo de la parlamento. Nenie la biblia saĝeco pri »la malnovaj bareloj« kaj »la nova vino« trovas pli ĝustan aplikon ol en la kazo de la parlamento. Historie aperinta kiel formo certiganta la burĝaran povon, kiel formo respondanta al historia enhavo, la parlamento en sia vereco ne povas utili eĉ al alia klaso, krom

al la burĝaro. Vere estas, ke oni provas utiligi ĝin ankaŭ por iuj klasoj aŭ partioj pretendantaj reprezenti tiujn klasojn, sed en ĉiuj ĉi okazoj la parlamento perdas sian klasikan formon. Sub la faŝismo ĝi estis tiusence ridinda. Tia ĝi estas ankaŭ sub la bolŝevismo, kaj en ambaŭ okazoj oni ne povas paroli pri parlamento.

Cetere, la parlamento en hodiaŭa epoko estas jam en plena degenerado. Ĝi ne plu respondas al la novaj sociekonomiaj formoj kaj tendencoj, ĝi aperas eluzitaĵo, eĉ por la burĝaro. Nuntempa socia kompleksеco forigas el ĝi eĉ tiun etan, ŝajnan kompetentecon, kiun iam ĝi penis prezenti. La specialigo tiel malproksimen iris, ke estas absurde postuli kaj atendi de intelekte malriĉa »popola« reprezentanto »kompetentan opinion« pri ĉiuj problemoj prezentataj antaŭ la parlamento kaj atendantaj fariĝi kvazaŭaj leĝoj. La parlamento montriĝas senefika instrumento eĉ por la burĝaro. Kaj voĉoj ne mankas el ties medioj por ĝia reformo; la rekomendoj plej ofte estas en direkto al ĝia forigo.

Ankoraŭ malpli la parlamento povas utili al la laborulaj klasoj –kamparanoj, laboristoj, metiistoj. Se ilia reala forto, kiu esprimiĝas efike nur sur ekonomia tereno, estus sufiĉa por frakasi kaj neniigi la burĝaran regadon, se la parlamento –eĉ se en favoraj cirkonstancoj– troviĝus en »iliaj manoj«, ĝi estus likvidita. Se tiu ĉi forto decide kliniĝos iliaflanken, la parlamento montriĝos superflua kaj malutila, ĉar tiam la ekonomiaj problemoj sociaj iĝos decidigaj kaj vivpovaj, kaj la kompetenteco apartenos al la ekonomiaj organizoj. Tiu ĉi tendenco en la socievoluo konturiĝas jam hodiaŭ. Ĉe la bolŝevistaj reĝimoj, kie la regpovo plene apartenas al la partio, kiu kunfandiĝas

kun la aparato mem de la ŝtato, la parlamento perdis sian gravecon, ĝi eĉ ne povas esti konsiderata kiel esprimanto de la leĝdona povo, ĉar ĝi entute estas instrumento de la plenumpovo, kiu siaflanke estas senkondiĉe subigita al la Centra Komitato kaj sekve al la Politikburoo. La rolo de tiu parlamento estas nur de tempo al tempo –kiam oni ĝin kunvokas por unu–du tagoj– aprobi »unuanime« kaj per aklamoj la dekretojn alprenitajn kaj jam aplikatajn de la registaro. Komedio, mensogo, kiu neniun trompas.

## Tribunalo

La iluzia karaktero de »povdivido« estas evidenta ankaŭ koncerne la »juĝadon«. La sendependeco de la tribunalo estas tiom nereala, kiom tiu de la parlamento. Vere estas ke, en okcidenta Eŭropo, kie ekzistas iuj »tradicioj«, kie la reĝimoj estas pli stabilaj, pli konstantaj, la ŝajna tribunala sendependeco estas pli granda, precipe kiam temas pri kazoj, kiuj ne riskas perturbi la fundamentojn de normala ekzistado de la reĝimoj. Sed por tiuj, kiuj konas la mekanismon de la »juĝado« ne estas malfacile senvualigi la ŝajnecon de la juĝa sendependeco en la okcidentaj kapitalismaj kaj »demokratecaj« landoj. Ankaŭ tie, kiel ĉie aliloke, la tribunalo estas klasa institucio kaj ĝi neniam povas sekvi la leĝajn postulojn ĝis sankcioj, kiuj malutilas al la interesoj de la reganta klaso. Kontraŭokaze, la personoj, kiuj okupas la tribunalajn postenojn, estus iel eksoficigitaj aŭ devigataj adaptiĝi, kaj silenti.

La tribunalo estas pli malnova institucio ol la parlamento; ĝi akompanas la aŭtoritaton en ties tuta historia estado, de ties apero en la primitiva tribo ĝis hodiaŭ. KRO-

POTKIN, kiu bone studis la aŭtoritatan genezon kaj la historian rolon de la ŝtato, diras: »La aŭtoritato de la estroj ĉe la primitivaj sovaĝuloj, la aŭtoritato de la riĉaj familioj en la mezepokaj civitoj kaj la aŭtoritato de la reĝoj, ĉiam sin apogis ĉefe sur ilia juĝa aŭtoritato«. Principe, tio, kion oni nomas »juĝado«, ne estas io alia krom kontentigo de besta venĝemo, sed ne de justeco. La primitiva leĝo: »denton pro dento, okulon pro okulo« ne estas esprimo de justeco, sed venĝosoifo por kontentigo de vundita sento. Apoginte sin sur tiu ĉi besta bezono, la privilegiuloj, ŝajnigante ke ili kvazaŭ rolus kiel arbitraciantoj, ĉiam serĉis okazon konfirmi tiamaniere sian propran kastaŭtoritaton, kiam tiu ĉi jam transformiĝis en unuklasan aŭtoritaton. La antaŭjuĝoj rilate al la rolo en la socio de utila arbitracianto tia, kian konkeris la tribunalo, estas tiom profunde enradikiĝintaj en la homo, ke, kiam ni refutas la ŝtaton, ĉi–lastan oni identigas kun tribunalo, kaj tial ordinare al ni rebatas: »Kiel povus ekzisti socio en kiu la puntimo estus forigita? Oni venus al ĉiamaj senjuĝaj punoj«. Oni ofte tiel rebatas al ni, ĉar la homoj forgesas ĉiujn aliajn leĝojn kaj reduktas la tribunalaferon al nur kriminala juĝproceduro, kio fakte okupas la plej etan parton de la tribunalagado. Oni hodiaŭ facile argumentas kun statistiko en mano, ke la plej granda nombro da »krimoj« rilatas al la proprieto kaj la ŝtato; sekve la rolo de la tribunalo kiel institucio, kiel juĝpova instrumento, konsistas ĉefe en la defendo de socipolitika kaj ekonomia reĝimo, kiu –tiel longe dum ekzistos privilegioj politikaj, ekonomiaj aŭ spiritaj, t.e. tiel longe dum ekzistos ŝtato kaj proprieto privata aŭ ŝtata– ĉiam reprezentos la interesojn de reganta klaso. Tiel estis, kaj tiel estos...

Aliflanke, se oni akceptas, kondiĉe ke la tribunalo havu ankaŭ la rolon defendi la personan sekurecon kaj obstakli al krimoj –preteksto per kiu oni serĉas la socian pravigon de klasa institucio, kies historia rolo estas plui-gi venĝosoifon anstataŭ restarigi la justecon– oni ne povas nei nekontesteblan fakton: la severeco de la punoj ne malgrandigas la krimecon. Dubinda estas la ekzisto de iama pli kruela tribunalo ol la bolŝevista, kiu por plej sensignifaj kulpoj, por malfruiĝo en la fabriko, kondamnas al jaroj da peniga laboro; sed la historio ankaŭ ne konas aliajn reĝimojn, kie krimeco pli vaste etendiĝis.

La historia, rolo de la tribunalo, kiel ni diris, estas tute alia. Ĝi estas, nur pova instrumento, ĉenero el la ĉeno. En la konstituciaj ŝtatoj –hodiaŭ ĉiuj ŝtatoj estas tiaj– la parlamento kreas la leĝojn almenaŭ formale, la registaro ilin aplikas, kaj la tribunalo, kune kun la tuta aparataro el kiu konsistas la justico, strikte prizorgas ilian aplik–adon. Ĉi tiun skemon, kompreneble, oni ne ĉiam strikte plenumas, sed eĉ kiam la ŝajno estas tute priatentata kaj la »principo« savita, la esenco de la aferoj ne aliiĝas, ĉar la esenco kaj la destino mem de la leĝo estas konsekri la donitan strukturon de socio, por kies gardo deĵoras la tribunalo.

## Malliberejo

Kiel instrumento de la ordonpovo la malliberejo estas elkreskaĵo, aldona organo de la tribunalo. Kaj en la hodiaŭa t.n. moderna socio, el kiu apartenas ankaŭ la totalismaj reĝimoj –faŝistaj kaj bolŝevistaj– kiel malliberejojn oni devas enkalkuli ankaŭ la koncentrejojn, kie sen aŭ pro juĝado oni sendas al trudlaboro homojn senigitajn je libereco kaj je elementaj hom– kaj civilrajtoj.

La malliberejo estas povinstrumento, per kiu oni plene efektivigas la venĝon de la socio, reprezentata de la ŝtato kaj registaro, esprimantoj kaj gardistoj de la interesoj de la klaso, kasto aŭ privilegia kliko, kiu staras post ili. Tien oni sendas tiujn, kiuj estas rigardataj kiel »malamikoj de la socio«, la malobservantoj de ties leĝoj, »la krimulojn« rilate al iuj akceptitaj normoj, kies tuton oni konsideras kiel moralon. Ĉi tiujn »krimulojn« oni dividas je du kategorioj: politikaj kaj kriminalaj. Ordinare la duaj estas tiuj, kiuj servas kiel preteksto por la ekzisto de la punsistemo mem. Tial, ankaŭ la malliberejon oni prezentas kiel korektodomon. Sed la politikaj »krimuloj« ofte okupas pli vastan lokon en tiuj domoj, kiuj ne estas korektadaj sed punaj »universitatoj« de la krimeco.

La juristoj ŝatas idealigi la tutan punsistemon, kaj la malliberejojn mem. Sed tiuj el ili, kiuj povas, malgraŭ praktikado de funkcio detruanta ĉian moralon, resti honestaj antaŭ sia konscienco, komprenos la realecon, nur kiam ili havos »la honoron« restadi iomete en malliberejo. Tie ili vidos, kiom granda estas la nombro de la plene senkulpaj el inter la kondamnitoj, kiuj pro la forto de tiu cirkonstanco mem fariĝas efektivaj malamikoj de la socio prezentita de la pundomaj aŭtoritatoj. Tie ili vidos, kiom da junaj homoj, senditaj en malliberejon pro etaj kulpoj, malvirtigas kaj ekiras la vojon de la krimeco pro la kutimoj, kiujn ili akiras de la ĉirkaŭanta medio. Ili vidos kaj komprenos ĝis kioma grado la prizono estas lernejo de la brutaleco kulturita de la provosoj, lernejo de la krimeco disvolvita per la trudata kunloĝado kun veraj krimuloj, kiel plej ofte la trudata senfaro iĝas patrino de ĉiuj

malvirtoj. Sed ekzistas alia fakto, kiu sufiĉas pro sia senmoraleco, radikale refutas ĉian malliberejon, ĉiujn malliberejojn en la mondo. Kaj tiurilate neniu reĝimo esceptiĝas. La malliberejo estas kulturejo de la plej abomeninda demenco, de sklavemeco, de spionado kaj de humileco. La instruitaj juristoj tre malmulte enpensiĝas pri tiu fakto, ke la denuncantoj plej ofte estas el la medio de la krimaj malliberuloj; kaj efektivaj krimuloj, murdistoj, ŝtelistoj, falsistoj, rekulpiĝintoj estas tolerataj, favorataj kaj oficiale komisiitaj, kun respondecaj postenoj interne de la malliberejo. En sia medio ili estas nomitaj helpaj pordŝlosistoj, falsaj pordistoj. Ili fermas kaj malfermas alies ĉelojn, kvankam ili mem havas siajn proprajn; ili senpere spionadas; ili varbas fidenuncistojn; ili regule denuncas kaj iliaj raportoj estas decidigaj en la determinado kaj pritakso koncerne la kondutadon de la malliberuloj. Kaj –atingante la klimakson!– tiun aktivecon oni taksas kiel »laboron« per kiu oni malpliigas la punon; punantaŭliberigon plej ofte profitas same tiuj medioj.

## Polico

La polico kiel instrumento, kiel organo de povo, estas unu el la ĉefaj fostoj de la ŝtato. En la t.n. demokratiaj landoj oni ofte parolas pri policaj ŝtatoj –kvalifiko kiun oni donas ordinare al la totalismaj reĝimoj faŝismaj, bol–ŝevismaj, frankismaj ktp. Fakte, malgraŭ tio, ke ekzistas nekontestebla diferenco inter la totalismaj kaj demokratiaj reĝimoj, la hodiaŭa moderna ŝtato ĉie iĝas ĉiam pli kaj pli policeca, eĉ kiam la eksteraj formoj de leĝeco, de la oficiala respekto al la civitanaj rajtoj konserviĝas, kaj kiam restas certa ebleco sin defendi kontraŭ la policaj

arbitraĵoj. La problemo ne plu estas pri la formo sed pri la enhavo. La polica enhavo de la moderna ŝtato manifestiĝas per troa plifortiĝo, stabiliĝo kaj perfektiĝo de la polica aparato, kiu ĉiam pli kaj pli akiras la kvalitojn de sendependa instrumento –»ŝtato en la ŝtato«.

Tre multe oni parolas kaj scias –kaj bedaŭrinde nesufiĉe– pri la policreĝimo, pri la policaj arbitradoj kaj torturoj al kiuj estas submetataj la civitanoj en la landoj kun totalismaj reĝimoj. Sed kiom malmulte oni scias, ĉar preskaŭ neniam oni parolas pri la reala socipolitika rolo de la polico en la landoj de la okcidenta demokratio! Tiu fia nemezurebla rolo radikiĝas ĝuste en la fakto, ke la polico en tiuj landoj estas nepolitikema, superpartia, senpartia kaj... »sendependa«, stabila. La registaroj falas, la regantoj anstataŭiĝas, partioj de la plej dekstraj ĝis la plej maldekstraj laŭvice regas, sed la polico restas neanstataŭata kaj netuŝebla, kaj nenia speciala ŝanĝo ekestas. La novaj ministroj tiom restas kaptitoj de la administracio, kiun ili ŝajne komandas, kiom la malnovaj; tio speciale gravas por la ministerioj pri internaj aferoj (kaj pri la milito kompreneble, sed pri tio ni alifoje parolos). Tiun realecon oni ne povas koni bone, se ne prezentiĝas okazo vidi de proksime la verajn rilatojn inter la plej superaj reprezentantoj de la registaro kaj la polica korpuso. Ni konas tiujn rilatojn ne nur teorie sed ankaŭ praktike, ĉar ni havis okazon vidi la senpovecon de la ministroj pri internaj aferoj, kiuj ĉe plej bona deziro forigi decidojn de la propraj policaj organoj, kapitulacis kaj konfesis, ke la fakta ordonpovo apartenas en tiu ĉi sfero ne al ili, sed al la polico. Se tion scius la vasta publiko, multe da eventoj kaj faktoj de la ĝenerala ŝtata politiko

de multaj landoj demokratiaj, ĝi pli facile komprenus.

Ne mankas naivaj politikistoj, sincere kredantaj je la utileco kaj efikeco de la povdivido, kiuj altenlevas en idealo la stabilecon, ekzemple, de la juĝistaro, sed ili ne scias kaj ne povas scii kiom tiu ĉi stabileco kaj atendata sendependeco de la juĝa povo paliĝas en la okcidenta mondo antaŭ la stabileco kaj sendependa agado de la policara aparato en la totalismaj landoj, cirkonstanco kiu ofte ĝin faras vera mastro de la situacio sen manifesti ekstere sian realan kontrolon super la registara aŭtoritato. La polica korpuso nevideble tiras la fadenojn, kaj la ministroj nur provizore montriĝas okupantoj de la foteloj de superaj ŝtataj oficistoj.

Tiu stato de la aferoj ne estas hazarda fenomeno, sed rezulto de evoluo. La ŝtato diskreskas, disetendante sian aŭtoritaton ĉiam pli vaste, kaj emas ĉirkaŭpreni ĉiujn sferojn de la polica, ekonomia kaj kultura vivo. La ŝtato laŭorigine kaj laŭesence estas trudema, subprema institucio. Ĉiu organismo kreskas kaj disvolviĝas, kaj kun la evoluo ĝi kuniras la perfektiĝo. Ĉio perfektiĝas. La truda aparato ŝtata prezentita de la polico same perfektiĝas. La specialiĝo iĝas distinga signo de la epoko. La polico ankaŭ specialiĝas. Iam ne ekzistis pasportoj; oni pli malfrue ilin kreis kaj ja ne en ĉiuj landoj; komence pasportoj sen portretoj. Por persekutitoj estis relative facile forkuri for de polica kontrolo. Tio estis facila eĉ post kiam oni ĉie enkondukis pasportojn kun portretoj. La perfektiĝo iris multe pli malproksimen, kaj hodiaŭ la polica ofico iĝas plena »scienco«. Tiel la perfektiĝinta en ĉiuj direktoj polica aparato fariĝas necesaĵo de la moderna ŝtato, kaj per sia specialiĝo tenas en siaj manoj

ankaŭ ĉi tiujn, al kiuj ĝi servas. Tipa estas tiurilate la ekzemplo de NAPOLEONO kaj FOUCHET; la unua profunde malamis la duan, kaj sciis, ke la sama malamo nutris ankaŭ la alian, sed ne povis liberiĝi de li, ĉar ĉi-lasta lin tenis en sia reto el sekretoj kaj sciaĵoj.

Tiu polica konstituo kiel memstara institucio en la ŝtato iĝas tia danĝero por la ŝtatistoj mem, ke kiam ili deziros ekliberiĝi de ĝi, ili devos antaŭe konstrui alian similan aparaton (pere de la armeo, ekzemple), per kiu ili trudiĝos, kaj tio kondukos al la same terura erara cirklo!

La nura konkludo estas: la detruo de la aŭtoritato en ĉiuj ties formoj postulas kiel unuan kondiĉon de sukceso la forigon de la polico –la plej fidela personigo de la ŝtato.

## Armeo

Se la polico sin prezentas de la partizanoj de aŭtoritato kiel organo por defendi la sekurecon, pacon kaj trankvilecon de la civitanoj kontraŭ internaj malamikoj (argumento en defendo de la polica perforto tiom evidente senbaza, ke ni ne opiniis necese ĝin noti eĉ en la antaŭa ĉapitro), la armeo ja estas laŭ la samaj la organo por »ekstera defendo«.

Kaj se tio estus efektive tiel, oni devus supozi, ke en la tago, kiam la mondo atingus unuiĝon per la forto de interkonsento inter la ŝtatoj –hipotezo je kiu malpleje ni povas fidi– aŭ per la plena regado de unu el la grandaj ŝtatoj pridisputantaj sian mondan potencon super ĉiuj ceteraj, la armeo likvidiĝus, malaperus. Vanta iluzio!

Kiel la polico, tiel ankaŭ la armeo estos ĉiam necesa por defendo kontraŭ malamikoj eksteraj aŭ internaj (se ili ne

estas sur la tero, oni serĉos ilin sur Marso kaj sur aliaj planedoj), dum ekzistos la ŝtato, ĉar ili estas instrumentoj de ordonpovo kaj la ŝtato estas ties plej plena, plej tuteca efektiviĝo.

Kiel kondukiloj kaj personigoj de la aŭtoritata perforto, la polico kaj la armeo estas du sangfratinoj; per sia krueleco kaj brutaleco ili estas egale malutilaj por la socia moralo, por la sociaj paco kaj harmonio kaj por la tuta homa progreso kaj kulturo. Sed dum la polico pro sia limigita konsisto havas pli malvastan influ– kaj agadsferon, per sia trudemeco la armeo montriĝas kiel vera lernejo pri tutpopola morala stultiĝo, pri sistema edukado en krueleco, krudeco, brutaleco kaj neado de la homvivo. Ne estas alia institucio en la hodiaŭa aŭtoritata socio, kie la neado kaj eĉ la malestimo al la vivo tiel sisteme kaj tiel sukcese estas kulturataj kiel en la kazerno. Tiu *lernado de la senhumaneco* trovas praktikan aplikon en la milito. Elirinte el la lazerno kaj pasinte tra la sangelverŝaj scenoj de la milito, civitano estas bone preparita por ĉiuspecaj krimoj, ĉar ĉe li la sentemo estas malakrigita, la kutimo mortigi iĝas dua naturo, la moralaj bremsoj estas rompitaj. Kaj el tiu vidpunkto la armeo estas refutita eĉ de la homoj, kiuj ne staras sur niaj ideaj pozicioj, kiuj principe rifuzas nek la aŭtoritaton nek la ŝtaton.

Tie ĉi tamen ni, lasante flanken la negativan soci–edukan gravecon kaj influon de la armeo, limigos nin, ĝin trarigardi nur kiel instrumenton de ordonpovo. El tiu vidpunkto la armea institucio ne konsistas el la filoj de la laborantaj kamparanoj kaj urbaj popolamasoj devige enigitaj en la kazernon kaj perforte elsenditaj batali kon-

traŭ aliaj popoloj, kiel ankaŭ kontraŭ siaj fratoj interne de la lando, kiam ĉi tiuj, elĉerpinte sian paciencon elportante la mizeron, la subpremon kaj maljustaĵojn, levas sin en striko, stratmanifestacio aŭ ribelo kaj insurekcio. *La institucio de la armeo estas militkasto*, kiu de patro al filo transdonas la metion mortigi la homojn, kune kun la privilegion vivi plezurplenan vivon kaj malŝpari la sociajn bonaĵojn je malprofito de tiuj, kiuj ilin produktas.

Kaj oni devas konstati ke, se kompari la policon kun armeo laŭ sociaj malutilo kaj danĝero, la armeo tenas superecon; ĉar la polico, kiom grandega estas ties graveco kiel institucio de perforto kaj subpremado, de apoganto de la aŭtoritatuloj kaj kapitalistoj, neniam sukcesas transformiĝi en kaston, dum esenca distinga signo de la armeo (komprenu ĉiam »ties aganta konsisto«) estas ĝuste tiu, ke ĝi reprezentas kaston, kiu ofte de ŝtataŭtoritata instrumento transformiĝas al plena mastro kaj faktoro de si mem.

La armeo per la forto de la cirkonstancoj reprezentas la realan potencon de la regantaj klasoj, kaj nature akiras tian esceptan gravecon en la perforta subteno de la ekzistanta en donita lando sistemo, ke de servisto ĝi transformiĝas en efektivan mastron. Kiam la fostoj de reĝimo ŝanceliĝas, kiam ĝin minacas falego, la armeo estas la lasta apogo, »*la plej supera arbitracianto*«. Tiam la tutan ŝtataparaton oni metas je ĝia dispono; vole nevole ĉiuj ceteraj klasoj kaj kastoj submetiĝas al ĝi, por ke estu savita la regado de la privilegiuloj super la subprematoj.

Tio estas karakteriza fakto en la ŝtatoj de Latina Ameri–ko, kie la militistaj puĉoj estas ordinara fenomeno, ne

nur pro sia disvolviĝa postrestado, sed ĉefe pro la regado de la militista kasto. Tio estas karakteriza fakto en ĉiuj ŝtatoj, kie la reĝimo, kia ajn ĝi estas, fariĝas minacata de plena katastrofo. La nuntempa sperto montras, ke eĉ en la t.n. socialismaj reĝimoj, kie la »partio« tenas la ordonpovon kaj kie la polica aparato atingis ĝisdatan perfektiĝon, la lastan vorton havas la armeo en la sama okazo. Kaj ĝuste tio ĉi estas la vera socia rolo de la armeo; ĝia socia antaŭdestino estas pli malmulte utili al la ekstera defendo ol gardi la fundamentojn de la socio, kiu estas konstruita sur klasaj kontraŭecoj kaj privilegioj. La ŝtato estas tipa reprezentanto de tiu socio. La armeo –aŭ pli ĝuste la militista kasto kiu konsistigas la armeon– historie naskinta la ŝtaton mem, fariĝis ties nedisigebla parto. Ĝi ekzistos tiom longe, kiam ekzistos la ŝtato, kaj malaperos kune kun ĝi en la tago, kiam la laborantaj popolamasoj, ekkonsciintaj pri tiuj primaraj veroj, prenos en mano la armilon kaj ribelos, por fundamente detrui la tutan nuntempan ŝtataŭtoritatan konstruaĵon, sen sin helpi por la konstruo de la nova libera socio, de speciala perforta aparato nomata polico, milico, armeo aŭ kio ajn. Por sia defendo la popoloj bezonos nenion alian krom sia propra armeo, kaj tio, tiom longe kiam estos necesa ia defendo.

## Mono

Ĉiuj ekonomikistoj estas unuanimaj, kiam, parolante pri la mono, ili resumas ties rolon per tri funkcioj: *valormezuro, interŝanĝrimedo, amasiĝ– kaj ŝparrimedo*. Preskaŭ ĉiam oni forgesas alian esencan funkcion: *rimedo, instrumento de povo*. Kontraŭe al instruitaj ekonomikistoj la plej simplaj popolhomoj sentas ĉi tiun rolon de la

mono; de nememoreblaj tempoj ili ĝin determinis en sia kolektiva popolsaĝeco per plej diversaj nuancoj.

La historio de la mono estas longa, la mekanismo per kiu ĝi ekzercas sian povon estas kompleksa. Ni ne provos ekzameni la detalojn, ĉar se ni starigos al ni tian taskon, la spaco montriĝos ekstreme nesufiĉa, kaj niaj konoj tre malriĉaj. En la jarcento de la specialiĝo diletanteco ne havas lokon; tio gravas tiom pli en tiu sfero, kie interkonsento ne povas stariĝi eĉ inter la plej grandaj ekonomikistoj kaj financistoj. Nia tasko tie ĉi estas pli senpretenda. Ni devas determini la karakteron de la mono kiel instrumento de povo kaj montri principan rilaton al ĝi.

Ĝia historio. La mono ekaperas kiel simpla interŝanĝrimedo kaj tiucele oni utiligis diversajn objektojn dum la diversaj epokoj kaj ĉe la diversaj popoloj. Speciale rapida estas la monevoluo dum la kapitalisma epoko. La plej aĝaj inter ni estas samtempuloj de la ĉefaj etapoj en tiu ĉi evoluo. Ni memoras la tempon de la or– kaj argentmono, kiuj libere cirkuladis. Ni ankaŭ estas atestantoj de la transformado de la oro en ununuran etalonon, al kiu poste oni lasis nur la rolon de garantianto kiel banka kovraĵo, sen plu servi kiel pagrimedo nek kiel interŝanĝa mono. Ni memoras, kiel la oro iom post iom retiriĝadis, kaj multfoje ankaŭ kiel banka kovraĵo. Kaj hodiaŭ neniu plu serioze rigardas tiun surbankbiletan tekston, kiun ĉiuj ni scias, kaj kiu hodiaŭ estas nur fabelo: al neniu pretendanto, sub neniu cirkonstanco, la banko pagos per oro. La oro eĉ kiel pagrimedo en la internacia interŝanĝo ne jam ludas sian malnovan rolon kaj ne havas la stabilecon, kiu iam neŝancelebla aspektis. Ni estas

atestantoj de la stronga fakto, ke la rusoj vendas oron en fremdlando por provizi sin per fortaj devizoj, kiuj montriĝas pli stabilaj ol la oro. Ni estas atestantoj de la evoluado, kiun trasuferis ankaŭ la paper–mono. ĝis alta grado ĉi–lastan oni anstataŭigis per la ĉekoj, per la ĝiroj, per simpla banka letero. Negocojn por milionoj oni kontraktas, oni vendas kaj aĉetas, kaj ja kelkfoje sen bezono pagi per mono. Tio ne signifas, ke la mono perdis sian gravecon, nek ke ĝi ĉesis ludi sian rolon: ekzistas nur ekstrema komplikeco de la mekanismo, per kiu ĝi praktikas sian misteran povon super la homo. En la kapitalisma epoko ĝi tiel vaste disetendis sian povon, multobligis kaj komplikis la fadenojn per kiuj en la araneaĵo ĝi tenas la homojn, ke tiu povo estas ofte nekontrolebla kaj elglitas el la manoj eĉ de la aŭtoritatuloj, kiuj ŝanĝiĝas en ĝiajn peonojn. La mono aliformiĝis al la plej distinga signo, *simbolo* de la kapitalismo. Tie ĉi ni ne povas nin deteni citi la difinon, kiun al ĝi donis Sebastien FAURE en la *Anarkiisma Enciklopedio*, ĉar estas neeble doni pli precizan kaj pli bonan karakterizaĵon:

> *»Neniu alia epoko meritis pli ol la nia la nomon ›Jarcento de l' mono‹. En neniu alia momento de la historio la mon-suvereneco estis tiel nedisputebla. Pli malnobla laŭ siaj originoj, pli terura portanto de malsato kaj tiraneco ol ĉia feŭdismo per la rimedoj kaj metodoj, kiujn ĝi uzas, la mon–suvereno hodiaŭ regas la mondon. La riĉeco de iuj miliarduloj, reĝoj de l' fervojo, de la tritiko, petrolo, fero, ŝtalo, estas senlima magneto, kies altira potenco englutas la tutan homan laboron. La monrimedoj, pri kiuj disponas la internacia financistaro donas al ĝi eblon akapari la tutan mondan produktadon kaj monopoligi ĉiujn ties profitojn. Ĉiuj ŝtatoj estas subigitaj al la volo de tiu ĉi monstra monpotenco, kies dependantoj kaj sklavoj nerekte fariĝas la privatuloj«.*

Kaj en alia frazo Sebastien FAURE per specifa simpleco sia, pleneco kaj beleco ankoraŭ pli klare karakterizas ĉi tiun nekorekteblan, penetrantan monpovon en la hodiaŭa socio:

> *»En socio, kies strukturo konstruiĝas sur la profito, la mono donas al tiu, kiu ĝin posedas efektive aŭ ŝajne, ĉiujn privilegiojn, ĉiujn avantaĝojn, ĉiujn virtojn, ĉiujn superecojn. La stultulojn ĝi prezentas saĝaj, al la maljunuloj donas junecon, al la malbeluloj, belecon, al la kruduloj, delikatecon, al la malvirtuloj, virton. Kun sukceso ĝi ankaŭ defendas la plej nedefendeblajn aferojn kaj al ili certigas venkon. Ĝi sin enŝovas en ĉiujn homrilatojn kaj tien enkondukas malnoblecon, intrigon, envion, malamon«.*

Se ni provas sen antaŭjuĝa ideo analizi la tri esencajn signojn de la mono, ni facile konvinkiĝos, ke per superflua mito ĝin kovras la burĝaraj ekonomikistoj. Valormezuro? Jes, la mono servas kiel tia. Sed ĉu ĝi havas la karakteron de tio, kion oni akceptis konsideri efektiva mezuro, ĉu ĝi povas esti komparata, ekzemple, kun la metro, kun la kilogramo, ĉu ĝi havas tiun precizecon kaj neŝanĝemon, ĉu ĝi respondas al komuna kompreno pri la vero? Kiu povas konvinki nin, ke ĝi estas »mezuro« por valoro, kiam, pro inflacio kaŭzita de troa fabrikado de mono, fare de la registaro –kiu provas tiumaniere kovri siajn buĝetajn deficitojn kreitajn pro supermezuraj militaj elspezoj– ni estas devigataj aĉeti duoble pli multekoste la produktaĵojn, kiuj hieraŭ estis produktitaj per la sama laboro hodiaŭ postulata, per elspezoj per materialoj kaj rimedoj, kiuj restas neŝanĝitaj? Jes, mezuro estas ĝi sed ne por mezuri la valoron, efektivan produktan valoron, sed mezuro por prirabi la konsumanton, utiliĝinte kiel mezuro por prirabi la produktanton.

Interŝanĝa rimedo? Jes, la mono estas fakte oportuna interŝanĝa rimedo, multe pli taŭga ol la tritiko, salo, juveloj, bestoj, ĉasistaj kaj fiŝkaptistaj iloj kaj aliaj objektoj, kiuj iam servis kiel interŝanĝaj rimedoj ĉe la diversaj popoloj. Tiu oportuneco, kiun ĝi prezentas –kompreneble por tiuj, kiuj ĝin posedas; por tiuj, kiuj estas senigitaj je ĝi, ĝi estas ĉeno– en hodiaŭa moderna socio, pravigas multajn por doni al la mono novan atributon: garantion de libereco; iluzio de kiu logiĝas eĉ homoj principe kontraŭantaj al la mono. Oni forgesas tamen, ke pro la inter la popoloj bariloj levitaj de diversaj, naciaj monunuoj, unuj konsumas multekostan »nacian« produktaĵon por ne ruinigi sian landon kaj sian ekonomion per malkaraj produktaĵoj el fremdlando; aliaj estas ĝenerale devigataj limigi la konsumon de siaj propraj produktaĵoj por ilin eksporti kaj ricevi la de la lando bezonatan importan valuton; kaj triaj en senlaboreco kaj malsato neniiĝas pro la malsanoj, kiujn ili ne povas kuraci, ĉar la kuracistoj al ili rekomendas »fortigan nutraĵon, plenan ripozon kaj puran aeron«. Estas ja konate, ke la ĉinoj, kies ĝenerala nutraĵo estas rizo, kiuj nutris, per rizo la mondon, ofte konsumis malpli da rizo –kaj ja la plej malbonkvalita– ol la ceteraj popoloj ne produktantoj de rizo kaj kiuj ĝin ricevadis el Ĉinujo je prezoj pli malaltaj ol tiuj praktikataj sur la interna ĉina merkato. Jes, interŝanĝa rimedo estas la mono same sur la ekstera (hodiaŭ pli malmulte ol iam) kiel sur la interna merkato, kompreneble ne ĉiam tiel oportune kiel oni tion prezentas, sed *rimedo por prirabi la produktanton kaj la konsumanton*. Per tiu prirabo ĝi efektive ricevas sian lastan, nedisputeblan kvalifikon de *rimedo por amasigo* de ŝparaĵo, kio donas al ĝi la rolon de mova forto en la kapita-

lisma maŝino.

La bolŝevistoj dum la tempo de LENIN rememorante, ke ili estas »socialistoj«, provis anstataŭigi la monon konforme al la doktrino de MARKSO per laboraj kreditbiletoj. Tiu eksperimento fiaskis, samkiel ĉiuj aliaj eksperimentoj realigi la socialismon pere de la ŝtato, kiu, neniigante la privatan kapitalismon, neeviteble devis ĝin anstataŭigi per la ŝtata kapitalismo. Ŝanĝo de la formoj ne ŝanĝis la enhavon: la subpremado kaj ekspluatado restis, devis resti ankaŭ la mono, kiu servas kiel *instrumento de la subpremado kaj ekspluatado*. Kaj tiel revenante al la klasika monunuo kun ora etalono, la bolŝevistaj reĝimoj, tial ke ili estas totalismaj, devis apliki la absolutan mondirektadon. Ilia monsistemo estas subigita al absoluta kontrolo. Sed plej terura diktaturo tia, kian la bolŝevistoj estigis, montriĝis senpova plene forpreni la propran povon de la mono, kiu ne ĉesas manifestiĝi eĉ ĉe la plej pedanta kontrolo. La fenomeno inflacio estas ankaŭ tiel karakteriza –kaj ofte pli– kiel ĉe la kapitalismo. Por lukti kontraŭ ĝiaj ruinigaj batoj, la bolŝevistoj trude limigas la moncirkuladon, devigante la entreprenojn kaj privatulojn utiligi ĉefe bankpagojn. Sed ĉar ilia ekonomia kaj militista politiko trudas troan disvolviĝon de la pezindustrio, kaj la feron ne povas konsumi la civitanoj, kiuj preferas la panon, viandon, fromaĝon, la vestaĵojn kaj loĝejon anstataŭ »la katuŝka«, interkontinentaj raketoj kaj »sputnikoj«, ili estas devigataj periode elpreni el la civitanoj la monon per »popolaj« pruntoj kaj per enormaj buĝetoj, ĉiam bilancitaj per »troaĵoj«. Tiel la inflacio ŝajne mortiĝas, kaj ĉe la civitanoj kreiĝas la iluzio, ke »sur la merkato estas ĉio, sed

mankas nur la mono«. Kaj la vero estas, ke la mono mankas, ĉar oni ĝin prenas fiksperiode, ĉar la salajroj estas malaltaj kaj la konsumbonaĵoj nesufiĉaj; kaj se la diktatora monpolitiko ne intervenus, la inflacio estus evidenta por ĉiuj kaj la katastrofo neevitebla. Tiel la bol–ŝevistoj vivas en konstanta krizo, kaj, estante plenaj fizikaj mastroj de la regpovo, ili konstante dependas de la povo de tiu ĉi potenca instrumento: la mono, kontraŭ kiu ili estas en eterna batalo. La mono por la bolŝevistoj –tio cetere gravas ĝis alta grado ankaŭ por la okcidenta demokratio– estas samtempe kaj servisto kaj mastro.

La anarkiistoj, refutante la kapitalismon, refutas ankaŭ ties plej karakterizan signon –la monon. Ili estas profunde konvinkitaj, sin bazante sur pristudoj kies materialon liveras la historia ekzemplo, ke ne estas forto, kiu povas transformi la monon de instrumento por ekspluatado kaj povo en simplan interŝanĝan rimedon. Nenia kontrolo estas en situacio neniigi ĝian propran povon. En socio, kiu forigos la profiton kaj organizos la produktadon konforme al la bezonoj, la interŝanĝo mem en hodiaŭa formo malaperos. Komunismo ne estas ebla tiom longe dum ekzistas la vera interŝanĝo, kies nepre necesa rimedo estas la mono. Kio anstataŭos la monon en libera socio, kiel oni organizos la konsumadon? Jen nova problemo, kiu aldoniĝas al vico da aliaj, naskiĝintaj el nia ĝisnuna traktado, problemoj al kiuj la legantoj kun plena rajto atendas respondon. Kaj ili ĝin ricevos.

## Imposto

Ni venas al demando, laŭ kiu ankoraŭfoje la diferenco inter la anarkiistoj kaj ĉiuj partizanoj de la ŝtato relief–iĝas en plena klareco. Se la leganto tie ĉi klopodas kom-

preni nian penson, ĉi tiuj nemultnombraj linioj sufiĉos al li por kompreni la esencon de anarkiismo, la profundan sencon de la batalo de la anarkiistoj kontraŭ la ŝtato kaj de ilia tuta historia ekzisto kiel movado.

Por la partizanoj de la ŝtato meze de la defendantoj de la malnova socio, la imposto estas akiraĵo de la moderna vivo, oportuneco por la civitano kreita por anstataŭi lian rektan personan laborkontribuon en la subteno kaj funkciado de la soci–utilaj servoj, iniciatoj kaj aktivaĵoj. Anstataŭ partopreni en la konstruo de la pontoj, vojoj, lernejoj ktp, anstataŭ esti vokita por doni dum certa tempo sian laboron por la utilo de la kunvivado, kiu faras al li multnombrajn kaj plej diversajn servojn, la civitano pagas iun sumon per kiu li aĉetas ĉiujn servojn, kaj post tio li estas libera prizorgi trankvile sian okupon. Tiu ĉi libereco al li certigita per la pago de la impostoj estas simila al la libereco certigita de la mono, dank' al kiu oni povas iri kien oni volas kaj aĉeti kion oni deziras sen neceso de pernaturaĵa interŝanĝado, t.e. sen neceso kunporti siajn produktaĵojn, kio aperas neebla eĉ en la hodiaŭa ekonomio.

Laŭ la marksistoj por kiuj la burĝara ŝtato estas nur ilo de la regantaj klasoj ekspluati la proletaron, la imposto estas rimedo por efektivigo de la burĝara politiko kaj por translokado de ĉiuj materialaj sociaj pezoj sur la laboruloj, t.e. nur »rimedo por riĉiĝo de la riĉuloj«.

Tiel ke, nek unuj nek aliaj –neniu el la partizanoj kaj defendantoj de la ŝtato burĝara aŭ »socialisma« kaj »proletara«– vidas en la imposto fonton kaj instrumenton de povo. Kaj tamen facile estas konstati kaj pruvi, se oni ĵetas rapidan rigardon super la historian aperon de la im-

posto kaj analizas la ciferojn de la oficialaj statistikoj en hodiaŭa tempo, kiel oni plusekvas la efektivan rolon de la imposto ankaŭ en la funkciado de la nuntempa ŝtato.

La historian originon de la imposto oni serĉu en la sklaveco kaj la servuteco, kiuj siavice estas konsekvencoj de la militoj kaj perforta konkero kaj subigado de fremdaj landoj kaj popoloj. Kio estas konata en Bulgario sub la turka nomo »angaria« (trudita senpaga laboro), tio ne estas ekskluziva fenomeno de la turka jugo; ĝi estas specifa karaktero de ĉiuj konkerintoj kaj subigintoj. La sklavigita popolo devas senpage labori, kiel senpaga sklavo de la konkerinto. Poste la »angaria« disvastiĝas kaj aplikiĝas ankaŭ al la propraj ŝtatanoj, ĉar, kiel diras la francoj »dum la manĝado venas apetito«, t.e. la senpaga sklava laboro »pliigas la apetiton« de la mastroj kaj ili ekaplikas tion ankaŭ al sia propra popolo. Sub la servuteca sistemo, la servutigitaj kamparanoj de la feŭdulo, de ties farmisto aŭ de bienposedanto estis devigataj senpage labori almenaŭ tri tagojn ĉiusemajne por la sinjoro. La francan revolucion sekvis ondo de liberigaj movadoj en la tuta Eŭropo, metis finon al la servuteco kaj anstataŭigis la senpagan laboron profite al la sinjoro per imposto pagenda al nova ĝenerala mastro: la ŝtato. Labora ŝuldoservo al la komunumo estas akcesora kaj tute ne grava elemento en la origino de la imposto.

Frukto de konkero, de subigado, la imposto en sia primara formo –sklava laboro, servuteco, t.e. frukto de povo– iĝas mem siavice fonto kaj apogo de la povo. La »angaria« eĉ en hodiaŭa ŝtato moderna ne tute malaperis, kaj ĉe la stalinaj reĝimoj ĝi aplikiĝas paralele kun la perimposta sklavigo kaj prirabo de la popolamasoj.

Kiom malmulte diferenciĝas la marksisma feŭdismo de la klasika servuteco!

Per la imposto, nuntempa ŝtato sisteme tenas relativan malriĉecon ĉe la popolamasoj, kaj per tio ilin faras dependaj, subigitaj; samtempe ĝi pliigas sian povon super la popolo. Kiom malgrandiĝus la efikeco de la tuta subprema, parazita kaj ekspluatada aparato ŝtata, se ĝi seniĝus je la ekonomia kaj financa potenco, kiun garantias al ĝi la impostoj! KROPOTKIN tre ĝuste karakterizas la soci–ekonomian rolon de la imposto kiel rimedo por efektivigi la povon de nuntempa feudoŝtato, en sia libro *Moderna ŝtato*, libro kiu bedaŭrinde estas malmulte konata eĉ de la anarkiistoj, kaj kiu povus utili kiel fundamento de profunda pristudo de la imposta esenco kaj por ideologia ellaborado kaj riĉigado de anarkiismo en la nuntempa epoko. »Se la hodiaŭaj ekonomikistoj –diras KROPOTKIN– serioze sin okupus pri kalkulado de tio, kion reprezentas la impostŝarĝo por la civitanoj sub la formo de salajroj, ili konstatus, ke la hodiaŭa t.n. ›libera civitano‹ donas al la nuntempa feŭdŝtato multe pli ol la tri tagoj, dum kiuj la iama servuta vilaĝano senpage laboris por la tiama feŭdulo«. La riĉeco de la hodiaŭaj statistikaj donitaĵoj multe faciligas tian taskon. Eĉ ne necesas, ke homo estu granda ekonomikisto por fari tian analizon kaj proksimuman kalkulon.

Jen estas iuj oficialaj donitajoj prenitaj nur kiel ekzemplo: dum la 1952/53 imposta jaro la impostŝarĝo repre–zentis el la nacia enspezo 34,3 % en Usono, 48 % en Anglujo, 29,8 % en Francujo. Nu, proksimume »la tri tagojn en la semajno« de la servuta vilaĝano! Tamen, oni ne preteratentu la »normalan« malĝustecon de tio, kion

oni nomas »nacia enspezo«. Estas konate, ke 1a kalkulmaniero de la nacia enspezo permesas inkludi en ĉi–lastan ne nur la enspezojn de la burokratoj, bankieroj, negocistoj kaj ĉiuj kategorioj de parazitoj, kiuj ne kreas bonaĵojn, sed eĉ tiujn de la prostituitinoj. Tiel la cifero de la entuta nacia enspezo estas ege ŝveligita, kaj per tio relative malaltiĝas la procenta rilato de la impostoj al la nacia enspezo.

Profunda esploro de tiu problemo kun la necesa analizo de la dispartigo de la impostŝarĝoj samkiel tiu de la elspezoj laŭ la ŝtata buĝeto ne povas esti objekto de mallonga ĉapitro. Konvene kaj necese estas tamen, ke oni emfazu, kiom granda estas la parto de la militaj elspezoj. Por la sama 1952/53 jaro la militaj elspezoj laŭ la oficialaj donitaĵoj reprezentis 21 % el la nacia enspezo en Usono, 14,4 % en Anglujo kaj 15,4 % en Francujo.

Ne pli bona, male, multe pli malbona estas la situacio en t.n. »socialismaj« landoj. Tie ne nur »angaria« –sub formo de koncentrejoj, brigadoj, »libervolaj« donacoj de kromhoroj pro diversaj kaŭzoj kaj sen kaŭzoj– estas transformita en sistemon, sed ankaŭ la impostŝarĝo estas multe pli peza, kaj la imposto ideale plenumas sian tipan rolon de instrumento de la ŝtat–partia diktatura povo. Estas oficiale rekonate, ekzemple, ke en S.S.S.R. kaj ĝiaj satelitoj »akumulado« t.e. trudaj sumapartigoj por investota kapitalo de la bolŝevista ŝtata ekonomio reprezentas meznombre 25 % el la nacia enspezo, kaj la ŝtataj buĝetoj neniam falas sub 50 % el la nacia enspezo. Ni citu ekzemple Bulgarion. La nacia enspezo laŭ oficialaj donitaĵoj estis (rondcifere kaj laŭ la prezoj de 1956): 24 miliardoj da levoj en 1954 kaj 31 miliardoj en

1955. La antaŭviditaj kaj ĉiam realigitaj »troaĵoj« en la enspezoj de la ŝtata buĝeto (rondcifere kaj laŭ kurantaj prezoj, kiuj ne estas tre diferencaj de tiuj de 1956) estis respektive: 16 miliardoj, 19 miliardoj, 18 miliardoj (por 1954–1955). Do, en 1952, 70 % el la nacia enspezo estis englutita de la ŝtata buĝeto; tiu ĉi procento estis poste reduktita por atingi 56–57 % en 1955. La bolŝevista dialektiko rapidas nebuligi kaj falsprezenti la faktojn, prezentante la impostojn sensignifaj, ĉar la pligranda parto el ili estas enskribita kiel enspezoj el la »socia ekonomio«. Por ili, la vendenspeza imposto, kiu neniam malaltiĝas sub 50 % el la suma impostmaso, ne estas imposto, sed »enspezo de la socia ekonomio«, kvazaŭ tiu ĉi imposto pagiĝus ne de la konsumantoj, produktistoj–laboristoj, kamparanoj kaj metiistoj –kiuj konforme al la marksisma politika ekonomio estas la solaj produktantoj de bonaĵoj, t.e. kreantoj de valoraĵoj– sed de la direktoroj kaj kontistoj de la entreprenoj, kiuj anticipe enkasigas en la ŝtatkasojn ĉi tiun imposton kaj poste ĝin enkalkulas en la prezoj de la de ili liveritaj varoj. Kaj poste, por la bolŝevista sofistiko ĉio estas entrepreno, inkluzive de la ŝtataj organoj por aĉeto de la rabitaj de la kamparanoj produktaĵoj laŭ la devigaj al la ŝtato liveraĵoj, per kiuj dank' al la katastrofa diferenco inter la aĉetaj kaj vendaj prezoj oni realigas grandajn profitojn por la ŝtato (kaj tio eble estas la ĉefa paragrafo de la bolŝevista buĝeto).

La stalina dialektiko klopodas trompi ankaŭ per alia argumento, nome, ke la impostojn oni utiligas ĉefe por »ekonomia konstruado«, por »popola kulturo« ktp. Eĉ se estus vere, ke granda parto de la buĝetaj rimedoj estas

utiligataj en la ekonomia konstruado por la popolo kiu pagas, kaj por la laboristoj kiuj partoprenas per sia laboro en tiu konstruado, tio havas nenian gravecon, ĉar la sofistiko al neniu povas kredigi, ke la ŝtataj entreprenoj apartenas al la popolo. Ili apartenas al la ŝtato, t.e. al tiu grandega parazita aparato, kiu ĝin konsistigas, aparato por subpremadi, por prirabi, por eternigi la sklavecon. La laboruloj kiel »komunaj proprietuloj de la entreprenoj« ricevas nur mizerajn salajrojn, kiujn ili uzas ĉefe por nutroprovizado, kaj kiuj ne sufiĉas por vestado.

La marksistoj pretendas, ke ili estas ekonomikistoj kaj ja unuranguloj, kiuj utiligas la grandajn malkovrojn de MARKSO. Nu bone, kiel ekonomikistoj prenu la krajonon kaj kalkulu kune kun ni antaŭ la okuloj de la tuta popolo kaj de la tuta mondo, kiom el la nacia enspezo ricevas laŭkape la loĝantaro, kaj precipe el la parto de la loĝantaro, kiu produktas tiujn bonaĵojn; kiom el la nacia impostŝarĝo pagas laŭkape la loĝantaro kaj laŭkape la produktantoj. Ili havas ĉiujn donitaĵojn, kaj tiu ĉi kalkulo estas facila kaj simpla. Dum 1955, ekzemple, kiel ni jam montris, la nacia enspezo sumiĝis 31 miliardoj (laŭ la prezoj de 1956) kaj la enspeza parto de la buĝeto sumiĝis je 18 miliardoj. Dum la sama jaro la loĝantaro sumiĝis je 7.547.000 da homoj; la kalkulo laŭkape montras rondcifere: 4.180 levoj da jara enspezo kaj 2.400 levoj da jara buĝeta elspezo, t.e. ni denove trovas gravan plimultiĝon de la ĉiusemajnaj tri tagoj da senpaga laboro de la servuta sklavo.

En la soci–ekonomia rolo de la imposto estas ankaŭ alia flanko, kiu meritas specialajn pristudojn, kies rezulto fundamente refutas la marksisman koncepton pri la

mistera fatala rolo de la ekonomiaj fortoj. Tiuj ĉi pristudoj konstatus laŭ plej senduba maniero, ke »la imposto estas rimedo por pliriĉiĝo de la riĉuloj« ĉe la burĝara ŝtato (tie ĉi la interkonsento inter ni kaj la marksistoj estas plena) kaj rimedo por kreado de kastoj ĉe la bolŝevista ŝtato. Je tiu nivelo ekzistas kruda grundo por la laboro de veraj ekonomikistoj. Ilia tasko estas konstati kiun parton reprezentas la ŝtataj subvencioj, la ŝtataj pruntoj[3] kaj la monopoloj en la akumulado de kapitaloj en la subvenciitaj industriaj kaj komercaj entreprenoj; iuj »protektataj produktadoj«; la altaj salajroj, diversaj premioj kaj rekompencoj –vilaoj, aŭtoj, malĉasta vivo de la bolŝevista »elektitaro« el la grandaj partiaj kaj sindikataj gvidantoj, artistoj, burokratoj, ktp. Sed tio ĉi estas alia, kvankam ne malpli grava, temo. Por resumi, ni diros, ke profundaj esploroj en tiu direkto nedubeble pruvos, ke la ŝtato kreas en la sama grado kapitalistojn kaj privilegiajn sociajn kategoriojn; la kapitalistoj kaj privilegiaj kastoj kreas kaj apogas la ŝtatan institucion, kiu al ili utilas por konservi siajn privilegiojn. En tiu ĉi rolo de la ŝtato *kiel faktoro de kapitalisma akumulado kaj formado de klasoj*, la imposto estas unu el la plej potencaj ĝiaj fostoj. Jen kial ni rifuzas la ŝtaton, kaj ĝin refutante, ni samtempe refutas ĉiujn instrumentojn kiuj subtenas ĝian aŭtoritaton, inklusive de la imposto, potenca levilo el ĝia maŝino.

3 La ŝtataj ŝuldoj nur por internaj pruntoj per kiuj oni ĝenerale akceptas la militajn elspezojn je la konto de venontaj impostoj, sumiĝis en 1952 je 267 miliardoj da dolaroj en Usono, je 26 miliardoj da pundoj en Anglujo, je 4.872 miliardoj da frankoj en Francujo, kaj je 3.188 miliardoj da liroj en Italujo.

## Lernejo, scienco, arto

Ĝis nun ni parolis pri la povinstrumentoj, kies karaktero destino kaj socia rolo estas absolute determinitaj kaj ne povas servi por alio, krom estiĝo, kreo kaj efektiviĝo de povo. Sekve, nia sinteno antaŭ ili, kiel anarkiistoj, estas senkondiĉe negativa. Estas tamen aliaj institucioj kaj formoj de aktiveco, kiuj egale povas servi kiel instrumentoj de povo, ankaŭ kiel rimedo por lukto kontraŭ povo, depende de tio en kiu manoj ili estas, kiel ili estas konstruitaj kaj de kia spirito enpenetritaj. En tiu kategorio oni povas enkalkuli la diversajn kategoriojn de profesiaj, kultur–klerigaj kaj aliaj organizoj, la familio, la lernejo, scienco, arto, gazetaro, radio, televido, ktp. Tie ĉi ni pritraktos nur la lernejon, la sciencon kaj arton.

La lernejo plej ofte kaj en la plejparto el la landoj de la mondo estas rekte subigita al la ŝtatoj; ĝi efektivigas ties edukan politikon, kaj servas pli aŭ malpli kaŝite por ties celoj, kreante regatojn, impostpagantojn, soldatojn kaj ĝenerale »fidindajn, honestajn« civitanojn. Iuokaze tamen, –kaj speciale en la landoj kun malnova kaj profunde enradikiĝinta katolikismo– estas ankaŭ t.n. »liberaj« lernejoj, kiuj estas enplektitaj en la densa reto de la eklezio, per kiu ĉi–lasta tenas en spirita obeo la kreskantajn generaciojn. Kaj en la du okazoj la lernejo aperas instrumento de la povo, levante al kulto la aŭtoritaton, kaj firmigante –pere de zorgeme dozitaj konoj en formo konvena por la celo, prezentitaj al la delikataj infanaj cerboj– la jarcentajn erarigojn de la aŭtoritata koncepto. En la totalismaj, faŝismaj kaj bolŝevistaj ŝtatoj, la lernejo iras ankoraŭ pli foren kaj laŭ klara kaj bone determinita maniero metas la tutan socian edukadon en la servon

de la regantaj oligarkioj; tiucele oni utiligas ankaŭ la eksterlernejajn aŭ aldonlernejajn infanajn kaj junularajn organizojn, kiuj ofte estas kvazaŭ militecaj.

Tiu ĉi lerneja rolo kiel pova instrumento estas en radi–kala kontraŭeco kun la spirito mem de la nuntempa pedagogia scienco, kiu estas esence anarkiisma laŭ celo, enhavo kaj metodo. Konforme al la moderna pedagogio, la lernejo devas aparteni al la infano kaj esti entute subigita al ties bezonoj por plena kaj tuta fizika, intelekta kaj morala disvolviĝo. La celo de la lernejo laŭ la fundamentaj principoj de tiu ĉi scienco devas esti la formado de liberaj homoj.

La sama konstato tamen ne aplikiĝas al ĉiuj sciencaj fakoj malgraŭ tio, ke ĝenerale la scienco serĉas la veron kaj strebas al subteno de progreso. Kiel ĉia aktiveco en la kadro de la hodiaŭa aŭtoritata sistemo la scienco ne restas fremda al la reganteca spirito, ĉar ĝiaj portantoj estas homoj kiel ĉiuj aliaj, kun siaj aŭtoritataj antaŭjuĝoj, ĉiutagaj materialaj interesoj, siaj submetiĝo kaj dependeco antaŭ la influaj personoj, kiuj ne malofte respeguliĝas en la scienco de ili kreata. Tiu ĉi dependeco estas speciale grava rilate al la ekonomie fortaj, kiuj plej ofte tenas en siaj manoj la politikan povon ŝtatan. Tiuokaze la scienco, same aperas instrumento de aŭtoritato. Kaj kio estas ankoraŭ pli bedaŭrinda – ĝi iam akiras ĉi tiun hontigan kaj domaĝan rolon, kontraŭ la volo de la sciencistoj mem. Multajn el iliaj per si mem valoraj eltrovaĵoj, kreitaj por helpi la progreson kaj homkulturan disfloriĝon, oni jungas por la servo de la detruado kaj kontraŭ la homaj interesoj. Kaj tiel estos, tiel longe dum la sociaj riĉaĵoj kaj ĉiuj akiraĵoj de la homspirito estos mo-

nopoligitaj de la posedantoj de la ekonomia, politika kaj spirita povo super la homoj kaj super la produktistoj de ĉiuj bonaĵoj. Jen kial, fore de ĉiu penso nei la sciencon kaj ĝian principe noblan rolon, ni, anarkiistoj, deziras vidi ĝin liberigita de la ĉenoj de pov- kaj kapitalregantoj, por ke ĝi ĉesu servi en kiu ajn grado kiel instrumento de povo.

La supraj konstatoj kaj rezonadoj validas ankaŭ por la arto en ties subdividoj. Esence anarkiisma laŭ sia geneso mem kiel kreiva procezo de la libera spirito, *la arto estas ribelago kontraŭ ĉiaj ĉenoj* sur la vojo al disvolviĝo, kaj ĝian valoron oni mezuras per la grado de sendependeco en la kreo de bildoj, en la detruo de superstiĉoj kaj en la entuziasmo de la plej sublimaj streboj al beleco, al perfekteco kaj al memrealigo kaj spirita memkonformigo. Ekster tiuj kondiĉoj, ekster la libereco kaj sendependeco de kreiva eksvingo ne estas altvalora arto –ne estas arto ĝenerale.

Sed kondamnitaj vivi en socia medio, kie la mona diktaturo kaj narkoto de la povo diktas la ekzistoleĝojn, la artistoj ne ĉiam havas la forton resti sendependaj kreantoj, kaj bedaŭrinde ne malofte metas la arton en la servon de la potenculoj, tiel transformante ĝin en instrumenton de povo, kaj per tio ĝin pereigas, ĉar de korkonanto ili ĝin mallevas al vulgara burleskulo aŭ publikplaca agitanto.

Por ke lernejo, scienco kaj arto ĉesu servi kiel instrumentoj de povo, kaj trovu sian veran destinon –kiu estas disvastigi sciojn, lumon kaj veron, alten levi esploreman spiriton, kunlabori en la ĉiuflanka progreso, kaj econ kaj perfektecon en spirito de humaneco, solidareco, justeco

kaj libereco– *devas esti liberigitaj de la kuratoreco de la ŝtato, kapitalo, eklezio, partio*, kaj de kia ajn formo de monopolo.

## Gazetaro, radio kaj televido

La gazetaro, radio kaj televido estas unuj el la plej potencaj instrumentoj de povo. Ili renversas kaj levas, kre–as kaj neniigas geniulojn, klinas al silento kaj destinas al forgeso, sentalentecon transformas en tutmondan famecon. En sia destino deflankigi la atenton de la popolamasoj for de la vivesencaj problemoj ĉiutagaj, aŭ servi kiel reklam–rimedo, ili estas efike helpataj de sporto kaj kino.

Ni kompreneble estas for de la intenco nei la utilecon de sporto aŭ de kinarto, eĉ malpli tiun de la gazetaro, radio, kaj televido, eĉ ĉe ilia hodiaŭa utiligo. Estas klare, ke ili povas egalbone esti uzataj kiel edukfaktoroj kun vasta influo super la popolamasoj. Kaj tia estas ilia es–tonta, destino en iu socio, kie ili ne estos monopolo. Ho–diaŭ tamen ili estas ĉefa rimedo por fabrikado de mensogoj, eraroj, kaj por fasoni la publikan opinion laŭ la gusto kaj interesoj de la kapitalistoj kaj aŭtoritatuloj, kiuj tenas la komandpostenojn en la ekonomia, politika kaj spirita vivo de la popoloj. Kaj tio estas des pli vera, ju pli antaŭen iris donita lando en sia kapitalisma disvolviĝo; kaj ju pli en la landoj kun diktatoraj reĝimoj, speciale la bolŝevistaj, kie la monopolo estas principe absoluta, sendepende de la grado de ekonomia disvolviĝo.

Tiuj el ni, kiuj vivis kaj vivas en kapitalismaj landoj, povas scii kiom malfacile estas krei ĵurnalon, kaj atingi ke ĝi trabatu al si vojon kaj konfirmiĝu; aŭ ĉe la tute forma-

la libereco pri esprimo de la opinioj, kiom malfacile estas penetrigi iun artikolon, eĉ iun komunikon en la ek–zistantajn gazetojn, kiam ili ne respondas al la cellinio kaj interesoj de la koncerna ĵurnalo. Glacia muro el silento staras antaŭ vi, infera ringego de plena izolado vin ĉirkaŭbaras, kaj kondamnas resti eterne kun fermita buŝo antaŭ la vasta publiko. En Bulgario, male, tia kia estis la lando antaŭ la bolŝevisma stariĝo, eĉ dum la tempo de duonfaŝisma reĝimo, ĉiam eblis kreiĝo de plej malmulte unu semajnĵurnalo, kaj eblis trovi sufiĉan nombron da legantoj por sekurigi ĝian subtenon kaj regulan aperigon. Kiu estas la kaŭzo de tiu ĉi diferenco?, Ju pli disvolvita estas kapitalismo, des pli plena estas la monopolo. Antaŭ ĉio la gazetaro en la kapitalisme disvolviĝintaj landoj estas nekredeble altpreza, kaj en tio esprimiĝas la ekonomia monopolo, ĵurnalojn eldonas tiuj, kiuj havas multe da mono, kaj kiuj, efike helpataj de rekta kaj nerekta reklamo, per longa kaj persista klopodo sukcesas atingi sufiĉe grandkvantan eldonon por povi pagi la multekostan presadon kaj multekostan subtenadon; aŭ tiuj, kiuj estante pretaj servi la aŭtoritatulojn kaj kapitalistojn, certigas al si la financan subtenon de trustoj kaj karteloj aŭ de sekretaj fondusoj. Tia estas la kapitalisma realeco.

Koncerne la radion kaj televidon, ili ĉie estas ŝtata monopolo. Konsekvence, ilia utiligado estas certa nŭr por tiuj, kiuj tenas la ŝtatan direktilon kaj por tiuj, kies opinioj kaj konceptoj ne profunde diferencas de la regantoj. Kaj kiu potenca rimedo por formado de la publika opinio kaj por ideologia orientado estas ili! La radio kaj televido eĉ ne postulas fortostreĉon, kiel legado de ĵurnalo;

suficâs turni butonon, por ke komenciĝu per mensogoj kaj erarigoj la cerboŝtopado de la aŭskultanto kaj lia familio, sen eĉ tio, ke ili devu ĉesi ian alian okupon, kiu ne postulas la tutan atenton. En la bolŝevistaj landoj tiu rimedo por cerboŝtopi iris ankoraŭ pli foren: oni sparigas al vi eĉ la fortostreĉon, kiun prezentas butonturno, »la partio kaj la registaro« prizorgas »radioprovizadon« por tutaj dom–aglomeraĵoj kaj la orelojn de la civitanoj oni surdigas kaj tage kaj nokte per la oficialaj kaj severe dozitaj radiodisaŭdigoj.

Kontraŭ tiuj potencaj rimedoj de povo kion vi povas kontraŭmeti, kompatinda civitano kies voĉo, se ĝenerale ne sufokita, restas simple fizika, povas aŭdigi plej multe ĝis 50 metroj de vi en iu »Hyde–Parko«, kie la »bonmoraj civitanoj« vin konsideras duonfreneza!

Interesa kaj tre edifa estas ekzemplo, kiu meritas esti bone fiksmemorita: Generalo Franko havis intereson prezenti ĉian kontraŭfrankan manifestiĝon interne kaj ekstere de Hispanio kiel faron de Rusio kaj ties agentoj, la komunistoj. Por la franka propagando ne estas aliaj malamikoj krom la komunistoj, malgraŭ tio ke ĉi–lastaj estas tie kalkuleblaj per nur la manfingroj; la anarkiistoj, kiuj reprezentas la grandan popolamason kaj estas unu-nure seriozaj malamikoj de la reĝimo, ĉiam kaj intence prezentiĝas de la franka propagando –kaj krom ĝi, alia ne ekzistas– kiel komunistoj. Tio gvidas al pli alta prestiĝo de la komunistoj meze de neinformitoj, kiuj malamas la frankreĝimon. Niaj hispanaj amikoj en Francio posedas sian radiostacion, kiun ili provis ekmunti. La franca registaro, penante esti en »bonnajbaraj« rilatoj kaj nome de la oficiala neŭtraleco malpermesis la radio-

disaŭdigojn. Samtempe Moskvo starigis specialajn radio–disaŭdigojn al Hispanio sub la nomo »Radio Pirenejka« (pirenea radio). Tiumaniere, Franko, Francujo kaj Moskvo sufokas la voĉon de la hispanaj anarkiistoj –kiuj nuraj povas diri la veron al la hispana popolo– kaj servas ĉiu laŭ propra maniero la venenan kaj mensogan bolŝevistan propagandon. Tiel agis ankaŭ MUSOLINI, kaj li mem nevole kunlaboris en la diskresko de la komunista partio en Italujo.

# Realigaj rimedoj kaj taktiko

## Bezono de socia rekonstruado

Kiaj estas la fruktoj de la nuntempa socia organizo, kiu konstruiĝas sur la principoj de egoismo, malegaleco, aŭtoritato, centralizado, povo, kredo je iu supera kaj supernatura ekzistaĵo, naciismo, militarismo, persona materiala intereso, leĝo, perforto, organizo, kies bazaj institucioj–kolonoj estas la ŝtato, eklezio, privata havaĵo, kaj la instrumentoj per kiuj la registaro sekurigas sian ekzistadon kaj defendon: la parlamento, tribunalo, mallibereĵo, polico, armeo, mono, imposto, sklavigitaj kaj adaptitaj al ĝiaj bezonoj lernejo, scienco, arto, gazetaro, radio, televido, ktp ?

La respondo estas jam klara por ĉiuj kaj estas superflue detale priskribi ĉiujn negativajn fenomenojn, kiuj karakterizas la interhomajn rilatojn ĉe la hodiaŭa sociaranĝo; sennombraj estas la amaraj fruktoj: reciproka kaj eterna malamikeco de l' homo kontraŭ la homo, de l' frato kontraŭ la frato, prirabo kaj ekspluatado de l’ homo fare de l’ homo, subpremo super la vastaj popoltavoloj, malŝparado kaj transformo en lukson kaj vantajn amuzaĵojn de la sociaj riĉaĵoj profite al apartaj malplimultoj de la malabundo, seneco, malsato kaj mizero por la prirabataj amasoj de la bonaj produktantoj, troservemo kaj senpersoniĝo paralele kun orgojla malestimo al homo, malamo, mortigoj kaj raboj, militoj kaj disiĝo inter la popo-

loj, hipokriteco, mensogoj kaj erarigoj, fizika elĉerpiĝo kaj morala degenero, krueleco, avido, envio, prostituado kaj alkoholismo, vendo de korpoj kaj konsciencoj, kronika senlaboreco kaj eterna necerteco pri la morgaŭa tago, sistema piedpremo sur la vivorajto fare de la influaj personoj –kapitalistoj kaj potenculoj, plej diversaj arbitroj kamuflitaj malantaŭ la leĝo–mantelo, malkontentoj kaj maljustaĵoj, kiuj kaŭzas intercivitanajn militojn kaj ribelojn ĉiam dronigitajn en sangon...

Tia, kia ĝi estas, la hodiaŭa socio ne povas paciĝi kun la denaska sento pri justeco en la homo. Ĝi devas esti ŝanĝita, rekonstruita – kaj tia ĝi estos!

Kiuj estas la rimedoj, kiuj povas efektivigi la socian rekonstruon laŭ la spirito de la jam elmetitaj principoj de anarkiisma komunismo; kiu estas la taktiko proponita kaj aplikota de la anarkiistoj por efektivigo de la socia ordo, kiu nura alportus eterne serĉatan kaj soifatan feliĉon kaj prosperon en paco, libereco, solidareco kaj justeco?

## Instruado, edukado kaj organizado

Ni ne estas solaj, kiuj parolas pri instruado kaj eduk–ado. Kaj malgraŭ ĉio ni esence diferencas de multaj, kiuj same kiel ni akceptas tion, ke ĉiu klopodo por plibonigo de la sociaj rilatoj kaj de la homvivo postulas instruitajn homojn. Sed la instruado kaj edukado estas iu kompleksa procezo, kiun oni ne povas pritrakti izolite kaj abstrakte de la ĉiutaga batalo, nek kiel nepre anticipa kondiĉo, kiel pretigado de ia granda festotago. Estas absurde pensi kaj atendi, ke la socia rekonstruo komenciĝos en fiksitaj tago kaj horo, kiam ĉiuj homoj vizitinte lerne-

jon estos entute pretaj, kaj de tiu momento leviĝos teatra kurteno por »la dua akto«. Tia koncepto pri instruado kaj edukado estas baze erara kaj iluzia. Estas same erare kredi je la magia potenco de instruado kaj edukado super la aparta individuo. TOLSTOJ kaj liaj disciploj povas atendi vane tutajn jarcentojn da reformo de la persono, kio, per la ekzemplo de la perfekteco de ili atingita, allogus ankaŭ la ceterajn siavice fariĝi kiel ili pretaj por la socia rekonstruo. Persono eĉ la plej instruita, la plej alte edukita, ĉirkaŭbarita de kontraŭsocia medio, en kiu ĝi estas –tute dronanta kvazaŭ en putra marĉo– tiu ĉi iluzie libera persono en sia senpoveco por supervenki la ĉirkaŭan medion, venki sin mem kaj la sennombrajn malsimplajn faktorojn –inter kiuj oni ne devas forgesi ankaŭ nevenkeblan heredon– plej ofte finas kun falsaj iluzioj, kun kronika hipokriteco. Estas dirende, malgraŭ nia simpatio al la homoj de persona fortostreĉo por perfektiĝo kaj al la metodo de paca reformo de la mondo, ke plej ofte plej granda nombro de la hipokrituloj troviĝas en iliaj medioj. Tiu ĉi vojo ne diferenciĝas de la vojo de la religioj, kiuj anstataŭigas la veran edukadon per la prediko, kaj la prediko estas senpova por radikale ŝanĝi ne nur la mondon, sed ankaŭ la unuopajn individuojn.

La problemon pri instruado kaj edukado oni devas pritrakti en scienca, socia, materiisma lumo, ĉar gi povas ricevi sian plenan solvon, nur harmoniante kun la kondiĉoj kaj la batalo por ŝanĝo de la socia medio mem. La problemo estas kompleksa kaj ni ne iluzias nin pri facila solvo ĝia. Por ŝanĝi la socian medion estas bezonataj instruitaj kaj edukitaj homoj. Sed por krei vere instrui-

tajn kaj edukitajn t.e. novajn liberajn homojn, estas bezonata nova socia medio. Kompleksa interdependeco, erarocirklo. Kiu atendas sinreformon per instruado kaj edukado, tiu vivas kun vanaj iluzioj. Kiu kalkulas ekskluzive kun la socia medio por reformi la homon, tiu volas konstrui sur la sablo kaj per putra materialo. La reedukado de l' homo estas daŭriganta procezo, kaj ĝi neniam estas definitive finita; *ĝi realiĝos en la lukto kaj per fortostreĉado cele al transformado de la mondo*. La estonta socio ne estos faro de superhomoj kaj anĝeloj, sed de ordinaraj homoj kun malperfektaĵoj kaj difektoj, sed penetritaj de la deziro perfektiĝi, kaj laborantaj samtempe por sia edukado kaj instruado, por tiuj de aliaj homoj kaj por socia rekonstruo.

Sur tiu vojo, per tiuj klopodoj, ĉiuj instru– kaj edukrimedoj estos utilaj. La nuna lernejo kaj ĉiuj kultur–instruaj institucioj de la nuntempa socio, malgraŭ ĉiuj siaj difektoj, malgraŭ uzado ilia kiel instrumentoj de la povo, same plenumos sian rolon. Sed la ĉefa rolo falos sur la proprajn organizadojn, kiujn la batalantoj por socia rekonstruo kreas kaj kreos.

Por ni *la problemo, pri instruado kaj edukado estas nedisigeble ligita kun la problemo pri organizado*. Kaj la organizado ne estas nur instru– kaj edukrimedo, sed ankaŭ batalinstrumento. Tiu batalo estas antaŭ ĉio ideologia, kaj post tio, ankaŭ ekonomia kaj socia. *Sen organizaĵo nenia batalo, nenia aktiveco, neniaj atingaĵoj, sur kia ajn tereno –instrua, ekonomia, politika, socia aŭ idea– estas penseblaj.*

La unua organizado, de kiu dependas ĉia alia aktiveco de la anarkiisto, estas organizado unuiganta la fortojn

de la anarkiistoj surbaze de iliaj komunaj ideoj. *La ideala anarkiisma organizaĵo* estas konstruita federacio: lokaj grupoj kaj organizaĵoj, distriktaj, regionaj kaj provincaj asocioj kaj ĝenerala federo laŭ landa skalo, unuigita kun aliaj federoj laŭ la naciecoj, kaj internacia anarkiisma federacio.

Dua kategorio: organizaĵo tute sendependa de la unua kaj aŭtonoma estas la *laborista, laŭ profesio aŭ produktado*, en kiu la anarkiistoj membriĝas pro sia kvalito de laboristoj kune kun la aliaj laboristoj konsciantaj la bezonon de organizita batalo sur la ekonomia tereno por plibonigi la laborkondiĉojn kaj transformi la nuntempan ekonomion.

Tria kategorio: *organizaĵo de la malriĉaj kamparanoj kaj etagrikulturistoj unuigitaj sur profesia tereno* simile al la laborista sindikata organizaĵo, en kiu la anarkiistoj-agrikulturistoj same membriĝas.

Kvara kategorio: organizaĵo de la *plej diversaj kooperativoj*.

Kvina: la *kulturdomoj* kaj la *diversaj kultur-instruaj, virinaj, junularaj ktp ktp*; ĉiu speciala aktiveco postulas respondan organizaĵon. Ĉiuj estas sendependaj unu de la aliaj, kaj ĉiu el ili strebas al unu komuna celo: liberiĝo plena kaj ĉiuflanka per la batalo, per instruado kaj edukado en la batalo, edukado en spirito libereca, solidareca kaj justeca.

## Rekta agado: bojkoto, sabotado, striko kaj ĝenerala striko

Instruado kaj edukado ne estas mem celo el la vidpunk-

to, kiun ni tie ĉi elmetas. Ili estas nur rimedoj por vekiĝo kaj formado de la konscio cele al lukto por plenumo de la socia rekonstruo. La organizaĵo donas pli grandan efikecon al la instrua kaj eduka agado en la indikata direkto. Ĝi ankaŭ ne estas mem celo, sed iras pli malproksimen ol la instruado kaj edukado, prenante karakteron de nepre necesa kondiĉo por la batalo. Sen organizaĵo nenia batalo estas pensebla, kaj sen batalo neniaj akiraĵoj, neniaj atingoj estas eblaj. Sed ne ĉiu batalo estas efika el la vidpunkto de la esencaj konkeroj en direkto al radikala rekonstruo de la socia vivo.

La taktiko kaj la lukto de la anarkiistoj havas kiel bazon la *rektan agadon*. Ĉi-lasta estas io pli ol batalrimedo; ĝi estas metodo de la *procedo kaj de la rilato al la aliaj homoj*, malamikoj kaj amikoj, kaj al la vivoproblemoj kaj ties solvo. Tiu metodo baziĝas sur la saĝeco de la jarcentoj, kiu instruas, ke la *homoj devas mem aranĝi siajn reciprokajn rilatojn*, por kontentigi siajn bezonojn kaj rekte defendi siajn interesojn per propraj fortoj, sen perantoj.

La moto de la Unua Internacio: »*Liberiĝo de la laboristoj estu ties propra faro*« esprimas ĉi tiun saĝecon, kaj estas tipe anarkiisma, kiel estas tipe anarkiisma la simpla popolproverbo: »*Al lupo la kolo estas dika, ĉar ĝi faras mem sian laboron*«. La vera akiraĵo estas nur tio, kio estas konkerita per propraj fortoj, ĉar nur kiam donita afero estas frukto de propra klopodo, ĝi valoras, kaj nur tiam post ĝi staras la konscio pri ĝia necesa defendo.

La plej simpla kaj kompare plej facile plenumebla formo de rekta agado, kiu sekvigas la plej malgravajn konsekvencojn, kaj kiu postulas la plej malmultajn riskojn ĉe

sia apliko, estas *bojkoto*. Ĉi–lasta povas havi ekonomian, politikan aŭ moralan karakteron, kaj efektiviĝi ĉe la plej diversaj okazoj kaj laŭ diversaj manieroj, sed ĉiuokaze ĝi konsistas en iu *ago* –spontanea aŭ organizita, persona aŭ kolektiva– de rifuzo, de sindeteno, de nepartopreno. Sur la politika tereno la bojkoton oni praktikas plej ofte rilate al donitaj balotoj aŭ ĝenerale al balota sistemo, al iuj administraj kaj leĝdonaj rimedoj registaraj, al impostoj kiujn oni konsideras ekstreme arbitraj kaj maljustaj, aŭ ĝenerale al la imposta sistemo mem, ktp. Sur ekonomia tereno ĝin oni povas praktiki kontraŭ plialtiĝo de la transportaj tarifoj, kontraŭ plialtigitaj prezoj, kontraŭ definitaj varoj, kontraŭ iuj entreprenoj okaze de malaltigitaj salajroj aŭ produktado de por la socio malutilaj produktoj aŭ destinitaj al militceloj, ktp. Moralan karakteron la bojkoto havas, kiam ĝi estas ago de solidareco al strikantaj laboristoj, al revoluciaj bataloj, al persekutataj juĝatoj aŭ jam kondamnitoj ktp. La aplikkampo de la bojkoto estas senlima. Ĉiuj rememoras ekzemple la bojkoton je unu el la bolŝevistaj balotoj en Bulgario, kiel ankaŭ tiun de la barcelonaj civitanoj, kiuj alfrontis unuanime la pliiĝon de la tramtaksoj kaj rifuzis entramiĝi, ĝis tiu pliiĝo estis aboliciita. La bojkoto kiel rekta batalrimedo estas tre efika kaj bonrezulta en ĉiuj kampoj de sociala agadoj; sed kiom ĝi estas facila, kiel ni diris, tiusence ke ĝi alportas plej malmulte da riskoj por tiuj, kiuj ĝin praktikas, tiom malfacila ĝi ankaŭ estas, ĉar ĝi postulas altan civitanan konscion kaj longan sperton, kiu jam donis al ĝi karakteron de »*tradicio*«. Sed laŭ sia enhavo, kiel ago de persona kaj socia konscio, la bojkoto estas esence revolucia rimedo, respondanta plej logike al la anarkiisma ideologio, malgraŭ tio

ke ĝin praktikas ankaŭ homoj kun aliaj socipolitikaj konceptoj.

*Sabotado* estas dua rimedo de rekta agado, kiu same povas esti spontanea aŭ organizita, persona aŭ kolektiva ago kiel bojkoto. Ĝi ne estis inventita de la anarkiistoj, sed ĝi ricevis sian argumentadon kaj, se tiel diri, konsekradon de la anarkiistoj, por fariĝi poste nedisigebla parto de ilia revolucia taktiko. Ĝi estis antaŭe praktikata en Anglujo dum la pasinta jarcento. Poste, apenaŭ ĉe la fino de la sama jarcento, ĝi estis oficiale akceptita kaj argumentita de la francaj anarki–sindikatistoj, laŭ propono de Emilo POUGET. Ankaŭ ĝia nomo mem estas franca. Ĝi originas el la naciaj francaj maldelikataj lignoŝuoj, nomitaj »*sabot*« (sabo'), kaj la senco, kiun oni enmetis en la vorton »*sabotado*«, klarigas ĝian esencon mem: oni laboras fuŝe kiel, per piedoj, kiel per la maldelikata lignoŝuo, t.e.: *por malbona pago –fuŝa laboro.*

La formoj kaj aplikmetodoj de la sabotado estas plej diversaj, komenciĝante per malrapida kaj malbonkvalita laboro, kaj finiĝante per fordifektado de la maŝinoj, instalaĵoj kaj iloj, por ĉesigi la tutan produktadan entreprenon aŭ la tutan socian servon. En la ordinara lingvaĵo la nocio pri sabotado ricevis ankaŭ konatan malŝatan sencon, kiu havas nenion komunan kun la komprenoj de tiuj, kiuj ĝin rekomendas kaj praktikas, nek kun la moralo, kiu motivas la sabotadon kiel formon de rekta agado de la laborista klaso en defendo de siaj interesoj. Tial, la francaj sindikatistoj kaj ĉefe Emilo POUGET, kiun oni povas konsideri kiel patron de la sabotbatalo, ĉiam emfazis kaj substrekis ĝian *altan moralan enhavon*, ĉiuokaze klarigante, ke *sabotado celas damaĝi al la mastroj, ka-*

*pitalistoj, registara administracio, sed neniaokaze la civitanojn, konsumantojn*. Ĝia rekta tasko estas devigi la kontraŭulon cedi, kontentigi la prezentitajn postulojn, ĉesigi kaj abolicii efektivigon de akceptitaj aŭ antaŭviditaj rimedoj direktitaj kontraŭ la interesoj de la laboruloj aŭ de ĉiuj civitanoj. Ĝia efikeco estas multfoje pruvita ankaŭ hodiaŭ; sen troigo oni povas diri, ke en Francujo, ekzemple, multaj el la socialaj akiraĵoj, kiujn ĝuas nun la laboristoj, estas frukto de la sabottaktiko iam efektivigita energie de la francaj revoluciaj sindikatistoj –iliaj patroj kaj pli aĝaj fratoj.

Sur tria loko la rekta agado sin manifestas per *striko*, kiu multokaze sencigas kaj sintezas la bojkoton kaj sabotadon, laŭ tio, ĉu ili havas nur partan aŭ spontanean karakteron. Hodiaŭ multaj akceptas kaj praktikas la strikon kiel batalrimedon. Sed se oni ĵetos supraĵan rigardon super la historion de la laboristaj bataloj, oni vidos ke, malgraŭ tio, ke ankaŭ ĝi ne estas inventado de la anarkiistoj, al ĉi–lastaj la striko ŝuldas sian amasan efektiviĝon kaj akcepton. Kaj nenio miriga en tio, ĉar *la striko plej strikte kaj plej plene respondas al la bazaj principoj de la anarkiisma konceptaro*.

La samon –kaj per eĉ pli granda pravo– oni povas diri pri *ĝenerala* striko, ĉar la historia dokumentaro estas tre riĉa en tiu sfero. La marksistoj, kiuj hodiaŭ ĝin praktikas plej ofte karikature, iam ĝin priridis, kiam la anarkiistoj arde ĝin rekomendis al la naciaj kaj internaciaj laboristaj konferencoj kaj kongresoj. Eĉ se ni estus postulemaj, pli atentaj en la okazoj de ĝia apliko en nia epoko, ni vidus, ke nur la anarkiistoj, kiam ili ĝin praktikas, donas al ĝi veran karakteron de efektiva efikeco. Ne estas pli po-

tenca rimedo ol la striko, kiam ĝi alprenas ĝeneralan kaj revolucian karakteron. Hispanujo, lando de la strikoj kaj anarkiismaj tradicioj en la laboristaro, donas brilajn ekzemplojn de lukto baze ekskuinta la tutan ekonomian kaj socian vivon, kie la strikaj movadoj en iuj produktadoj kaj entreprenoj daŭris monatojn kaj jarojn, kaj eĉ finfine finiĝis kun venko.

Sed la striko kaj speciale la ĝenerala striko ne estas rimedo por amuzaĵo nek por politikaj ludoj utile al la kombinaĵoj diktataj de la interesoj de la partiaj centraloj. Ni estas atestantoj de multe da partaj strikoj entreprenitaj disŝirite kaj kvazaŭ intence ne samtempe, finiĝantaj kun malvenkoj, kiuj estas tre malutilaj por la laborista klaso pro siaj konsekvencoj. Kiam la hispanaj anarki–sindikatistoj decidiĝis je striko kaj speciale je ĝenerala striko, ili ĉiam sciis, kiel granda estas la respondeco, kiun ili akceptas, kaj same sciis, ke ĉiu simila konflikto povas konduki al ekskuoj kaj komplikaĵoj, por kiuj ili devas esti pretaj. La hispana anarkiisto rigardas al ĝenerala striko, kiel al komenco de revolucio, kaj antaŭzorgas pri eventualaj komplikaĵoj. Tiel estis iam ankaŭ, en Argentino, kie F.O.R.A. efektivigis en larĝa skalo la saman taktikon. Postsigno de simila sinteno al la striko kaj ĝenerala striko estas nek en la intence aranĝitaj kiel festamuzaĵoj strikoj de la bolŝevistoj, plej ofte kun intenco subteni iujn irmanierojn de la partio aŭ la politikajn kombinojn de SSSR, senkonsidere al la efikado sur la laboristan klason en donita lando, nek en la irado de la pluaj bataloj de la laboristaro ofte tro lacigita pro sensukcesaj kaj malbone efektivigitaj strikaj movadoj.

Kaj kio miriga povas esti en tiuj faktoj? La marksistoj ne-

niam tutkore servis la interesojn de la laborista klaso, nek serioze konsideris la rimedojn de la rekta batalo. Ĉiu batalrimedo respondas al determinita ideologio. *La striko estas tipa anarkiisma luktorimedo*. Al la marksistoj kaj politikistoj tiu rimedo ne konvenas, ilia logika luktovojo estas parlamentismo. Ĉia instrumento postulas sian majstron. La striko ne estas por diletantoj, kiel estas ĉiuj politikistoj atendantaj remburitajn fotelojn en la parlamento, ĉar ĝi ofte kondukas al barikadoj kaj rezulte al malliberejaj ĉeloj. La pafmortigo, ekzemple, de Francisko FERRER en Hispanujo estis tiom pro »La Moderna Lernejo«, kiom pro la teruraj strikaj movadoj en la komenco de tiu ĉi jarcento, pri kiuj oni konsideris lin intelekta instiganto. Tiutempe la marksistoj moke nomis la ĝeneralan strikon »*ĝenerala stultaĵo*«, memkontentaj pri sia »*spriteco*«. Ekde tiam forfluis multe da akvo kaj la faktoj estas iom forgesitaj.

## Protesto, ribelo, insurekcio, revolucio kaj socia revolucio.

Bojkoto, sabotado, striko kaj ĝenerala striko, malgraŭ tio ke kiel formoj de rekta agado ili trovas aplikon –unu pli, alia malpli– sur ĉiuj terenoj de la sociala batalo, tamen restas batalrimedoj tipe ekonomiaj. Ilia sukcesa apliko en la fino de la pasinta kaj en la komenco de la nuna jarcento estigis certan troan logiĝon en la sindikatajn kaj anarki–sindikatajn mediojn, fenomeno cetere ne malofta en la socialaj luktoj, kie la pasioj kaj sentoj iafoje superas, kaj kie la serĉado de novaj vojoj kaj formoj estas procezo ĝis nun ne finita. Tiel oni venis al troa ŝveligo de la ekonomigraveco en la homsocio, kaj al malgravigo de la sociala batalo ĝis pure ekonomia fenomeno.

Tiel la rimedojn de la ekonomia batalo oni prezentis preskaŭ kiel unikajn kaj sendubajn en la provado de la laboruloj por socia rekonstruo. Io pli, iuj tiom ilin idealigis, ke kreiĝis ĉe multaj supraĵa ideo pri tiu kompleksa kaj malfacila procezo, kiun oni nomas radikala socia reorganizado, reduktante ĝin al la aŭtomatismo de fatala socia disvolviĝo, kaj al ĝi aldonante la optimisman ornamon de granda festotago. La ĝenerala striko, ekzemple, laŭ efikeco kaj ĉioncirkaŭpreneco, akiris en la konscio de tiuj homoj tian potencon, ke laŭ ties kredo la hodiaŭa putra socio en la procezo de ĝenerala striko devus ĉesi kiel horloĝo kies risorto estas deŝirita, kaj la nova socio devus naskiĝi preskaŭ aŭtomate. La produktado estas paralizita, la tuta trafiko haltigita, la interŝanĝo ne plu estas ebla, la kapitalistoj kaj aŭtoritatuloj estas tiom senpovaj, ke eĉ ilia armila defendo fariĝas senefika. La revolucio mem estas preskaŭ paca fenomeno; tiom granda estas la potenco de la ekonomia agado, ke la malamiko estas neniigita preskaŭ sen nececo fusilon ekkrakigi. Restas al la laboristoj nur preni en siaj manoj la tutan ekonomian aparaton, kaj poste ĉiujn aliajn sociajn funkciojn, ĉar la tuta vivo dependes de la ekonomifunkciado.

Kaj la vero estas, ke kiom ajn supera estas la graveco de la ekonomiaj fenomenoj –kaj ĝi kreskos certe ankoraŭ en la estonteco– *la socia vivo*, la vivo de l' homo, *restas malsimpla komplekso el plej diversaj manifestiĝoj kondiĉitaj de multego da plej diversaj faktoroj*. La homo estas nek nur ekonomia, nek nur –kaj eĉ pli malmulte– politika besto. De tio venas, ke la rilatoj inter la homoj vivantaj en socio alprenas *multaspekton, kiu sin*

*esprimas en determinita politika, ekonomia kaj socia strukturo*, objektiva en ties tuteco, sed ne en ties apartaj formoj de manifestiĝo, ĉe ĉiuflanka agado de tiuj, kiuj celas –aŭ estas al tio alvokitaj ĝis alta grado pro sia socia situacio– profundan transformon kaj konstruon de nova strukturo, kiu ankaŭ pro la multaspekto de la homa naturo kaj ties bezonoj, ne estos senescepte ekonomia.

Cetere, la tuta homhistorio estas malantaŭ ni; ni sciu nur vidi kaj analizi ĝin, por ke ni konvinkiĝu pri tiuj simplaj veroj. Ĝi ne estas frukto de nur ekonomiaj konflik–toj, nek plenigita nur per tipe ekonomiaj formoj de batalo. Bojkoto, sabotado, striko kaj ĝenerala striko neniam estis la unikaj luktoformoj. Paralele kun ili multe pli ofte kaj pli grave manifestiĝas *la protesto, ribelo, insurekcio, revolucio* koncernantaj nur apartajn sektorojn de la socia vivo, en multe da okazoj eĉ ekster la sfero de la ekonomio, kaj kelkfoje, aperintaj kiel ekonomiaj konfliktoj, ili plivastiĝas kaj ĉirkaŭprenas la tutan socian organismon.

*La protesto* povas esti eĉ izole–individua, sen pro tio malpliigi sian valoron, kiam ĝi volas veki la komunan konscion. Ĝi povas ankaŭ esti pure morala ago, kiel tiu de iu KROPOTKIN, de iu BAKUNIN, de iu TOLSTOJ, kiuj interrompas la rilatojn kun sia socia medio, kaj per tio kontribuas multe pli al ekskuo de la fostoj de la tuta socio, ol per striko por plialtigo de la salajroj je kvin centimoj, kiujn la postan tagon oni elĵetas al la konsumanto; kaj pro manko de sufiĉa konscio de ĉi–lasta kaj pro iu bone organizita propagando de la mastroj, tiuj centimoj povos kontraŭstarigi la konsumanton kontraŭ la laboristo. Tiu sama rimarko validas, kaj kompreneble multe pli,

pri kolektiva kaj bone efektivigita protesto kaj ribelo, pri la popola insurekcio kaj pri la revolucio.

Oni devas tamen tuj rimarkigi, ke tiuj batalrimedoj ne estas por la anarkiisma taktiko tiel tipaj kiel formoj de rekta agado, kiel estas la rimedoj uzataj sur la ekonomia tereno kaj precipe la striko kaj la ĝenerala striko. Per tio ni volas diri, ke, kvankam la protesto, ribelo, insurekcio kaj revolucio estas formoj de rekta agado, ilin povas uzi ankaŭ aliaj socipolitikaj movadoj, kiuj principe ne estas por la taktiko de rekta agado. Tio ĉi kompreneble ne forviŝas la diferencon inter la anarkiistoj kaj ĉi–lastaj en iliaj sintenoj al tiuj batalrimedoj, en la maniero ilin apliki, en la celoj trafendaj kaj en la morala enhavo al ili donita.

La protesto povas alpreni krom la formo de morala individua ago, tiun de organizita kolektiva ago: *publika mi–tingo, stratmanifestacio*, sen ĉiam iri nenecese ĝis kolizio kontraŭ la »fortoj de la ordo«, sed male sin esprimanta plej ofte en paca manifestiĝo de indigno aŭ de solidareco, kiu ne transiras la limojn kaj gravecon de morala ago tra kolektiva esprimo. La protesto en sia plej ekstrema formo kondukas ekzemple al la rifuzo militservi kaj al la rifuzo plenumi iujn agojn, tiel alproksimiĝanta al ribelo.

*La ribelo* en sia ĝusta senco *estas protesto, kiu jam agas armile*. Ĝi povas esti individua kaj kolektiva, sed en sia pli ĝusta senco, la ribelo estas ĉefe kolektiva ago. Tiel estas la kontraŭstaro al milita agado, la haltigo de trafikrimedoj kiuj transportas militistaron, la kontraŭstaro al politika puĉo. Sed en ĉiuj okazoj ĝi aperas organizita de revolucia malplimulto.

Kiam la ribelo alprenas larĝajn dimensiojn, ĉirkaŭprenas pli grandan teritorion kaj allogas popolamasojn ekster la organizita malplimulto, t.e. kiam la ribelo transformiĝas en amasan popolagon, ĝi jam estas *insurekcio*. La insurekcio povas fariĝi ĝenerala ĉirkaŭprenante la tutan teritorion de iu lando, kaj tiam ĝi estas *revolucio*. La revolucio povas havi nur karakteron de komuna kaj tutpopola ekstariĝo, per nacia liberiĝo ekzemple, sen iaj ajn socialaj celoj, povas havi pure politikan karakteron kun malmulte da miksaĵo de sociaj elementoj; povas ankaŭ havi socian karakteron sen klare fiksitaj celoj al profunda transformado de la ekonomio. Ĝi povas tamen cirkaŭpreni ĉiujn socitavolojn kaj esti direktata al *radikala transformado de ĉiuj institucioj –politikaj, ekonomiaj, juraj, spirit-religiaj– kaj tuŝi profunde la sociajn kaj moralajn rilatojn inter la homoj, samkiel ties konceptojn mem. Tiam ĝi estas la socia revolucio. Ĝi aktivigas ĉiujn rimedojn de la rekta batalo, komencante per la bojkoto, sabotado, striko, ĝenerala striko kaj, kun uzado de la armiloj, kun la ribelo, la insurekcio kaj ĝenerala insurekcio, finante per neniigo de la tuta malnova socia strukturo, per senpropriĝo de ĉiaj rimedoj por produktado, interŝanĝo kaj konsumado, per forigo de la ŝtato kaj ĉiuj perfortaj kaj parazitaj instrumentoj kaj organoj*.

Por ni la socia revolucio estas nek simpla nek facila faro. Ĝi postulas preparon kaj maturiĝon, kiuj ne povas esti frukto de izolaj kaj mallongdaŭraj klopodoj, nek tasko por realiĝo de nura organizaĵo, partio aŭ movado. Ĝi ankaŭ ne povas esti okazaĵo, kiun oni efektivigas en fiksitaj tago kaj horo, laŭ ordeno de determinita centro. La Pariza Komuno havis multajn elementojn de socia revo-

lucio, sed la necesaj kondiĉoj, por ke ĝi fariĝu vera socia revolucio, restis for de realiĝo. La Rusa Revolucio enhavis ankoraŭ pli determinitajn elementojn de socia revolucio, sed la interveno de partia diktaturo sufokis la popolan iniciaton, kaj la revolucio abortis sub la batoj de la bolŝevista policreĝimo. La hispana revolucio iradis ankoraŭ pli malproksimen en la enprofundiĝon de sia socia karaktero kaj en la senprokrastan konstruon de nova sociekonomia strukturo, sed ĝi eksplodis en multe da specifaj kondiĉoj, kiel kontraŭbato de faŝisma komploto akompanata de fremda interveno minacanta la *nacian sendependecon mem* de la lando; en kompleksa implikaĵo de multnombraj kaj diversaj internaciaj interesoj, ĝi alprenis en iu senco karakteron de komuna nacia ago, ĉe kiu *homoj el diversaj klasoj kaj sociaj tavoloj kun radikale kontraŭecaj sociekonomiaj kaj politikaj interesoj sin trovis pro la cirkonstancoj sur unu batalfronto kontraŭ unu komuna kontraŭulo*. Tio ĉi ĝuste estas unu el la kaŭzoj, kiuj ne favoris pli decidan baton al la ŝtata maŝino, cirkonstanco kiu paralele kun la tuta kompleksec o de aliaj faktoroj malhelpis la findisvolvon de la profunda socia transformado definitive haltigita de la etendado super la tuta lando de la diktaturo de FRANKO.

Restas ankoraŭ du flankoj de la problemo pri la revolucia socirekonstruo, por ke ni finu pri tiu demando. La unua estas tiu de *ĝia perforta karaktero* kaj la alia de *ĝia efikeco* aŭ *senefikeco* kompare kun tiu de la reformismo. Multaj, sentemaj al ĉia perforto aŭ dezirantaj montriĝi tiaj, deklaras sin kontraŭ la revolucia bataltaktiko, baziĝante sur moralaj argumentoj. Ni ne volas tie ĉi disputi kun ili. Unue ni volas nur rimarkigi, ke estas

erare koncepti la revolucion kiel nepre sangan banon, aŭ rigardi la uzon de armilo en la revolucio kiel ekskluzivan kaj determinantan signon. La revolucio povas esti multsangversa sen esti *revolucio laŭ sia enhavo*. Male, ĝi povas esti akompanata de multaj sensignifaj manifestiĝoj de perforto (ni ne permesas al ni aserti, ke revolucio povas esti entute senigita je perfortaj manifestiĝoj, tio ĉi estas neebla) kaj tamen esti vera socia revolucio. *La plej karakteriza signo de la revolucia agado estas la popola iniciato, kiu vekiĝas dum la revoluciaj periodoj kaj la unika faktoro, kun kiu la anarkiistoj kalkulas por radikala socirekonstruo. Kaj la plej karakteriza signo de la socia revolucio estas radikala forigo de la malnovaj institucioj, kaj konstruado de nova socistrukturo kun la amasa kaj konstanta partopreno de ĉiuj kreantoj de valoraĵoj kaj de ĉiuj batalantoj por ĉies libero, bonŝtato kaj justeco.*

Koncerne ĝian efikecon, ni devas konfesi, ke ni hodiaŭ vivas en dekadenca epoko, en kiu la reformismo grave superas la revolucian agadon; kaj multaj estas tiuj, kiuj provas subtaksi la veran gravecon de la revoluciaj bataloj antaŭaj al la hodiaŭa epoko, kaj ili ŝajnigas kvazaŭ ili forgesus, ke multo ŝajne realigita de la parlamentoj kaj per reformisma aktiveco de la politikistoj, reale estas frukto aŭ konsekvenco de la revolucio, kiu, malgraŭ tio ke ĝi estis multfoje sufokata, ne ĉesas esti danĝero per sia profunda kaj obtuza tondro. Oni ofte parolas pri la atingitaj rezultoj, pri la sociala progreso en iuj landoj, kaj oni eksplikas tion per la efikeco de la reformismoj sed oni forgesas, ke, en la hodiaŭa mondo estas eĉ ne unu lando, kiu vivas izole kaj flankenlasite de la komuna

koncerto, kaj ke plej ofte la verŝita sango de la viktimoj de la revolucio en donita lando alportas siajn fruktojn en aliaj landoj, kaj la laboruloj en ĉi tiuj landoj senpage ricevas ĝis certa grado kion aliaj por ili permilitis, sen tio ke ĉi tiuj povu gustumi la fruktojn de sia batalo.

Multrilate la iamaj socialistoj trompiĝis en siaj antaŭvidoj. La kapitalisma socio montriĝis ne tiel proksima al sia morto; ĉar la kapitalismo lernis alkonformiĝi. Sed ne trompiĝis la unuaj socialistoj en tio, ke *kapitalismo ne povas malaperi per preĝo kaj prediko*; kiom ajn ĝi alkonformiĝis kaj cedis por saviĝi, ĝia lasta »cedo« estos ... ĝia morto, kaj ĝi estos –ne povas alimaniere esti– nure faro de perforta agado. La anarkiistoj–revoluciuloj ne timas alpreni la moralan respondecon de »*murdistoj*«. Kiuj preferas la lavitajn manojn de PILATO, tiuj per fajna vualita konscienco de JUDASO konservu por si la moralon de la parfumita filistro.

# Konstruiva anarkiista programo

## La konstruanta spirito kaj la fundamentaj celoj de socia rekonstruo

»Vi volas tutege ĉion detrui. En viaj skribaĵoj vi ne lasis ›ŝtonon sur ŝtono‹, vi ĉion detruis. Estas facile detrui, sed malfacile konstrui. Kion vi metos surloke de ruinoj? Kion vi metos anstataŭe de la diversaj institucioj de la nuna socio? Ĉar vi mem diras, ke la homo ne povas vivi sen socio, ekster la socio. La nuna socia vivo estas tiel malsimpla. La homoj bezonas nutraĵon, vestaĵojn, lernejojn, hospitalojn, teatrojn, ktp. La homaj bezonoj estas tiom multnombraj, senĉese kreskantaj kaj rafiniĝantaj. La sociaj rilatoj fariĝas pli kaj pli interplektitaj kaj mult–formaj. Ĉu vi opinias, ke estas tiel facile kontentigi ĉiujn tiujn bezonojn kaj aranĝi tiel malsimplajn rilatojn sen ŝtato, sen potenco, sen impostoj, sen tribunaloj, sen polico ktp? Estos necese produkti pli kaj pli kaj produkti la plej diversajn havaĵojn, interdividi kaj konservi ilin, ktp. Via libereca komunismo, spite vian proteston, kiam viaj malamikoj nomas ĝin malordo kaj ĥaoso, fakte finvenos al tio, kion ni kutimas difini per la vorto ›anarkio‹«.

Tiaj estas, kelkvorte, la kritikoj de ĉiuj, kiuj legas niajn skribaĵojn sen akcepti niajn konceptojn, sen sufiĉe koni ilin. Tiu konstato entenas pravigeblajn elementojn; ni

devas serioze, funde esplore respondi kaj laŭmezure de la disponebla loko, sufiĉe detale.

Komence, ni rimarkigas, kiel ajn prava estas la koncepto, ke la detruo ne sufiĉas, ke la konstruo devas akompani kaj postsekvi ĝin, ke ne estas tute vere, ke detruo estas tiel facila. Precipe, kiam temas ĉefe pri detruo de konceptoj, antaŭjuĝoj estigitaj de antaŭ jarcentoj, de institucioj konfirmitaj per jarcentaj tradicioj, kredoj kaj superstiĉoj, kutimoj kaj rutinoj bone defenditaj per potenca sistemo disponanta mensogajn, trompegajn, perfortajn rimedojn. Sekve, detruo ne estas malpli malfacila ol konstruo. Kaj se ni estas devigitaj komence detrui same en la rekta senco kiel en la abstrakta kaj filozofia senco de tiu vorto, estas, ĉar la konstruo, pri kiu temas ĉi tie, ne estas ebla sen antaŭe detrui la nunan socian sistemon.

Mi devus poste rimarkigi, ke estas tute arbitre kaj erare atribui al ni la detruemon kiel esceptaĵon tipan de nia doktrina spirito kaj de la celo de nia aktiveco. Tiurilate estas profunda detruenda eraro, kiu lokiĝas en la cerboj, eĉ en tiuj de kelkaj anarkiistoj ne sufiĉe konantaj la konceptojn. Estas bela esprimo de BAKUNIN, larĝe disvastigita kaj konata, kiu eĉ poezie eĥas : »La spirito de detruo estas samtempe konstruema spirito.« Sed tiu frazo ne tuŝas la anarkiisman spiriton, precipe en ĝia misformita koncepto kaj tendenca interpretado. Oni ne scias kaj oni tro forgesas gravan detalon, nome: tiu frazo estas la konkluda penso de grava artikolo germane verkita de BAKUNIN en 1844, kiam li ankoraŭ ne estis anarkiisto. Kvankam BAKUNIN daŭre tenis en siaj pensoj kaj agadoj la fundamentajn signojn de libereca spirito, li

fariĝis anarkiisto nur post la pola ribelo en 1863 kaj post longa revolucia sperto kaj martireca vivo survoje al nova mondo libera, solidareca kaj justeca. Sed koncerne tiun detru–koncepton tiel formulitan, ekzistas alia senco tute malsama ol tiu vulgare atribuita. Temas tie pri kuraĝo, kritiko–kuraĝo kaj ne pri simpla neo. BAKUNIN volis diri –kaj plurfoje li esprimis la saman ideon– ke tiu, kiu ne estas preta refuti ĉion, kio maljuniĝas, kiu ne kuraĝas sin deklari kontraŭ la malnovaj formoj, detrui ĉion, kio estas postiĝinta, putra kaj ŝima, ankaŭ ne kapablas konstrui. Kaj se hodiaŭ ni dezirus parafrazi BAKUNIN–on, provante pli precize esprimi la anarkiajn psikologion kaj ideologion, ni povus diri: »*La konstruema spirito estas samtempe detruo–spirito*«.

Tio ne estas arbitra kaj antaŭjuĝa aserto. Sufiĉas studi la vivon kaj aktivecon de la plej rimarkeblaj anarkiismaj teoriistoj kaj propagandistoj sur la internacia plano kaj penetri en la animon de ĉiu anarkiista aktivulo, eĉ de la lasta kaj plej modesta reprezentanto de tiuj ideologio kaj psikologio, por vidi kiom riĉaj estas la konstru–impetoj, kiuj eliĝas el ĉiu penso, ĉiu gesto, ĉiu motivo kaj de ĉiu laboro de anarkiisto. Neniu alia doktrino, neniu movado naskis tiom riĉan aron da gigantaj kreintoj, inicintoj kaj realigintoj de kreantaj kaj pozitivaj verkoj. BAKUNIN –enkarniĝo de la ribelo– komencas sian anarkian aktivecon ellaborante funde esploritan programon pri socia rekonstruo. KROPOTKIN estis malofta scienculo pro siaj universalaj konoj kaj grava realiganto. La homara historio entenas malmulte da homoj kiel Eliseo RECLUS, kiu per siaj propraj klopodoj kaj rimedoj, fondis universitatojn kiel la Liberan Universitaton en Belgio –kiu fariĝis

centro kaj vojkruciĝo de la plej gravaj tutmondaj scienculoj survoje al Bruselo por instrui. »La Moderna Lernejo« de Francisko FERRER, en Hispanujo –por kiu li endanĝerigis sian vivon–, kreis historion en la fako de racia edukado. »La abelujo« de Sebastiano FAURE, alia modelo–lernejo pri libera edukado, kiu funkciis 14 jarojn kaj kiun detruis la unua mondmilito, estas ankoraŭ alia ekzemplo de pozitiva konstruo. La lernejo de Paŭlo ROBIN en Saint–Puy, kie estis praktike ellaboritaj la metodoj pri libera edukado, estis deirpunkto de internacia movado cele al pliboniĝo de la nuna lernejo. La bulgaro Varban KILIFARSKI revis krei ankaŭ similan lernejon kaj li jam konstruis la domon en sia farmo, apud Razgrad, kiam eksplodis la unua mondmilito, kiu malpermesis ĝian realigadon. Kaj kiun anarkiiston ne ravis la ideo krei komunumojn por konkretigi sian idealon? Ni ne diras, ke estas la sola nek la plej bona vojo por realigi la gravajn ideojn, kiuj inspiras nin, ni volas nur indiki, per tiuj ekzemploj, la fundamentajn spronojn tipajn de la anarkiista psikologio.

Silentu ĉiuj, kiuj intence prezentas la anarkiistojn kiel simplajn detruantojn kaj vulgarajn neantojn kaj plej bonokaze kiel vanajn revulojn, ĉar la faktoj pruvas ilian idearon.

La konstruantaj spronoj en la anarkia aktiveco speguliĝas ankaŭ sur la ideologia plano. Fakte, *la anarkiistoj estas la solaj* inter ĉiuj revoluciuloj kaj sociaj reformistoj, *kiuj posedas konstruivan programon*. Estas precize pro tio, ke la marksistoj nomas ilin »utopianoj« (ĉar ili kreas programojn por la estonto –t.e. utopiojn); pretekste ke ili ne volas zorgi pri ĥimera konstruado por la estonto, la

marksistoj neniam klopodis precize montri sian koncepton de venonta socia reĝimo. Neniu el iliaj antaŭvidoj ne transiras la konkeron de politika potenco. Ili ne diras tion, kio okazos poste. Ilia programo estas tiel simpla, ĉar fakte neniun programon ili havas. Sufiĉas foliumi la marksistajn verkojn por vidi, ke ne estas eĉ unu linio, unu ideo spegulanta precizan koncepton rilate al la strukturo de la socio nomata »socialista, komunista aŭ libera«. Nur estas klara ĉe la marksistoj la konkero de politika povo kaj la starigo de diktaturo. De tiu punkto komenciĝas la abismo de necerteco, kiu, praktike, transformiĝas en abismon de sufero, teroro kaj horora ekspluatado.

El kio konsistas la socia rekonstruo?

La *forigo* de kelkaj *institucioj, modifo* de aliaj kaj *kreo de novaj institucioj.*

Ni jam vidis la instituciojn, kiuj, laŭ ni, estas destinitaj al detruo. Poste, ni vidos tiujn, kies modifo estas la unua tasko de socia rekonstruo kaj tiujn, kiujn oni devas tiam krei. La socia rekonstruo havos ankaŭ taskon *organizi kaj kontribui al la organizado* de ĉiuj homaj aktivadoj kaj manifestiĝoj cele havigi superan materian kaj kulturan nivelon kaj senliman kaj rajtegalecan evoluadon por ĉiuj en libero, solidareco kaj justeco.

Kiam sociologo same fundamente analizas la strukturon kaj la funkciadon de la socia vivo, kiel botanikisto esploranta folion aŭ radikon, transverse kaj laŭlonge tranĉante, li konstatas, ke la bazo de ĉiu socio estas *la laboro*. Sekve, la *unua tasko* kaj la plej grava por la transfor-

miĝo de la socio estas la *organizado de la laboro.* La laboro estas skeme subdividita en fizika laboro kaj intelekta laboro; jes, skeme, ĉar, fakte, neniu laboro estas nur fizika aŭ nur intelekta. La laboro kreas, modifas, delokas, konservas aŭ disponigas al la homoj bienojn materiajn aŭ spiritajn kaj laŭ ĝia celo la fakoj estas: *produktado, transporto, komuniko, instruado kaj edukado, kulturo, sano, higieno kaj socialaj servoj, akvoalkondukado, lumigo kaj prizorgado, riparo, libroj kaj gazetoj.*

Alia fundamenta funkcio de ĉiu socio estas *interŝanĝo*, kaj *distribuo*. Sekve, la *dua tasko* de la socia rekonstruo estas la organizado de interŝanĝo kaj distribuo. Fine, ĉiu socio bezonas defendon kaj sekurecon; la *organizado de la defendo kaj de la sekureco de la socio* estas la tria tasko de la socia rekonstruo.

Sed la socia vivo ne estas nur produktado, interŝanĝo, distribuo kaj ankaŭ propra defendo. La homoj vivas en dom–grupoj pli–malpli grandaj. La vivo en tiuj dom–grupoj trudas multoblajn sociajn ĉiutagajn *rilatojn kaj bezonojn*, kiuj postulas konstantan kontentigon, reguligon kaj administradon. Sekve, la *kvara grava tasko* de la socia rekonstruo estas la *organizado de la sociaj rilatoj kaj de la administrado de la socio*.

Tiuj kvar fundamentaj taskoj entute entenas la socion. Tamen, krom tiuj ĉi, la homoj havas diversajn proprajn bezonojn, kiuj koncernas nur ilin persone. Cele al kontentigo de tiuj diversaj bezonoj, ili organiziĝas, plenlibere, laŭ sia iniciato en diversaspektaj asocioj kaj grupoj, interesantaj nur ties membrojn.

Antaŭ ol konkrete kaj detale ektrakti la ekzamenon de tiuj fundamentaj celoj de la socia rekonstruo, ni devas klare kaj asertege konigi la pozicion de la anarkiistoj rilate al la *planizado* kaj *kunordigo*.

La stimuliloj de la kapitalisma produktado estas materia intereso esprimita per la profito de la posedantoj de produkt–rimedoj. Pro tio, la kapitalisma produktado, laŭmezure ke ĝi ne dependas de ŝtata regisma politiko, ne bezonas totalan produktplanon. La ŝtato, cetere, per sia kreskanta interveno en la socia kaj ekonomia vivo, pli kaj pli sin turnas al iu planizado, kiu rolas en ĝiaj ĉiujaraj buĝetoj. Sekve, la kapitalisma produktado mem daŭre pli kaj pli iras al planizado, sed tre ĝenerala planizado.

La socialismo, kiaj ajn estas ĝiaj subdividaĵoj, prezentas *la produktadon de la havaĵoj cele al kontentigo de la loĝantaraj bezonoj* kiel movigan elementon de la ekonomio. Laŭ tiu principo, *la planizado kaj la kunordigo fariĝas neeviteblaj necesaĵoj*. Tiurilate la anarkiistoj ne estas esceptoj. Ili estas aprobantoj de la *planizita ekonomio* kaj de la *kunordigado de sociaj rilatoj*. Sed profunde ili diferencas de la aŭtoritataj socialistoj pri tiu kampo, ĉar laŭ la anarkiistoj, *la ellaborado de la plano* estas precipe la tasko de tiuj, kies plano celas kontentigi la bezonojn: la *konsumantoj* kaj *la tuta socio*, paralele al tiuj, kiuj aplikas tiun planon –la laboristoj. La ellaborado efektiviĝas surloke, ĉebaze, kaj ĉe la entreprenejoj, kaj la kunordigo efektiviĝas de funde supren sur la tuta teritorio.

## Produktado kaj servoj

La materia produktado kiel ekonomia kaj socia funkcio

entenas: minejojn, ŝtonminejojn, petrolfontojn, terkulturon, bredadon, arbarojn, fiŝkaptadon, ĉasakiron, hidro–termo–elektran energion, industriojn rilatajn al nutraĵo, konstruado, teksado, piedvestoj, ledo, ligno, metalurgio, mekanika konstruo, vitro, kemio, ceramiko, ktp.

Plie estas multaj manlaboraj profesioj, iuj en diversaj industrioj, aliaj sendependaj, kiuj rolas kiel helpaj branĉoj. Aliaj rilatas kun zorgado kaj riparo kaj sin prezentas kvazaŭ servoj, ktp.

Paralele al la materia produktado, *la servoj*, kiel *la transportoj, komunikoj, sano, instruado kaj edukado, kulturo* ktp, en kiuj efikas la homa laboro, ne povas esti konsiderataj kiel produktado, kvankam granda nombro da ili proksimiĝas per sia karaktero al la materia produktado.

## Vertikala organizo

La organizado de la produktado kaj de la servoj estas unu el la plej gravaj taskoj de la socia rekonstruo. La sukceso de la revolucio konsistas ĉefe el venko de la malordigo de la produktanta organaro. Eĉ momenton ne haltas la vivo. Daŭras la bezonoj, sekve la produktado de la havaĵoj kaj la funkciado de la servoj, kontentigantaj ĉiujn bezonojn de la loĝantaro, devas esti rapide normaligitaj kaj eĉ plibonigitaj. Feliĉe, la neceso krei novan, tute malsaman institucion por plenumi tiun grandegan kaj gravan taskon ne ekzistos. La organaro jam ekzistas de antaŭ la revolucio. Necesos nur modifi ĝin, adaptante ĝin al la novaj funkcioj komisiotaj de la revolucio. Tiu organaro, tiu institucio estas la *laborista sindikato*. Estas ĝi, kiu eksproprietigos kaj kaptos la entreprenojn kaj la

servojn kun ĉiuj ties posedaĵoj –instalaĵoj kaj nemoveblaj posedaĵoj, magazenoj, deponejoj, materialoj kaj iliaj fontoj– kaj refunkciigos ilin.


La rekonstruo estas precipe organizo–laboro: *organizado de la laboro, provizado, zorgado, produktado kaj parte de interŝanĝo* –ĉefe inter la aliaj entreprenoj–, *raciigo de la funkciado, esploroj kaj studoj pri perfektigo de la metodoj, formado de la kadroj, distribuo de la rimedoj kaj manlaborularo inter la entreprenoj* ktp. La kreado kaj la daŭrigo de harmonio en la tuta organaro sur pli am–pleksa teritoria plano postulas ankaŭ *antaŭan kunordigon* de la rimedoj, materialoj, energio kaj manlaborularon, sekve, statistiko fariĝas speciale grava servo.

La tuta organizado kaj la plenuma laboro devene estas tasko de tiuj, kiuj *rekte partoprenas per sia laboro*. Tio estas ebla nur en *la plej malgranda kolektiv-unuo* en la laborloko –laborejo, fabriko, farmo, establejo, aparta laborejo, stacio, stacidomo, lernejo, dispensario, hospitalo, laboratorio ktp. La laboristoj, ĉiuj ejaj laboristoj, pli–malpli multaj sendiference de metioj aŭ profesioj, formas la *primaran organizon*. Tio estas *organizo laŭ produktado, funkcio aŭ servo*. Poste, ĉiuj similaj organizaĵoj pri la sama produkta aŭ serva fako, lok–skale aŭ sur limigita teritorio (komunuma teritorio, ekzemple) kuniĝas por formi *lokan unuiĝon* de ĉiuj laboristoj de la entreprenoj kaj laborejoj de la sama produktado aŭ de la sama servo. La sama unuecigo, ciam en la sama produktado, la sama servo de socia funkcio, etendiĝas sur pli larĝa teritoria skalo: distrikto, arondismento, departemento, regiono, formante respondantajn unuiĝojn, distriktajn, arondismentajn, departementajn, regionajn unuiĝojn,

laŭ ekonomia fako, por fine agi sur la teritorio de la lando per starigo de *fakaj naciaj unuiĝoj*. La organizo laŭ produktaĵoj, funkcioj, sekvas rektan linion de funde supren –la *vertikala organizo*. Ĉiu unuecigo en tiu vertikala skalo, komencante per la unŭagrada organizo kaj finiĝante per nacia unuiĝo de la fakoj, elektas la respondantan *konsilion* entenantan la necesan nombron da membroj, laŭ la kazoj, reprezentantan la laboristojn, teknikistojn kaj administrantojn: *konsilion pri unuagrada organizo, konsilion lokan, distriktan, arondismentan, departementan, regionan kaj laŭfakan konsilion de nacia unuiĝo*. Laŭ la nombro de laboristoj kaj la pli–malpli granda malproksimeco de la organizo rilate al la loĝloko de la anoj, tiu elekto efektiviĝos per rekta partopreno de ĉiuj laboristoj kunvenigitaj en *ĝenerala asembleo* aŭ per la respondantaj delegitoj balotitaj dum *konferencoj* kaj *kongresoj* distriktaj, arondismentaj, departementaj, regionaj.

Estas necese, ke la praktikaj profesiaj lernejoj kaj la formad–kursoj por la laboristaj kadroj, la laboratorioj pri elementaj esploroj kaj perfektigo de la laboro ĉe la entreprenoj estu rilatigitaj kun la loka unuiĝo. Kiel profesia instrua establo la citita lernejo aŭ priesplora establo en la distrikto estas rilatigita kaj reprezentita ankaŭ ĉe la distrikta konsilio. La teknikaj duagradaj lernejoj por preparado de la teknikaj kadroj de sama produktado aŭ de sama servo, same kiel la laboratorioj de pli supera grado estas rilatigitaj kun la konsilio arondismenta, departementa aŭ regiona. La institucioj por supera profesia instrŭado, pli–malpli laŭbezone specialigitaj, sammaniere estas reprezentataj ĉe la samfaka nacia unuiĝo kaj

dependas de ĝi. Tio estas longa kaj instrua eksperimento en la profesia instruo kalkulante kun la nuna socio, kiu sugestas similan dependecon.




La ĉi-tiea skemo sufiĉe klare prezentas la strukturon de la vertikala ekonomia organizo (laŭ fako, produkto aŭ funkcio). Evidente, tiu skemo ne povas rigore kaj sammaniere esti uzata por ĉiuj fakoj, servoj aŭ funkcioj; ĉiu el ili havas sian propran econ. Unuj estas disigitaj sur la tuta teritorio kaj eĉ en la komunuma kadro aŭ sur la loka plano. Tiukaze, tiu skemo estas tiuforme uzebla. Aliaj estas reprezentataj de unu aŭ kelkaj entreprenoj aŭ establoj en la loĝ–loko aŭ nur en kelkaj dom-grupoj kaj forestas aliloke. Aliaj estas supermezure centrigitaj kaj lokalizitaj nur en kelkaj dom–grupoj kaj regionoj pro lokalizo de la krudaj materialoj, de la energi–fontoj aŭ de

la speco de la produktado. Kelkaj servoj aŭ produktoj funkcias region–skale aŭ eĉ nacie kaj ne povas esti loke dependaj nek funkcii laŭ tiu skemo, ĉar ili rekte dependas de regiona unuiĝo aŭ de la nacia unuiĝo, kie ili estas reprezentataj, aŭ eĉ estas per si mem faka nacia unuiĝo, ĉar ili estas ununura entrepreno por la landa entuto. Ekzemple tiaj povus esti baraĵo, hidro–elektra centralo, ktp.

Ekzemplo pli bone klarigos la strukturon de tiu vertikala organizo. Ekzemple, la nutra industrio, kiu entenas la industriojn pri provianto, sukero, faruno, panfarado, rizo, pastaĵoj, oleoj, laktajn kaj glaciumajn industriojn, ktp. Se ne ĉiuj kategorioj, almenaŭ granda parto el ili, estas lokita en la plej gravaj dom–grupoj. Kelkaj, kiel la resto–racioj, ekzistas ĉie. La laboristoj de ĉiu entrepreno, kiel ajn malgranda ĝi estas (kelkaj estas dekomence centrigitaj) formas la unuagradan organizon kaj elektas la lokan konsilion. La nombro de tiuj organizoj kaj de iliaj konsilioj en dom-grupo simetrias kun la nombro de entreprenoj. Tiuj unuagradaj organizoj kaj iliaj konsilioj efektivigos la eksproprietigon. Ili estas devigitaj organizi la produktadon. La antaŭaj posedantoj, se ili estas teknikistoj, inĝenieroj aŭ administrantoj, egalrajte kunlaboros en la kolektivaĵo, se ili ne estas konataj kontraŭrevoluciuloj kaj se ili ne rifuzas sian partoprenon. Tiuj organizadoj de nutra produktado en dom–grupo aŭ komunumo formas la lokan unuiĝon de la nutra industrio. La lokaj unuiĝoj en la distrikto formas la distriktan unuiĝon, la distriktaj formas la departementajn, ktp, por atingi la nacian unuiĝon de nutra industrio.

Tiu sama skemo entenanta ĉiujn homajn aktivadojn tro-

vas sian praktikon en ĉiuj produktaj, servaj, establaj fakoj. Tiel formiĝas tiom da lokaj, distriktaj, regionaj kaj naciaj fakaj unuiĝoj, kiom da ekzistantaj fakoj. Pakte, ili ne estas pli ol dudeko. Neniu malhelpo, neniu domaĝo por la starigo de speciala produkta fako, kiam estas bezone. Elkzemple, la arbar–ekspluatado kaj la ligno–industrio povas esti sendependa fako de la konstru–industrio. Sed ili havos saman strukturon kiel la aliaj fakoj.

Kelkaj fakoj –ekzemple la minoj– estas lokitaj en iuj regionoj kaj malestas en aliaj. Tiukaze ili estus loka kaj eĉ regiona fako. Aliaj, kies amplekso entenas la tutan lan–dan teritorion, estus faka nacia unuiĝo. Tiu skemo pri vertikala organizo same taŭgas por ĉiu ekonomio, kiu ne povas esti nomita industrio –terkulturo, arbaroj, fiŝkaptado, ktp– ĉiam enkalkulante la specialecojn de la tie praktika laboro. En terkulturo, specialigo estas malpli disvolvita; ofte precipas la plurkulturo. La eksproprietigo trafas nur la grandajn farmojn uzantajn nur salajrulojn. Efektivigos ĝin la terkulturaj laboristoj, la malriĉaj kamparanoj, la negravaj terkulturistoj de antaŭ la revolucio organizitaj en profesiaj kamparaj sindikatoj. Fakte, la rolo de tiuj organizaĵoj efikos malpli per eksproprietigo ol per kooperado kaj libervola formado de malgrandaj kulturejaj kolektivoj. La kooperativoj aŭ la kolektivoj tiel kreitaj estos, en ĉiu dom–grupo, samtempe la unuagrada organizo kaj la loka terkultura unuiĝo. Kelkfoje, tiu organizo intermiksiĝos kun la loka distribua organizo aŭ eĉ kun la komunumo. La komunuma konsilio, de ĝi elektita, estos samtempe loka terkultura konsilio kaj komunuma konsilio en malgranda, preskaŭ ekskluzive terkultura dom–grupo. La posta federacio de terkultura forma-

do (distrikt– arondisment– departementskale, ktp) stariĝos laŭ la sama skemo. La terkulturado–fako inkludos ankaŭ ĉiujn specialistojn: agronomojn, zooteknikistojn, besto–kuracistojn, ktp. La duagradaj kaj superaj praktikaj terkulturaj lernejoj, la kampoj kaj eksperimento–stacioj, laboratorioj kaj esplor–institutoj estos kunigitaj kun la respondantaj distriktaj, regionaj (ktp) unuiĝoj aŭ kun la nacia terkultura unuiĝo laŭ sia grado kaj specialeco.

La manlaboroj, precipe tiuj celantaj la malgravajn riparojn, la zorgadon, ktp, plu ekzistos subforme de kooperativoj aŭ eĉ individue, kiam ili ne ekspluatas aliulan laboron. Eble, kelkaj neniam malaperos, eĉ post tre disvolvita modernizado. Laŭ la landoj kaj regionoj, pli–malpli granda parto de etkultivistoj laborantaj senhelpe de salajruloj povas daŭrigi sian ekspluatadon. Ĉiuj profesie organiziĝos kaj kolektive enkalkuliĝos en la respondaj fakoj pere de siaj reprezentantoj en ĉiuj organoj de kunordigo.

La specialistoj kaj teknikistoj el ĉiuj profesioj kaj fakoj plene sendepende organiziĝos en respondaj profesiaj organizaĵoj cele al solvo de propraj profesiaj problemoj kaj kiam estos necese, estos reprezentataj en la fakaj, lokaj, distriktaj, departementaj, regionaj aŭ nur naci–skalaj unuiĝoj. Tamen, tiuj unuiĝoj (aŭ profesiaj organizoj aŭ reprezentataj ĉe la respondaj fakoj) ne havas produktadan kaj ekonomian rolon sed *teknikan, konsilan kaj informan rolon*. Estas necese ankoraŭfoje substreki, ke en libera socialisma socio, la statistiko havas speciale gravan rolon. En ĉiu entrepreno estos elementa organo pri statistiko. Ĝia aktiveco estas kunordigita per estraro en ĉiu loka, distrikta, departementa, regiona kaj

naci–skala faka unuiĝo. Sed ni pli poste pritraktos pli detale la organizon de la statistiko.

## Horizontala organizo

La jam priskribita organizo entenas konstru–fakojn kaj laŭkategoriajn servojn por krei, transformi, transloki la riĉaĵojn. ĝi estas ankaŭ organizo por *kunordigo* de la fortoj, rimedoj, disponeblaj valoroj, sed nur *en la kampo de produkt-fako aŭ de fiksita funkcio*. La entuta ekonomia vivo postulas kaj trudas *entutan kunordigon por saĝa kaj harmonia distribuo kaj utiligado de ĉiuj laborfortoj de la socio, de la naturaj vivrimedoj, sociaj produktrimedoj, de la energio, materialoj, proprietaĵoj, deponejoj, transportrimedoj ktp ĝenerale por ĉiu aktivadoj kaj ekonomiaj subdividaĵoj*. Sekve, temas pri *funkcio tipe kunordiganta kaj unuiganta ĉiujn produktantajn fakojn kaj ĉiujn servojn.* Ĝi rajte apartenas al horizontala organizo. La ĉi tie donita skemo permesas pli bone kompreni ĝian strukturon. Ankaŭ ĉi tie en la libereca socio, la kondukanta fadeno estas la federismo: ĉiu aktiveco, ĉiu iniciato, ĉiu kunordigado de la aktivadoj kaj iniciatoj komenciĝas kaj funkcias de sube supren, de la plej malgranda grupo ĝis la plej larĝa teritoria unuo –distrikto, departemento, regiono– por ampleksi la tutan landon. Kaj se oni uzas la saman skemon je ankoraŭ pli larĝa skalo: la kontinentoj kaj la tuta tero, la sama principo estos respektata.

Tiel ĉiuj unuiĝoj de la lokaj fakoj, per siaj delegitoj, starigas la *lokan ekonomian konsilion*. La lokaj ekonomiaj konsilioj, entenante la tutan produkt–aktivecon kaj ĉiujn funkciojn en iliaj agad–kampoj, formas la *distriktan ekonomian konsilion*, en kiu ĉiuj fak–unuiĝoj de distrikto es-

## Horizontala organizo de la ekonomio

**1**. Lokaj unuiĝoj laŭ fakoj de produktado aŭ ekonomia aktivado

**2**. Loka konsilio entenanta ĉiujn fakojn de la ekonomia aktiveco

**3**. Distriktaj unuiĝoj laŭ fakoj de ekonomia aktivado

**4**. Distrikta konsilio entenanta ĉiujn ekonomiajn fakojn, kun, krome, reprezentado de la lokaj ekonomiaj konsilioj

**5**. Departementaj unuiĝoj laŭ fakoj de ekonomia aktivado


**6**. Departementa konsilio entenanta ĉiujn fakojn de la ekonomia aktiveco, kun, krome, rekta reprezentado de la distriktaj ekonomiaj konsilioj de sama departemento

**7**. Naciaj unuiĝoj laŭ fakoj de aktivado ekonomia, profesia, sociala kaj kultura, nome:

| | |
|---|---|
| minoj | kulturo |
| transportoj | energio |
| komunikiloj | teksaĵoj, vestaĵoj |
| ligno kaj lignoindustrio | ĉasado, fiŝkaptado |
| agrikulturo kaj bredado | konstruado |
| nutro-industrio | interŝanĝo, distribuo |
| vitro, ceramiko | socia defendo |
| multobligado, libroj, gazetaro | ĥemia industrio |
| ferindustrio, metalurgio | diversaj asocioj |
| Nacia Federacio de la Komunumoj | profesiaj asocioj |
| publika sano | |

**8**. Nacia Ekonomia Konsilio, kunordiganta naciskale ĉiujn ekonomiajn aktivadojn de la socio.

## Horizontala organizo de la ekonomio



tas reprezentataj. La regionaj fak–unuiĝoj formas la *regionajn ekonomiajn konsiliojn* ktp. La *nacia ekonomia konsilio*, kiu *reprezentas la tutan landan ekonomion* finfaras la horizontalan organizon. En tiu konsilio estas reprezentataj, flanke de la unuiĝo de la naciaj produkt–fakoj, la regionaj ekonomiaj konsilioj, ĉiuj profesiaj organizoj de specialistoj, ĉiuj institutoj de ĝenerala instruado kaj esploroj, ĉiuj edukecaj kaj kulturecaj organizoj, la organizo por defendo de la lando, la nacia unuiĝo pri intersanĝo kaj distribuo (kiun ni pritraktos poste) kaj ĝenerale ĉiu speco de lando–skala organizo, kiu havas *aktivecon, postulanta la kunordigadon de la fortoj, rimedoj, materialoj, t.e. kiu distingiĝas per ekonomiaj agadoj kaj praktiko de la homa laboro.*

## Funkciado

Tiuj, kiuj emas vidi en anarkio malordon kaj ĥaoson, legante la antaŭajn liniojn kaj vidante tiujn skemojn, ceteretre simpligitajn, rapide sanĝos siajn argumentojn. »Sed estas terura burokratismo«, ili haste krios. »Ĉiuj tiuj ›organizoj‹ unua–, dua-, triagradaj, vertikalaj, horizontalaj, konsilioj, komitatoj, asembleoj, kongresoj, estas la restarigita bolŝevismo, kiun ni tro misfamigis«. Ili rapide forgesas en siaj asertoj, ke la moderna vivo estas tre malsimpla, ke firme teni harmonian soci–ordon ne estas tiel simpla laboro, ktp, ktp. Jes, la socia vivo estas kompleksa kaj la anarkiistoj neniam pensis, ke ĝi povas esti regata kaj aranĝita de si mem, senplane, senorganize, sen kunordig–organoj, sorĉe kiel per efiko de sorĉo–vergo. Koncerne la burokratismon, kaj analogion kun la bolŝevista senpotenceco ĉefe devenanta de sia diktato-

reco, tiuj konjekteblaj kritikantoj bonvolu nin pardoni, sed ili ne ŝajnas al ni honestaj kaj konscie serĉas konfuzon. Estas vere, ke sen teknikaj kunordig–organoj, sen konsilioj, komitatoj kaj estraroj, la laŭregulaj kaj normalaj sociaj rilatoj estas neeblaj. Estas vere, ke sen asembleoj kaj kongresoj, la komuna volo ne povas sin esprimi. Sed estas »konsilioj« kaj »konsilioj«, »asembleoj« kaj »asembleoj«. La honesteco trudas kaj devigas serĉi, vidi kaj konfesi la diferencon.

La funkciado inspirita de federismo komenciĝas de la bazo kaj revenas al la bazo, kiu decidas pri ĉio kaj al kiu ekskluzive apartenas la kontrolo de ĝiaj decidoj. La plej malgranda kolektiva unuo estas la *asambleo ĉe la laborejo, la entreprenejo, la farmo, la establejo, la stacio, la stacidomo*, unuvorte *la plej konkreta laborejo*. Sed la aktiveco de la tuta socio, ne limiĝas je laborejo sed manifestiĝas en miloj da laborejoj, la kunordigo estas nepre necesa. Tamen, en libereca socio, temas pri tia kunordigo, kiu, havante la necesan efikon, tute ne malutilas kontraŭ la kolektiva labor–unuo nek kontraŭ la izolita individuo kaj ne malhelpas ĉies iniciaton. Pro tio, la decidoj de la bazo estas konvenigitaj por la tuta lando laŭ la linio de la vertikala organizo, t.e. laŭ la funkcio kaj iras de ĉiuj respondantaj gradoj ĝis la plej larĝaj teritorioj. Tie okazas konferencoj kaj periodaj kongresoj de respondantaj delegitoj, kiuj diskutas, sintezas kaj kunordigas. La finaranĝita akordo estas la komuna decido por la tuta lando. Sed tiu akordo ne estas definitiva kaj se ĝi grave malutilas al kelkaj lokaj iniciatoj, la bazo estas libera ĝin uzi laŭ siaj konceptoj, se *tiuj iniciatoj ne speciale rekte ligas la unuiĝon*, aŭ okaze de pli gravaj malakordoj, la

disceleca punkto estas denove ekzamenata de la asembleo kaj denove diskutata pli larĝ–skale. Tiamaniere, teorie sin prezentas la problemo de eventualaj discelecoj sed praktike estas, plej ofte, *la ciferoj, la statistikoj*, kiuj decidas, kaj tute ne la kapricoj kaj la humoroj, ĉar ne temas pri ideologiaj problemoj sed pri *produktado* aŭ *servoj,* kie la aferoj reduktiĝas al ciferoj kaj teknikoj.

Por faciligi la diskutojn kaj la tutan planigitan aktivecon de la kolektiv–unuoj, estas necese, ke la sciigoj kaj statistikaj donitaĵoj estu kolektitaj, klasitaj, klare prezentitaj kaj akurate komunikitaj per cirkuleroj je la dispono de la tuta aktiva loĝantaro. Tio estas ĝuste la rolo de la diversaj teknikaj estraroj kaj de la respondantaj konsilioj kaj de la periodaj kunsidoj de la fak–unuiĝoj distriktaj, departementaj, regionaj kaj landaj.

La komisio de tiuj unuiĝoj estas saĝe distribui, rigore respektante la personan konsenton, la manlaborularon kaj la materialojn, la maŝinojn kaj ilojn inter la samfakaj entreprenoj en la agad–kampoj, same kiel, parte kaj iukaze, laŭ la karaktero de la citita produkto, faciligi la varo–makleradon aŭ la konservadon de la produktaĵoj. Tiucele, ili disponas deponejojn, magazenojn, kies reto daŭre pli larĝiĝas, atingante la entreprenojn, establejojn, stacidomojn, havenojn, aerodromojn, en la centroj distriktaj, regionaj, ktp. La organoj de kunordigo –la konsilioj– havas la taskon efektivigi tiun laboron. La konsilianoj estas periode ŝanĝataj. Estas *laboristoj* kiel ĉiuj aliaj kaj *tute ne burokratoj kaj direktantoj*. Ĉiu fak–unuiĝo, kia ajn teritori–skala ĝi estas, nur kunordiĝas, distribuas, diskonigas la iniciatojn, proponojn de la diversaj anoj de la unuiĝo, donas informojn kaj statistikajn

donitaĵojn kaj tute ne intervenas en la administrado kaj interna vivo de la diversaj entreprenoj kaj servoj. Cetere, ĝi ne havas tiun eblecon sed laŭprincipe kaj difine iu entrudiĝo ĝia ne estas ebla.

La organizo por la kunordigo de ĉiuj produkt–fakoj kaj de ĉiuj funkcioj, kiuj havas la fundamentan signon de la ekonomia aktiveco (nome, *la utiligado de la homa laboro kaj de la sociaj havaĵoj*, enkalkulanta la organizon de la interŝanĝo, distribuo, socia defendo –pri kiu ni parolos poste–, *la organizo*, kiun ni nomas *horizontala*, havas la taskon *kunordigi la aktivadojn de la diversaj fakoj* lokaj, distriktaj, departementaj, regionaj kaj tutlandaj per la respondantaj ekonomiaj konsilioj. La funkcio de tiuj konsilioj havas, ankoraŭ pli, teknikan kaj ligan karakteron kaj iu ekstera entrudiĝo en la direktadon de la fak–unuiĝoj estas ankoraŭ pli neebla ol en la kunordigado farita de la vertikala organizo. Ĝi estas komisiita por reprezenti kaj esprimi la interesojn kaj la ekonomiajn bezonojn de la lando. Surbaze de la donitaĵoj (opinioj, proponoj, kaj de decidoj devenantaj de la diversaj fakoj) sciigitaj de la pristatistikaj servoj kaj estraroj, ĝi esploras la eblecojn de plilarĝigo aŭ malplilarĝigo de kelkaj produktoj kaj servoj, pri translokigo kaj lokigo, forigo aŭ kreado, de pligrandigo de entreprenoj, de provizado per modernaj teknikoj de iuj aŭ aliaj entreprenoj, por ke ili fariĝu pli ekonomiaj kaj konformaj al bezonoj de sia aktiveco, ktp. *La ekonomia konsilio estas administra regulilo* aganta laŭ instrukcioj, sugestoj kaj decidoj de la fak–unuiĝoj, kies fonto estas ĉe la bazo: *la plej malgranda kolektiv-unuo, la laborejo*. Ĝi estas ligilo, nenio pli. Koncerne la *nacian ekonomian konsilion*, ĝi devas esti kon-

siderata malpli kiel konstanta estraro, ol kiel *kongreso, periode kunvokita, el la delegitoj de ĉiuj ekonomiaj fakoj kaj servoj.*

Ĉu estas eblaj tia strukturo, tia funkciado de la ekono–mio kaj de ĉiuj servoj de la socio, en kiu malestas la privata posedanto, la kapitalisto, la entreprenisto, la mas–tro, la submastro, la bankiero, la ŝtato, la impostkolekt–isto, la policisto, la juĝisto, la provoso, la registaro, la parlamento, la partiano ktp? Se antaŭ duonjarcento tiuj linioj estas aperintaj, ili estus aspektintaj kiel sindikatisma utopio. Sed post la sperto de la hispana laborista klaso ideologie direktita de anarkiismo –reprezentita per longa, organizanta kaj revolucia tradicio de la anarkiistaj grupoj kunigitaj en la Iberia Anarkia Federado, entenata en la Nacia Konfederacio de Laboro, tiu skribaĵo aspektas kiel konstruanta programo. En tiu sperto, la tie esprimitaj ideoj estas utiligitaj kaj cent–procente real–igitaj. Pli ol dumil terkulturaj kolektivoj formitaj kaj tute libervole disvolvigitaj donis la vizaĝon de socio sen ekspluatado, sen mastroj, sen bankieroj kaj diktatoroj, kaj de prospera terkulturado dum la tempo de terura milito.

Tutaj socialigitaj industrioj funkciis laŭ tiu skemo kaj en–tenis la tutan aktivecon, de la akiro de la krudmaterialoj ĝis la pograndaj magazenoj, kiuj disponigis la ellaboritajn produktaĵojn al la konsumantoj; ekzemple la lignoindustrio, tutaj industrioj, kiel la bierfarejoj, funkciis kiel komuna entrepreno por la tuta Katalunio, la urba transporto en Barcelono, Madrido kaj en ĉiuj gravaj urboj, la publikaj spektakloj kun la literoj CNT ktp. Ĉio ĉi atestis, ke ne plu estas posedantoj, ke la »posedantoj« estas la laboristoj mem, libere organizataj. Kian riĉan in-

teresan, instruan historion prezentas la faritaĵo de la hispana laborista klaso de 1936 ĝis 1939!

## Interŝanĝo kaj distribuo

La problemo pri organizo kaj funkciado de la produktado kaj servoj rapide pritraktita ne povas esti konsiderata kiel elĉerpita, se oni ne ekzamenas la problemojn pri pago de la laboro, pri investadoj kondiĉantaj la ekonomian kreskadon de la lando. Estas problemoj ankaŭ pri la mono. Kaj ĉio estas ligita al interŝanĝo kaj distribuo. Se, sen granda troigo, oni povas diri ke por la produktad-organizo, la necesa aparato jam ekzistas en la kadroj de la nuna socio –la laboristaj sindikatoj, iliaj unuiĝoj kaj federacioj– tia ne estas la kazo de interŝanĝo kaj distribuo, kiuj devas eke de la unua tago de la revolucio kontentigi la konsum-bezonojn de la tuta loĝantaro. La sindikatoj, en pluraj kazoj, jam disponas eĉ pri strukturo, kiu estas necesa por la konstruanta morgaŭa tasko -*pri organizado laŭ produktoj, laŭ industrioj*. La kerno de la socia organizo, de la interŝanĝo kaj de la distribuo, kun ĉiuj iliaj malperfektaĵoj, propraj al ĉiu organizo ekzistanta en la nuna socia sistemo, estas kooperado, kiu, en kelkaj landoj, atingas potencan disvolviĝon. Sed la ĉefa rolo en interŝanĝo kaj distribuo apartenas nun al privata komerca kapitalo. Tial, la solvo de la problemo de interŝanĝo kaj distribuo devas venki multe pli grandajn malfacilaĵojn ol tiujn de la socia produktado. Kaj tamen, tiu tasko ne estas malpli grava ol la produktad–organizo; iusence, ĝi estas eĉ pli grava, ĉar la antaŭinklino de tiuj, kiuj hezitas aliĝi al la socia rekonstruo kaj al la firmigo de la fido de la popol–amasoj, ĝenerale, dependas ĉefe de la *tuja sukcesa kaj justeca*

*kontentiĝo de la homaj bezonoj*. Cetere, la amaso da etkomercistoj estas grandega kaj iliaj profitpartoj estos rimarkeble malgrandigitaj pro la reorganizado de la interŝanĝo kaj distribuo. Ilia probabla malkontentiĝo prezentos, por la revolucio, gravan riskon de influo sur pli larĝa tavolo, kuntrenanta la hezitemajn kaj malmulte konsciajn elementojn al malfavora sinteno. Sed la ĉefa malfacilaĵo aperos pro la spertomanko por plenumado de tiu grava socia funkcio fare de tiuj, kiuj ricevos de la revolucio ĉiujn respondecojn. Pro tio, tiun problemon oni devas speciale atenti por eviti tragikajn erarojn. Sekve, la organizo subtenonta la revolucion en la rekonstrua tasko pri interŝanĝo kaj distribuo estas *la kooperado* kun ties disbranĉiĝoj de la aktivec–punktoj, deponejoj, magazenoj, teknikaj kaj transportaj rimedoj, personaro ktp. En la kooperado kaj ĉirkaŭ ĝi, koncentriĝos la eksproprietigo de la interŝanĝaj kaj distribuaj rimedoj, hodiaŭ enmane de la komercistoj –proprietaĵoj, ejoj, varoj, materialoj ktp. Nekontesteble, *la revolucio klopodos altiri ĉiujn malgravajn komercajn personojn, konvinki ilin, ilin alligi al la socia rekonstruado cele uzi ilian sperton kaj plejeble rapide inkludi ilin en la nova organizo de interŝanĝo kaj socia dispartigo*. Ni speciale insistas pri tiu neceso. La ĝenerala sukceso larĝmezure dependos de la sukceso en altiro aŭ almenaŭ en atingo de favora dispono de la etkomercistoj al la revolucio, por ke ili komprenu sian propran homan intereson ekde la antaŭrevolucia periodo, hodiaŭ mem. La bolŝevista sperto, en ĉiuj landoj saldiĝis je kompleta fiasko tiukampe. La hispana revolucio, pro la malgranda disvolviĝo de la koopera movado, precipe en grandaj urboj, kaj ankaŭ pro sindikatisma eraro ne atribui la necesan gravecon al koope-

rado kaj aldoni la funkcion de interŝanĝo kaj distribuo de la produktoj kiel taskon de laboristaj sindikatoj, renkontis multajn malfacilaĵojn precipe en grandaj urboj. Kompense, sur la kamparo, kie subite ekaperis terkulturaj kolektivoj, tiu problemo multe pli sukcese solviĝis. Tuta regiono –Aragono– sukcesis rekonstrui interŝanĝon kaj distribuon, forigante la monon el la cirkulado. Ni indikas tiujn faktojn nur kiel ekzemplojn, opiniante, ke ne estas loko ĉi tie por detala ekzameno de ĉiuj spertoj.

Tamen, antaŭ ol ektrakti la problemon pri organizado kaj funkciado de interŝanĝo kaj distribuo en socio survoje al plena rekonstruo, konvenas, eĉ resume, ekzameni la problemojn metitajn komence de tiu ĉi ĉapitro, koncerne la labordistribuon, investadojn kaj monon. La vere komunisma formulo: »*ĉiu laŭ siaj fortoj, al ĉiu laŭ ties bezonoj*« estas bone konata. Tute klare estas al ni –sed ni ne dezirus iun trompi, ke la plena realigado de tiu principo ne efektiviĝos en la daŭro de du tagoj kaj ke tre longtempe ĝi restos idealo, kiun la socio ĉiam klopodos progresive realigi. Tamen io estas senduba: la unua parto de tiu formulo estas uzata eke de la unua tago kaj koncerne la duan parton, ĝi estos uzata por *ĉiuj produktaĵoj sufiĉe abundaj*, kaj sendube tiu tendenco estos obstinege sekvata. Estas evidente, ke la laboro estas samtempe rajto kaj devo: *por ke ĉiu rajtu ricevi la necesaĵojn de la socio, ĝi devas disponigi siajn fortojn*; la homo devas labori se ĝi bonfartas kaj estas leĝe aĝa por labori.

En la socio en kiu la mono estas valor–mezuro, la pago de la laboro esprimiĝas per labor–pagoj kaj salajroj; en la hispana revolucio, ĝenerale la mono estis konservita.

En la kolektivigitaj entreprenoj, la laboristoj ricevis egalajn salajrojn kun iu korektado cele al realigo de la principo »laŭ la bezonoj«, sin turnante al *salajroj* nomitaj *familiaj* –praktiko hodiaŭ tutmonde uzata subforme de familiaj krompagoj. Ĉiu edzigita laboristo ricevis krompagojn, por sia edzino, se ŝi ne laboras kaj por ĉiu infano (malprogresive). Tiel la multinfanaj familioj rilate la kontentigon de la bezonoj alproksimiĝis de la fraŭloj, riĉevantaj la saman bazan salajron. Eĉ tie, kiel en Aragono en kiu loka mono anstataŭis la elcirkuligitan monon, la pago de laboro esprimiĝis per salajro (familia). Per tiu loka mono la laboristoj provizis sin ĉe la kooperaj magazenoj  (en nelimigita kvanto por la plej granda parto de la produktaĵoj kaj porcie por kelkaj). Inter la teoriistoj de anarkiismo kaj la anarkiistoj, ĝenerale, estas la discel–eco pri la neceso uzi la monon en la venonta socio. Kelkaj estas certaj, ke ajna mona signo estos daŭre necesa. Ili estas kolektivistoj, mutualistoj aŭ individuistoj. Aliaj, kvankam ili taksas sin kaj estas vere komunistoj –kiel MALATESTA, ekzemple– opinias, ke la mono devas esti konservata dum kelka tempo. Ili ne precizigas la momenton, kiam ĝi estos forigita. La demando estas delikata, serioza kaj nesufice esplorita, ĉar ĝi ne estas teorie metita kun urĝa nuneco. La plimulto de la teoriistoj kaj de la aktivuloj de anarkiismo asertege sin deklaris por la *forigo de mona sistemo en socio, kiu pretendus esti komunisma kaj emus esti tia*. Kompreneble, tiun forigon oni ne povas efektivigi en unu tago–daŭro. Kelka tempo estas necesa ĝis la organizo de produktado, interŝanĝo kaj distribuo estos plenumita. Ni permesas al ni esti pli asertegaj pri tiu problemo. Konante la bolŝevistan sperton tiuteme, ni asertas, ke surbaze de *prakti-*

*kaj konsideroj*, ĝuste, kaj ne nur de principaj motivoj, *la konservado kaj uzo de mono sub kiu ajn formo devas esti refutitaj*. La problemo estas grandega kaj postulas ĝisfundan esploron, kiun ni ne faros ĉi tie. Sufiĉas diri, ke la mono havas sian propran mekanismon kaj ke neniu kontrolo kapablas, submeti ĝin al determinita volo kiel ajn bonintenca ĝi estas. La mono estas valor-portanto. La tuta valoro de la mono respondas al labor–kvanto uzata en la produkto, (almenaŭ teorie) reprezentante la valoron de la tuta amaso de la produktaĵoj, de la havaĵoj kaj servoj je la dispono de la socio. Se okaze kelkaj havaĵoj fariĝas ne sufiĉaj aŭ se ilia neceso kreskas –kaj tio estas normala por homoj, kiuj ne haltigas siajn materiajn kaj spiritajn progresojn– ilia nekontentigita peto nekredeble ĝenos la starigitan ekvilibron de la prezoj kaj salajroj antaŭe fiksitaj. Nova interveno estos nepre necesa por starigi novan ekvilibron, fiksante novajn prezojn kaj salajrojn: indigninda komedio senĉese ludata de la bolŝevistoj. Ĉiuj tiuj ludoj supozigas la ekziston de potenco, de diktaturo kiel tiu de la bolŝevistoj, kiu, spite ĉion, restas senpova. La mona cirkulado postulas ankaŭ striktan kontrolon, kiu ne havus lokon en libereca socio.

Tiel, ni konsentas pri forigo de la mono, t.e. pri distribuo de la havaĵoj, en kiu malaperas la labor–pago mem, dum restas nur *la kontentigo de la bezonoj de la produktantoj, de la laboristoj kaj de la tuta nelaborkapabla loĝantaro*.

En tia situacio, ne estus ebleco investi laŭ la nuna senco de la vorto. Hodiaŭ, en la burĝaj landoj, la kapitalistoj investas siajn privatajn kapitalojn kaj ne maltrafas la

okazon ekspluati, tiucele, ankaŭ la impostpaganton per subvencioj kaj kreditoj de la ŝtato. Ankaŭ la ŝtato investas en kelkaj okazoj, kaj la amplekso de tiuj investoj pli kaj pli kreskas kun la plilarĝigo de la ŝtata interveno en la ekonomia vivo. La fonto de tiuj investoj estas ĉefe la impostoj.

Ĉiu socio kreskas. La produkt–rimedoj eluziĝas kaj maljuniĝas. Ili postulas renovigon kaj modernigon. La produkt–kapablo de la socio ne ĉesas kaj neniam ĉesos kreski. Estas normale kaj valide por ĉiu socio, inklusive de la anarkiista. Sekve, parto de la laboro ne alportos havaĵojn destinitajn al la tuja konsumo. Tiusence, tiu labor–parto povus esti konsiderata kiel investo. La venonta socio havos, aŭkaŭ ĝi sian politikon en tiu kampo. Hodiaŭ, neniu kapablas ĝin determini. Surbaze de sperto kaj observadoj, ni povas esprimi nur la deziron ne tro premi kelkajn generaciojn favore al malproksima venonto sed modere vojiri, ĉar la homa vivo ne povas enteni nur sinoferojn, oni devas vivi por havi emon al laboro kaj kreado. El tio, kion ni diris, klare rezultas, ke *ni refutas ĉiun neceson de impostoj*. Kiagrade estas eble kaj kiamaniere tion realigi? Ni klopodos montri tion en la sekvanta raporto.

Oni ne povas paroli pri interŝanĝo, en la nuna senco de la vorto, en socio stariganta la komunismon. Estos prefere: *konstanta movo kaj cirkulado de produktaĵoj kaj servoj* de la produktanto al la konsumanto. Eterna cirkulado de la fruktoj de la fizika kaj intelekta laboro kaj multokaze, estos malfacile meti striktajn limojn inter produktado kaj distribuado, kaj tio estas la kialo por kelkaj sindikatistoj, inkludi la distribuon kaj interŝanĝon en

la devoj de la sindikatoj antaŭ la periodo de socia rekonstruo. Se oni prenas la laboron kiel klasifiko–signon, tia konfuzo estas logika. Ĉar en interŝanĝo kaj distribuo la socio enmetas kvanton de laboro, la homoj plenumantaj tiun funkcion povas esti konsiderataj sammaniere kiel tiuj de la aliaj funkcioj servo–karakteraj: komunikiloj, transporto ktp. Sekve, ne estus kaŭzo paroli pri speciala kaj tute sendependa organizo.

Tamen, se la funkciado de la nuna socio estas pli profunde analizita, ni vidos, ke la interŝanĝa kaj distribua funkcio estas io pli grava ol ordinara serva kaj ke ni havas seriozajn motivojn por aparte loki ĝin. Praktike, en multaj kazoj tio, kio estas simpla distribuo, estas inkludita en la produktado. La provizado de materialoj kaj maŝinoj al entreprenoj estos efektivigita larĝmezure rekte de la organizo de produktado mem. Estos same pri la pogranda varo–maklerado. En aliaj kazoj, tio, kio laŭnature estas ĝuste distribua funkcio, kiel ekzemple la restoracioj, estos konsiderata kiel produktado kaj apartenos al la fako de respondanta produktado (nutraj industrioj).

Sekve, temas ĉi tie pri ĉiutaga konsumado de la amasoj, kies organizado estas objekto kaj tasko de la organizo pri interŝanĝo kaj distribuo. Koncerne la strukturon de tiu organizado, estas facile imagi ĝin, ne forgesante la ĉi–supran raporton kaj konante la sperton de la nunaj konsum-kooperativoj. La organizaĵo pri interŝanĝo kaj distribuo entenas la tutan loĝantaron de la malgrandaj dom–grupoj kaj de la kvartaloj en la grandaj dom–grupoj. En tiu lasta kazo, la organizaĵo reprezentas, iamaniere, lokan unuiĝon de interŝanĝo kaj distribuo, kun

siaj kvartalaj magazenoj kaj specialigitaj kaj ĝeneralaj deponejoj. Tiu loka unuiĝo estas reprezentata ĉe la loka ekonomia konsilio. Poste sekvas la unuiĝoj distriktaj, departementaj, regionaj kaj la nacia unuiĝo kun la responda reprezento ĉe la ekonomiaj konsilioj tie ĉi cititaj kun siaj multaj deponejoj, siloj, glacitenejoj ktp kaj siaj propraj transport–rimedoj ktp, ktp. Tiu reto de organizado, interŝangado kaj distribuado ricevas la produktaĵojn de la diversaj produkt–fakoj kaj distribuas ilin, escepte de la produktaĵoj, kies provizado estas rekta inter la fakoj, kaj ankaŭ kiam ekzistas dependaĵoj ĉe la entreprenoj por la provizado de la personaro laboranta en tiuj entreprenoj –provizado, kiu tamen estos statistike registrata en la socia interŝanĝa kaj distribua organizo.

Ĉar temas ankoraŭfoje pri statistiko, necesas esplori la problemon. Estas jam dirite, ke statistikaj elementoj havos sian lokon en ĉiu entrepreno, kiom ajn malgranda ĝi estos. Sed estas pli oportune, ke *la statistiko, kiel funkcio kaj servo, estu starigita en la sino de la interŝanĝa kaj distribua organizo*, kie estos centrigitaj ankaŭ la sciiĝoj pri bezonoj por esti prezentataj al la respektivaj ekonomiaj konsilioj kaj de tie al la nacia ekonomia konsilio kaj al la koncernataj unuiĝoj de produkt–fakoj por esti konsiderataj okaze de planizado. Nur *landskale* la statistiko stariĝos kiel *specialigita kaj sendependa instituto*, kie, per uzado de la plej modernaj rimedoj, estos adiciataj kaj ellaborataj la donitaĵoj por la tuta lando. Je ĉiuj teritoriaj skaloj, periodaĵoj estos eldonataj por informi la organizojn koncernantajn la tutan socion.

La konsumado estas rajto por ĉiuj homoj –rajto de vivo. Sed por la laborkapablaj homoj, tiu rajto estas ligita al la

devo socie utile labori. Ĉiu laborkapabla individuo de–vos trovi sian lokon kiel havaĵkreanto; ĉiu homo, pro tiu elementa devigo, estas ano de labor–organizaĵo. La kontrolo de la akurateco en la laboro ne estas malfacila. Sed, se fariĝas necese, la uzado de labor–libreto regulos tiun kontrolon.

La provizado de la civitanoj je ĉiutagaj konsumaĵoj efek–tiviĝos per la kvartalaj magazenoj kaj per la provianta-dejoj de la grandaj entreprenoj kaj per aliaj rimedoj determinotaj kaj pli bone precizigotaj de la sperto. La sufiĉe abundaj produktaĵoj estos senlimige uzataj. Ĉiel, por eviti malŝparadon kaj eventualajn ekscesojn, ia kontrolo povus ekzisti. Ilustra ekzemplo: enkonduko de individuaj aŭ familiaj konsumkuponoj por kontroli la konsumadon de iuj produktaĵoj. Kelkaj bezonoj povus esti tute kontentigitaj, senkontrole kaj senlimige –la urbaj transportoj, ekzemple. Koncerne la provizadon de produktaĵoj, kies kvanto estas limigita, kaj tiom longe dum ili estos nesufiĉaj por la plena kontentigo de determinitaj bezonoj, ne estas alia rimedo ol porciolimigo, spite la malbonajn milito–rememorojn. Alimaniere estus necese porciumi per la prezoj ligitaj ankaŭ al malbonaj rememoroj de la nuna socio por tiuj, kiuj suferas senhavecon kaj malriĉecon. Kompreneble, tiu porcio–limiga sistemo devas kaj povas esti simpligita por esti malpli peza. Estas nur teknika demando kaj ne burokratisma afero. Kiam la kontentigo de la kulturaj bezonoj kaj socialaj distraĵoj –teatro, kino, koncertoj, opero– ne estos tute ebla, ankaŭ estos porcio–limigo, laŭ antaŭaj kalkuloj, per monata aŭ semajna distribuo de biletoj por familio. La sama sistemo validas por la loĝejoj en somer–restadejoj aŭ en ter-

mokuracejoj. La transport–bezonoj per fervojoj rapide povus esti kontentigitaj post iu limigo komence. Sed kio devas tute kaj senlimige esti kontentigita, tio estas *por ĉiuj, nutraĵo, kuracado kaj infana edukado*.

Ni scias, ke oni povas meti al ni grandan nombron da demandoj delikataj kaj malfacile solveblaj, por montri al ni kiom malfacilega estas tiu problemo. Tio estas neutila; ni bone scias tion, kaj ni ne iluziiĝas, sed spite ĉion, la homo trovas ĉiam solvon kaj tiu solvo neniukaze estas pli malbona ol la nuna sistemo aŭ tiu de la bolŝevistoj karakterizita per maljustaĵoj kaj privilegioj. La loĝigo–problemo estas alia grava problemo, pri kiu ni ne volas silenti. La loĝantaro pliiĝas laŭ natura kreskado kaj malpliigo de la morto–kvanto. Probable daŭros tiu tendenco. La nuntempa demografio kaj la esploro de la psikologio de la familioj konkludas, ke 2 aŭ *3* infanoj por familio estas ideala normo por la psikologia kaj demografia ekvilibro. Laŭ tiu normo, la renovigo de la generacioj efektiviĝas laŭ adekvata proporcio por eviti la maljuniĝon de la loĝantaro kaj la ekscesan pezon de neaktiva loĝantaro (infanoj, maljunuloj, kripluloj, malsanuloj) sur la amaso de aktiva loĝantaro. La kleraj homoj akceptis tiun optimumon, kiu certe fariĝos kondut–regulo por ĉiu familio. Paralele al la kreskado de la loĝantaro, la loĝejoj malnoviĝas. Pro tio estas necese konstrui novajn loĝejojn, ne nur por la plia parto de la loĝantaro, sed ankaŭ por anstataŭigi la kadukajn loĝejojn. Sekve, necesas antaŭvidi, ke la bezonoj pri loĝejoj estos grava klopodo por la socio. Ĝi devos »investi« tiucele iun parton de la laborfruktoj; tio estas tasko por konstruad–industrio, tasko neprokrastebla.

La plej bona impreso de la eksterlandanoj, vizitintaj Barcelonon en la jaroj de revolucio kaj milito (1936–1939), estis la daŭra vigla ritmo de la dom–konstruado.

Sed paralele al la konstruado de novaj loĝejoj kaj eĉ antaŭe, estos necese pli justece distribui la disponeblajn loĝejojn. Hodiaŭ, ĉie mankas loĝejoj. Sed tiu manko estintus malgrandigita, se laboristaj organizoj aŭ kvartalaj komisionoj speciale tiucele starigitaj estus kalkulintaj la loĝejojn por koni la ekzaktan nombron da neokupataj aŭ nesufiĉe utiligataj loĝejoj kaj ekplenumi distribuon. Dum la socia rekonstruo, tiun taskon plenumos la kvartalaj interŝanĝaj kaj distribuaj organizoj, kiuj elektos la necesajn komisionojn.

Estas evidente, ke sur la kampo de distribuo la anarkiis–toj ne kontentiĝas per malprecizaj vortoj, sed prezentas al la publika opinio rekonstruan programon klaran, seriozan kaj prirespondan, eĉ malmultvorte. Ankaŭ ĉi tie, kiel en la produktado, ne estas loko por la ĥaoso, malordo, nek por la potenco kaj proprieto, ŝtato kaj la kapitalistoj, bankieroj kaj impost–kolektistoj, policistoj, entreprenistoj, komercistoj kaj spekulantoj.

## Defendo de la socio

Ĉiu bezonas sekurecon kaj trankvilecon. La socio devas ilin certigi. Sed kio estas socio, se ne ĉiu mem kun ĉiuj ĉies similuloj? Ĉu multaj militistaroj ĝisdente armitaj kaj policanaro perfektiginta ĉiujn metodojn de la mezepoka inkvizicio estas nepre necesaj por certigi sekurecon kaj trankvilon? Ofte oni parolas al ni pri la ekstera kapitalista ĉirkaŭbarado, danĝero de ekstera interveno cele al sufoko de ĉiu iniciato rekte kondukanta al socialismo.

Tia danĝero ne estas vere ekskludita, sed kiom estas naive, malvere kaj krime esperi, ke la savo povus rezulti nur de universaligo de la militismo transportanta la tutan vivon de la civitanoj en grandegan, ĉion subpremantan soldatejon! Iluzie estas esperi elsuĉo de la maro per kulero, forigi tiranismon per tiranismo! Tragika iluzio, pri kiu kradrostiĝas 900 000 000 da homoj, kaj kiu endanĝerigas la vivon de pli ol 2 miliardoj da aliaj homoj! Iluzio estas opinii, ke la liberigado de la mondo estas efektivigebla nur se oni konkeras la Universon kaj trudas diktatoron de stultuloj kaj senhontuloj!

En venonta buĉado cele al »savo de la demokratio«, de la »libera mondo« unuflanke, kaj por »defendo de la socialismo« aliflanke, estos la laŭdirita »socialismo«, kiu trovos sian tombon, kaj ankaŭ eble la tuta civilizacio, ĉar, malgraŭ kion oni asertas, la monda kapitalismo montriĝos la plej forta sur la milita kampo, ĉar ĝi estas kaj estos la plej forta sur la ekonomia kampo. Kaj tiu laŭdirita »socialismo« pereos ĝuste pro tio ke ĝi »*armeiziĝis kaj seniĝis de ĉiu simpatio, perdante la batalon sur la morala kampo, detruante, dormigante kaj paralizante la internacian solidarecon*.«

Sebastien FAURE, dum la lasta periodo de sia vivo, la antaŭtagon de la dua mond–milito, kondukis larĝan kontraŭmilitisman propagandon kun la signaldiro: unuflanka senarmiligado; kaj invitis Francion doni la ekzemplon. Laŭ multaj, tio aspektis fantazia kaj li argumentis tiel: la naziismo minacas Francion kaj la mondon; la fonto de ĝia forto estas la maljustaĵo trudita de la grandaj potencoj al Germanio. Francio estas unu el tiuj potencoj. Se ĝi malarmiĝados, ĝi forprenos multajn atutojn al HITLER. Li

kapablus morgaŭ ataki ĝin sed, tion farante, li antaŭe perdos la militon, ĉar li ekstarigos kontraŭ si la tutan francan popolon; ĉiuj popoloj protestos kontraŭ la germana militismo, kaj tio vekos la germanan popolon mem, kiu ne prokrastos kontraŭi la hitlerismon. Alimaniere, sen tio, Francio ne sukcesos rezisti al la armeoj de HITLER.

Anstataŭ atenti tiun vocon. Francio konstruis la »Magi–not«–linion, kiu tute ne utilis. La lando estis okupita. Poste, la brutaleco de la germana premado unuigis la francan popolon en la Rezistadon. Tiu Rezistado multe pli kontribuis al la savo de Francio kaj malvenko de la naziismo ol la tuta senutila armilaro, kiu en la daŭro de kelkaj tagoj malaperis antaŭ la nazia invado. Samepoke, aŭ pli poste, la malgranda Svisio, kies militservo daŭras nur kelkajn monatojn, kies tuta popolo, kvankam nearmeizita, konservas siajn armilarojn hejme, estis preta kontraŭi la ferajn hitlerajn armeojn, eksplode pereigi ĉiujn siajn elektrajn centralojn, totale senlumigi la landon kaj entombigi la hitlerismon. Estis tuta montara teritorio, kie estis necese, ke la rezistado estu la batalo de la tuta popolo. Kaj HITLER ne kuraĝis. Danio ne rezistis, sed perdis multe malpli ol Francio.

Certe, *se la defendo de la socialisma lando kalkulas nur kun siaj militaj fortoj, ĝi de antaŭe formalaperos*. Tamen, se ĝi kalkulas kun la tutmonda solidareco, ĝi povas ankaŭ malaperi, sed ĝia malvenko estus venko laŭ la historia perspektivo. Ni ne devas iluziiĝi, *se la revolucio ne etentiĝos, se ĝi ne ampleksos plurajn landojn, se ĝi ne fariĝos standardo de pluraj popoloj, ĝi certe malvenkos*, escepte se internaciaj cirkonstancoj aparte favoraj sa-

vos ĝin, kiel okazis por la rusa revolucio. La ekstera interveno ne kapablis premi ĝin, sed la diktaturo sufokis ĝin.

Ni parolu konkrete. La revolucio ne povas rifuzi la arman defendon, ĉar la eventoj ĉiam entenas nekonataĵojn. Sed la arma defendo ne devas fariĝi armeizado. La arma defendo estos *tasko de la revoluciuloj* organizitaj, preparitaj kaj armitaj laŭ kvartaloj kaj dom–grupoj, evitante la grandajn amasigojn kaj rifuzante la konstantan armeon. Temas pri armita laborista popolo, kiu ne forlasas la laborejojn kaj povas esti kunvokita nur periode, surloke, por mallongdaŭraj ekzercoj por kapabli uzi novajn armilojn. La nuna svisa armeo, kiu fakte estas armeo –ni ne rigardas ĝin kiel modelon–, tre proksimas de simila praktiko, kaj, okaze de ekstera agreso –evento ne tute ekskludita–, kiam la sukcesebloj estos ĉiam malgrandaj, krom se la *internacia solidareco manifestiĝos*, la sola restanta espereto estas, spite ĉion, la *gerila defendo*. La historio entenas plurajn ekzemplojn. Unu el la grandaj eraroj de la civitana milito hispana en 1936-1939, se oni ne parolas pri la perfido de la demokratiaj landoj kaj de Sovetio, kio estas la ĉefa kialo de la malvenko, estas la fakto, ke la revoluciuloj faris surlokan militon –kiu ne povas esti avantaĝa por la revolucio– anstataŭ gerilan militon de la tuta popolo. Kaj tamen ekzemploj ne mankis al ili. Tiu de MAKNO en Ukrajnio estis la plej freŝdata. La bolŝevistoj, kiuj perfide subpremis la maknan movadon, estis la unuaj por uzi ĝian taktikon dum la unua mondmilito.

Koncerne la internan danĝeron, la armita popolo estas sufiĉe forta por sin defendi. La *efektiva defendo*, la plej

reala sur tiu kampo ankaŭ *estas la sukceso de la revolu–cio pri la solvo de la urĝaj sociaj politikaj problemoj de la lando* kaj tute ne estas la bajonet–pintoj nek la revolver–pafo. Por konkludi, ni ne volas pli detale ekzameni tiun demandon, ĉar ni sufiĉe klare esprimis la realan gravecon, en malgranda lando, de ĉiu defendo limigita al fenomeno (socia revolucio), kies forto estas nur en sia universaligado. Ni dezirus aldoni kelkajn vortojn rilate al la strukturo de la arma defendo, ĉar tamen tia defendo estos necesa kaj devos esti organizita. La lokaj kaj kvartalaj grupoj de revoluciuloj kaj laboristoj elprovitaj, volonte formitaj, unuiĝas por dom–grupo en kolektiv–unuoj kun responsuloj rekte elektitaj kaj estas reprezentataj en la loka ekonomia konsilio. La jam konataj skemoj de vertikala kaj horizontala organizo taŭgas ankaŭ tiukaze. La kursoj kaj la lernejoj (jes, lernejoj kaj ne soldatejoj), kiel ĉiuj aliaj instruaj institucioj, funkcios kiel aneksoj de la respondantaj unuiĝoj pri revolucia defendo. La formado de kadroj de teknikistoj por la defendo (jes, teknikistoj kaj ne oficiroj admirante la disciplinon, kiu en ĉiuj armeoj havas multe pli gravan lokon ol la teknika preparado) estos ankaŭ necesa. La produktado de armilaro, iumezure, estos ankaŭ necesa, same kiel ebla liverado de armilaro eksterlanden, sen troigo, sen neniu armeizado de la vivo kaj ekonomio.

## La socia vivo kaj la administrado de la socio. La libera komunumo – baza kaj koncentrada ĉelo de la homa aktiveco

En la moderna socio, la ekonomio superregadas kaj far–iĝas unuaranga realaĵo. Tiu fakto kondukas kelkajn sindikatistojn erare dedukti, ke ĉio revenigas al ekonomio

kaj eĉ al produktado; de tie, la koncepto, ke ĉiu socia organizo povas havi unikan formon: la sindikaton –elementon de simila koncepto de la venonta socia organizo, kun pli larĝa spirito troviĝas eĉ en BAKUNIN. Koncerne la marksistojn, laŭ kiuj ĉio estas ekonomio, kvankam, fakte, ili donas ekskluzivan unuaecan rajton al la politiko, potenco, ŝtato, kaj dependigas ĉion de la politiko kaj la tuta socio prenas strukturon tipe politikan.

Ĉiukaze, la unuflanka rigardo estas danĝera. Akcepti unuforman organizon de ĉiuj homaj aktivadoj en ĉiopova centralizo, kiam la vivo estas diversforma kaj diversfunkcia, taŭgas nek por la bezonoj de tiu vivo nek por la interesoj de libera universala disvolviĝo. La vivo ne estas nur produktado kaj ne devas esti reduktita al produktado de varoj aŭ al ties konsumado, nek eĉ nur al ekonomiaj aktivadoj en la senco de utiligado de la laboro. Se ni provus doni unuaecan rajton al kelkaj manifestadoj malprofite al aliaj, ni estus devigitaj agnoski, ke *la vivo en socio regas la homajn interrilatojn* tiel en ilia historio kiel pro ĝia graveco. Sed ankaŭ tio ne povas esti kialo por ĉion revenigi al vivo en socio kaj por ke tiu ĉi fariĝu la unika formo de organizo socia, ekonomia, kultura ktp.

Tamen, nekontesteble, la vivo en socio trudas grandan nombron da bezonoj kaj rilatoj, kiuj devas esti zorgataj, disvolvataj, regataj, organizataj, administrataj. La socia vivo unue entenas la tuton de la homa grupo, la komunumon, kaj etendiĝas al distrikto, departemento, regiono, por atingi la landan teritorion. Por ĝi, ĉiutage estas komunaj solvendaj problemoj: akvo– kaj elektro–alkondukado, pligrandigo de la transport–reto, plibonigado de

la vojoj, interarbaj komunikiloj, urboplanismo, higieno ktp. Kompreneble, pri tiuj problemoj pro ilia *produkta, konstrua, teknika karaktero, ne estas kompetenta socio konceptita kiel formo de administrado*, sed *iliaj solvoj principe estas tasko* unue de *la tuto de la teritoria loĝantaro pro ĝia civitaneco*. La administrado de ĉio, kio rilatas al homoj kiel socia kolektivo estas tasko de ĉiu loĝanto, kiu ajn ĝi estas: aŭ *produktanto, konsumanto, profesiulo* ktp.

*La baza ĉelo de la socio estas la komunumo*. *Ĝia ĝenerala asembleo* esprimas la komunuman volon. La publike elektita konsilio estas la rekta organo de la administrado kaj de la daŭrigo de la rilatoj kun la aliaj komunumoj. La *komunuma federacio* en la distrikto, arondismento, departemento kaj regiono ampleksas la respondajn teritoriojn, kaj *fine la komunuma federacio sur la tuta lando reprezentas la teritorian organizon de la socio*. Estas ĝuste la organizo, kiu anstataŭos la nunan ŝtaton. Tiu organizo havos duoblan, karakteron: vertikalan kaj horizontalan. Horizontale, la komunumoj estas reprezentataj en la lokaj ekonomiaj konsilioj distriktaj, arondismentaj, departementaj, regionaj kaj naciaj por ĉiuj problemoj koncernantaj la ekonomiajn rilatojn. La funkciado de la socia kaj administra organizo, kiel tiu de ĉiuj aliaj organizoj en la anarkiisma socio estas federacia –de la bazo supren, de la periferio al centro, de la malgranda unuo al la plej ampleksa. Baze estas la ĝenerala asembleo de la loĝantaro de ĉiu kvartalo aŭ de la tuta komunumo. La kunordiga organo estas la kongreso. Por la loĝantaro je la plej larĝa teritoria skalo kaj por la lando, kongreso de la delegitoj de la respondaj adminis-

traj unuoj. *La unueco de la lando, la integraleco de la teritorio, estas reprezentata per la nacia federacio de la komunumoj*.

## Plej diversaj organizaĵoj kaj asocioj

Krom la jam ekzamenitaj aktivadoj, kiuj havos kvazaŭ devigan karakteron por ĉiuj, kiuj esprimas utilismon, ek–zistas granda nombro da aliaj aktivadoj koncernantaj nur apartajn homajn grupoj, kiuj organiziĝas por realigi proprajn komunajn iniciatojn por la kontentigo de siaj bezonoj homamaj, sciencaj, artaj, edukaj, kulturaj, sportaj ktp. Tiuj iniciatoj kaj bezonoj hodiaŭ mem naskas grandan nombron da organizaĵoj kaj grupoj la plej diversaj, ne ampleksantaj la tutan socion. Tiucele, la homoj organiziĝas libervole. Ili federaciias aŭ ne laŭ distriktoj ktp, kaj eĉ internacie; ili estas reprezentataj aŭ ne ĉe la respondaj ekonomiaj konsilioj, starigas rilatojn, kiuj konformiĝas al la bezonoj kaj gustoj de iliaj anoj. *La libereco, la plena libereco estas la unika kondiĉo de iliaj ekzistado kaj funkciado*. Ili povas kreiĝi, disiĝi, provizore aŭ sezone, dum pli–malpli longaj periodoj, aŭ konstante, laŭ la volo de tiuj, kiuj bezonas tiajn grupojn.

El ĉiuj teoriistoj de anarkiismo, KROPOTKIN estas tiu, kiu plej bone konceptis kaj esprimis la fundamentajn tendencojn de la socia disvolviĝo de nia epoko kaj precizigis la ĉefajn formojn de la venonta organizo.

> »La ideo de sendependaj komunumoj –skribis KROPOTKIN en 1915 en sia libro *La Moderna Scienco kaj la anarkio*– por la teritoriaj grupoj kaj de larĝaj federacioj por la grupoj laŭ sociaj funkcioj –ambaŭ intermiksiĝas kaj apogas unu la alian por kontentigi la sociajn bezonojn– permesis al anarkiistoj konkrete, efektive koncepti la eblan organizadon de liberigita socio. Restis nur aldoni grupojn laŭ personaj kunrilatadoj –

> sennombrajn, senfine diversajn, longdaŭrajn aŭ ne, aperantajn laŭ la momentaj bezonoj por ĉiuj eblaj celoj–grupojn, kiujn ni jam vidas ekaperi en la nuna socio ekstere de la politikaj kaj profesiaj grupoj.
>
> »Retiĝante unu sur la alia, tiuj tri specoj de grupoj tiel sukcesos plenumi la kontentigon de ĉiuj sociaj bezonoj: konsumado, produktado kaj interŝanĝo, la komunikiloj, sanitaraj aranĝoj, edukado, reciproka protekto kontraŭ agresoj, interhelpo, teritoria defendo, fine kontentigo de la sciencaj, artaj, literaturaj, distraj bezonoj. Ĉio tio –daŭre plenviva kaj daŭre preta respondi per novaj adaptoj al la novaj bezonoj kaj influoj de la socia kaj intelekta medio.
>
> »Se tia socio disvolviĝos sur sufiĉe vasta kaj loĝata teritorio por ebligi la necesan diversecon de gustoj kaj bezonoj, oni baldaŭ vidos, ke la trudado per ordonpovo, kiu ajn ĝi estos, estas senutila.«

Tiu koncepto de KROPOTKIN estas la kondutregulo de la konstruanta programo tie ĉi skizita. Ĝi ne estas kompleta. Ĝi ne entenas ĉiujn problemojn. Ĝi ne estas unika nek neŝanĝebla. Ĝi ne havas la karakteron de la dek ordonoj de MOSEO nek la pretendon esti modelo kaj konkreta plano por rekonstruo de venonta socio. Ĝi estas nur *ilustrado* de la anarkiista koncepto pri socia rekonstruo.

Post tiu legado, ni lasas la leginton objektive juĝi ĉu estas loko en tiel konstruita socio por la tuta sistemo de institucioj kaj potenc–organaroj, kiun ni kritikis en la unua parto, kaj ĉu estas vere, ke tia senaŭtoritateca socio estas ebla kaj povos certigi harmonion kaj ordon, aŭ konkludi, ke ĝi estos »reglando de ĥaoso kaj malordo.«

# Enhavtabelo

**Antaŭparolo**.....1

**Origino de la senestrecaj ideoj kaj movado**.....3

**Senestrecaj principoj**.....9
- Libereco.....9
- Solidareco.....13
- Egaleco.....18
- Justeco.....24
- Libera iniciativo.....28
- Libera kontrakto.....32
- Federismo.....36
- Senestreco.....42
- Ateismo.....47
- Internaciismo.....53
- Kontraŭmilitarismo.....58
- Neperforto.....63
- Malcentralizado.....67
- Komunismo.....74
- Neado de la leĝo.....80


**Institucioj de la aŭtoritato**.....89
- La ŝtato.....90
- Propieto.....95
- Eklezio.....100

**Instrumentoj de la regpovo**.................................107
Registaro.......................................................107
Parlamento......................................................110
Tribunalo.......................................................113
Malliberejo.....................................................115
Polico..........................................................117
Armeo...........................................................120
Mono............................................................123
Imposto.........................................................129
Lernejo, scienco, arto..........................................137
Gazetaro, radio kaj televido....................................140

**Realigaj rimedoj kaj taktiko**................................145
Bezono de socia rekonstruado....................................145
Instruado, edukado kaj organizado...............................146
Rekta agado: bojkoto, sabotado, striko kaj ĝenerala striko......149
Protesto, ribelo, insurekcio, revolucio kaj socia revolucio.....155

**Konstruiva anarkiista programo**..............................163
La konstruanta spirito kaj la fundamentaj celoj de socia rekonstruo...163
Produktado kaj servoj...........................................169
Vertikala organizo..............................................170
Horizontala organizo............................................177
Funkciado.......................................................180
Interŝanĝo kaj distribuo........................................185
Defendo de la socio.............................................195
La socia vivo kaj la administrado de la socio. La libera komunumo – baza kaj koncentrada ĉelo de la homa aktiveco...199
Plej diversaj organizaĵoj kaj asocioj...........................202

Georgo Balkanski



# Bazoj de la anarkiismo

Biblioteca Mateo Morral

Cta St Climent, 14 - 08840 Viladecans http://www.bmmorral.org bmm@enxarxa.com